VERKARO

V. Devjatnin

Digitized by Google

KOLEKTO ESPERANTA APROBITA DE D° ZAMENHOF

FRANCUJO. — HACHETTE kaj K°, 79, Boul. St-Germain, Paris

LIVRES D'ÉTUDE

Grammaire et Exercices de la langue Esperanto, par L. de Beaufront. 1 50
Corrigé de Grammaire et Exercices de la langue Esperanto, par L. de Beaufront. . . . . » 75
Commentaire sur la grammaire Esperanto, par L. de Beaufront . . 2 »
Texte synthétique des règles, préfixes, suffixes, expressions de l'Esperanto, traduction française en regard, par L. de Beaufront . . » 50
Thèmes d'application, *Lexicologie, Syntaxe, Formation des mots de l'Esperanto*, vocabulaire des mots employés, par L. de Beaufront . . 2 »
Cours commercial d'Esperanto, par Marissiaux. 1 50
Corrigé des exercices du Cours commercial d'Esperanto, par M. Marissiaux.. . . . . 1 »
L'Esperanto en dix leçons, par Th. Cart et Pagnier. . . . . » 75
Corrigés des Exercices de l'Esperanto en dix leçons, par Th. Cart et M. Procureur . . . . . » 50
Premières leçons d'Esperanto, par Th. Cart. . . . . » 30
Dictionnaire Esperanto-Français, par L. de Beaufront. 1 50
Structure du dictionnaire Esperanto. *Réponse à beaucoup d'objections.* (Teksto esperanta kaj franca), par L. de Beaufront. . . . . » 30
Vocabulaire Français-Esperanto et **Vocabulaire abrégé Esperanto-Français,** par Th. Cart, M. Merckens et P. Berthelot 2 50
Vocabulaire des mots spéciaux à la philatélie, par R. Lemaître. . » 40

TEKSTOJ EN ESPERANTO

Brueys et Palaprat. *Advokato Patelin*, tradukita de J. Evrot. . . » 75
Diversaĵoj, rakontetoj tradukitaj de S^ro Lallemant kaj Beau. . . . 1 25
Ekzercoj de Aplikado, *Leksikologio, Sintakso, Vortfarado Esperantaj*, de L. de Beaufront. . . . . 1 »
Esperantaj prozaĵoj, de diversaj aŭtoroj. 2 50
Fundamenta Krestomatio de la lingvo Esperanto, de D^ro Zamenhof.. 3 50
Fundamento de Esperanto, de D^ro Zamenhof. . . . . 3 »
Godineau. *La Kolorigisto-aerveturanto.* . . . . . » 30
Hamleto, dramo de Shakespeare tradukita de D^ro Zamenhof, *nova eldono*. . . . . 2 »
Komercaj leteroj, de P. Berthelot kaj Ch. Lambert . . . . . » 50
Kondukanto de l'interparolado kaj korespondado kun aldonita Antologio Internacia, de Grabowski. . . . . 2 »
Kurso tutmonda. de E. Gasse. . . . . » 75
Labiche et Legouvé. *Cikado ĉe Formikoj*, unuakta komedio. . . . » 60
La Fontaine. *Elektitaj Fabloj*, esperantigitaj de G. Vaillant. . . » 75
La Komerca sekretario, de Ros Sudria. . . . . » 50
Leibniz. *Monadologio*, tradukita de E. Boirac. . . . . » 60
Maistre (X. de). *Vojaĝo interne de mia Ĉambro*, tradukita de S. Meyer. . . . . » 75
Matematika terminaro kaj krestomatio, de R. Bricard. . . . . » 75
Molière. *L'Avaruło*, tradukita de S. Meyer . . . . . » 75
Norman. *Poŝlibro Internacia*, por Aferistoj, Turistoj, K. C. . . . 2 »
Orzesko. *La interrompita kanto*, tradukita de Kabe. . . . . » 75
Perrault (Ch.). *Rakontoj pri Feinoj*, tradukitaj de Sinjorino Sarpy. 1 »
Rakontoj kaj Fabeloj (el Esperantaj Prozaĵoj). . . . . » 25
Sieroŝevski (Vaclav). *La Fundo de l'mizero*, tradukita de Kabe. . » 75
Virgilio. *Eneido*, kantoj I et II, tradukita de D^re Vallienne. . . . » 60

(*Turnu.*)

Digitized by Google

Digitized by Google

A LA MÊME LIBRAIRIE

Tutmonda Jarlibro Esperantista

ENHAVANTA LA

Adresarojn de Dro ZAMENHOF

1906

Cet annuaire paraît tous les ans dans le courant de mars. Il contient : plus de 20000 adresses d'Espérantistes dans le monde entier, les renseignements les plus complets sur les Sociétés de propagation, les livres, les journaux, les publications de toute nature en Esperanto.

Un volume grand in-16, broché . . . . . 2 fr. 50

Internacia Scienca Revuo

Revue mensuelle scientifique rédigée

EN ESPERANTO

Paraissant depuis le 1er Janvier 1904

COMITÉ DE PATRONAGE :

Société française de physique; Société internationale des Électriciens, MM. Adelsköld, Appell, d'Arsonval, Baudoin de Courtenay, Becquerel, Berthelot, Bouchard, Brouardel, Deslandres, Gal Sébert, membres de diverses académies.

RÉDACTION :

P. FRUICTIER

27, boulevard Arago, PARIS

ADMINISTRATION :

HACHETTE & Ko

79, boulevard Saint-Germain, PARIS

ABONNEMENT ANNUEL

France . . . . . 6 fr. 50 | Etranger . . . . . 7 fr.

UN NUMÉRO : 60 centimes.

Dr HELTE. — **Pri la Teorio de l'Jonoj** . . . . . » 30

MENDELEJEV. — **Provo de Kemia Kompreno de l'Monda Etero** . . . . . » 30

1265-05. — Coulommiers. Imp. PAUL BRODARD. — 2-06.

Digitized by Google

457092

VERKARO

DE

V. N. DEVJATNIN

(RUSA ESPERANTISTO)

LIBRO UNUA

PARIS
LIBRAIRIE HACHETTE ET Cie
79, BOULEVARD SAINT-GERMAIN, 79

1906

Tous droits réservés.

Digitized by Google

Digitized by Google

ANTAŬPAROLO DE AŬTORO

En unu feliĉa Maja tago de 1892ª jaro mi iris sur « Granda » strato de Vilno kaj tute akaze ekvidis en fenestro de unu librovendejo tre modestan malgrandan libreton sub titolo « lernolibro de lingvo internacia « Esperanto ». Ankoraŭ pli frue mi sciis pri ekzistado de lingvo internacia (?) « Volapük », kiu estis senfine malfacila por ellernado, — tial mi estis interesigita je nova provo de artefarita lingvo internacia, kaj aĉetis tiun-ĉi libreton, kiu kostis nur 10 kop. — Libreto estis skribita ruse, ĉar aŭtoro definis ĝin escepte por rusoj. Traleginte tre atente malgrandetan lernolibron, mi estis tute frapita per simpleco kaj komprenebleco de ĝia enhavo, kaj tuj mem komencis ellernadi novan lingvon internacian. Post kelkaj tagoj mi jam sufiĉe bone konatiĝis kun « Esperanto », tiom bone, ke mi jam povis skribi al ĝia genia aŭtoro leteron, kiun li baldaŭ respondis, kaj inter ni de tiu tempo komenciĝis tre viva korespandado. Poste S^ro^ Zamenhof elsendis al mi plenan vortaron ruse-esperantan, « Duan libron », gazeton « Esperantisto » (ĝi eliradis en Nurenbergo) kaj ankoraŭ kelkajn libretojn esperantajn. (Literaturo esperanta tiam estis ankoraŭ tre malriĉa!) Ankoraŭ post kelka tempo mi estis enskribita en nombron de esperantistoj (en « adresaro » de D^ro^ Zamenhof), kaj de

Digitized by Google

tiam mi komencis tre fervore laboradi pro nia karega lingvo. Tiun-ĉi laboradon multe helpis mia konatiĝo — proksimume en tiu sama tempo — kun kelkaj esperantistoj, kiuj loĝis tiam en Vilno; unuaj samideanoj, kiujn mi ekkonis, estis sinjoroj Lojko, Nauman kaj Zambrĵickij, kiuj konatiĝis kun Esperanto iom pli frue, ol mi. (S^ro Lojko estis ĵam varmega Volapükisto kaj eĉ havis de ĝia aŭtoro ian diplomon, por kiu li pagis, ŝajnas al mi, 15. rublojn!). Kune kun tiuj-ĉi miaj unuaj amikoj — esperantistoj ni laboradis pro utilo de nia sankta afero sufiĉe fruktoporte kaj varbis kelkajn novajn adeptojn de Esperanto. Dank'al senĉesa influo de tiuj — ĉi miaj amikoj, mi estis en tiu tempo plej laborema kaj, krom propagando de Esperanto, mi komencis mian verkadon : plej frue mi tradukadis rakontojn de grafo Tolstoj (unuaj estis : « Per kio homoj estas vivaj » kaj « Du maljunuloj »), poste mi provis poezion, kaj en Junio de 1892^a jaro tradukis unuan versaĵan — « Anĝelo » (el Lermontov), kiu estis presita en n° 9^a de « Esperantisto » por 1892 j.; tio-ĉi estis mia unua provo, kiu, afable akceptita de nia estimata majstro, estis komenco de tula mia postea verkado.

Proksimume en tiu sama tempo mi konatiĝis per korespandado kun S^ro Grabovskij, kun fraŭlino Manjkovskaja (ĉu ŝi memoras ankoraŭ tiun someron, kiam ŝi gastadis ĉe mi en Gedrojci?), kun D^ro Ostrovskij, kun S^ro L. de Beaufront, L. Lemaire kaj kun multaj aliaj geesperantistoj rusaj kaj alilandaj (el tiuj-ĉi lastaj mi aparte longe korespondadis kun S^ro Riĉard Geoghegan el « Ist Zound

Digitized by Google

de nord-amerikaj unuigitaj ŝtatoj », kiu eĉ ellernadis lingvon rusan). Ciuj tiuj-ĉi amikoj miaj ankaŭ bone min influis, — kaj mi tradukadis kaj verkadis senhalte : unu port alia aperis miaj originalaj kaj tradukitaj verkoj : « Ludilo de Sorto », « Nevola mortiginto », « Demono », « Boris Godunow », « Arturo », « Edziĝo » kaj multe da diversaj malgrandaj versaĵoj...

Sed post granda bruado ĉiam venas silento, — tiel same fariĝis ankaŭ kun mi : ĉiuj miaj amikoj forveturis el Vilno en diversajn lokojn de nia Grandega Rusujo, mi mem, laŭ volo de sorto, estis transmetita ian sovaĝan vilaĝon, kie preskaŭ tute forestis eĉ ia similaĵo je civilizita homaro, kaj mi restis tute sola ; mia familio pligrandiĝis, miaj infanoj jam bezonis edukadon, kaj mi devis pli multe pensi pri miaj devoj familiaj kaj servaj, ol pri Esperanto, — tial mi preskaŭ tute forlasis mian laboradon sur kampo de nia kara afero, aliaj interesoj de vivo min okupis, iom post iom mi komencis tute nerimarkeble forgesadi eĉ pri ekzistado mem de lingvo Esperanto, kaj, fine, mi preskaŭ tute ekdormis...

El tiuj-ĉi teruraj brakoj de bruta dormado min elŝiris mia malnova amiko-esperantisto D^ro A. G. Naŭman : per sia laŭta, kuraĝa kaj bonfavora voĉo li vekigis min kaj igis ree laboradi !... Tielan efektive amikan agon oni neniam forgesas !... Kaj jen mi vekiĝis, renaskiĝis por Esperanto, — kaj nun mi volas ree labori, ree batali kaj aŭ venki aŭ morti kun batalilo en manoj, por ke oni min pardonu por mia kontraŭvola perfido je nia sankta afero !...

Por komenco mi decidis eldoni unuan libron de

Digitized by Google

mia plena verkaro, en kiu mi lokigas preskaŭ trionon da tio, kion mi skribis esperante en daŭro de lastaj 13 jaroj.

Eldonon de mia plena verkaro afable prenis sur sin estimata Pariza firmo « Hachette et C^le^ », kiun mi korege dankas por tio-ĉi, ĉar alie, dank'al multaj malfacilaj cirkonstancoj, mondo esperantista neniam ekvidus miajn verkojn.

Post kelka tempo, se nur nenio min malhelpos, mi inteneas eldoni duan libron, en kiu multaj el miaj malnovaj amikoj inter aliaj trovos kelkajn konatajn por ili verkojn.

Kun komprenebla sento de timemo mi prezentas nun al juĝo de tutmonda esperantistaro unuan libron de mia plena verkaro : ĝi ja estas unua provo en tiu-ĉi direkto, ĝis nun en nia ankoraŭ juna literaturo esperanta forestis tielaj kolektoj, — kaj mi deziras el tuta mia koro, ke tiu-ĉi mia laboro estu feliĉa komenco (*nur komenco!*), ke aliaj geesperantistoj sekvu min kaj en plej mallonga tempo riĉigu nian junan literaturon, por ke ni ĉiuj povu diri, ke nia kara Esperanto havas propran literaturon eĉ pli grandan, ol ia nacia lingvo... Donu, Dio, ke tiu-ĉi deziro plej baldaŭ efektiviĝu!

Oni min kritiku, oni min insultu, aŭ laŭdu, — por mi persone ĝi estas tute egala : komenco estas farita, kaj mi el tuta mia animo invitas ĉiujn geesperantistojn sekvi mian ekzemplon! Ni laboru kaj esperu! Vivu nia karega Esperanto kaj ĝia genia kreinto!...

V. Devjatnin.

Vilno, Junio, 1905ª j.

Digitized by Google

VERKARO

VERSAĴOJ

1. ESPERO

(El Ŝiller.)

Tre multe homar' kun espero en koro
  Pri vivo estonta revadas,
Kaj ĉiam al celo feliĉa kaj ora
  Aliri ĝi baldaŭ voladas.
Jen mondo ekvelkas, jen ree disfloras, —
Sed homo esperon senĉese odoras.

Espero kun ni senaparte vivadas:
  Ĝi knabon dorlotas, junulon
Per sorĉa radio ĝi gaje logadas,
  Konsolas ĉe tomb' maljunulon:
Li, trolacigita per vojo de tero,
Foriras en tombon kun dolĉa espero.

Ho, ne! ĝi ne estas elpenso malvera,
  Per revoj malsaĝaj naskita!
Ni scias, ni sentas kun kredo sincera,
  Ke estos esper' plenumita.

Digitized by Google

Kaj tiu-ĉi sento ĉu estas kapabla
Nin trompi en nia revaĵo agrabla?

---

2. KVAR JARTEMPOJ

I. Bidetas gajege kaj hele naturo :
Ĝin vestas smeralda verdaĵo,
Ĉirkaŭe vidiĝas de vivo plezuro
Kaj ĝojo en ĉiu kreskaĵo.

Kaj suno favore, amike etendas
Al ĉio brilantan radion,
Al ĉio feliĉon, konsolon ĝi sendas,
Vivigas, varmigas ĝi ĉion.

II. Naturo jam estas en luksa disfloro,
Je vivo matura pleniĝas,
Kaj suno simila je globo de oro
En blua ĉielo ruliĝas.

Sed ĝi tro varmege bruligas aeron :
Arbaroj jam pluvon avidas,
Kaj herbo flaviĝas kaj falas sur teron,
De suno sin kaŝi rapidas...

III. Ĉesiĝis jam tute varmego somera,
Naturo malgaje forfloras, —
Kaj ofte en sia malĝojo sincera
Per pluvo senhalta ĝi ploras!

Nur vento ribela, trapike fajfante,
Ŝancelas foliojn kun bruo,
Kaj ilin forpelas, de arboj ŝirante...
Ĉagreno, sopiro, enuo!...

Digitized by Google

IV. Blankiĝas naturo, en neĝo vestita,
Kaj kiel arĝento ĝi brilas;
Per prujno lanuga kaj griza kovrita,
Ĝi je maljunulo similas.
Sed morto severa vidiĝas en ĉio, —
Ĝin forta eĉ frost' ne forigas...
Malvarmo, silento... Kaj suna radio
Nur lumas, sed jam ne vivigas!...

---

3. ŜI ESTAS GAJA

Ŝi estas ankoraŭ malgranda infano,
Ŝin ĉiuj dorlotas kaj amas;
En ŝia vizaĝo, floranta per sano
Gajeco senzorga nur flamas.

Jen jaroj forpasas. Ŝi lukse disfloras,
Ŝin sorto renkontas afable;
Ŝi estas tre gaja, neniam ŝi ploras,
Kaj vivon pasigas agrable.

Rigardu : jen rajdas en cirka areno
Konata al vi belulino, —
Ŝi saltas, ŝi dancas sen deva konveno,
Ĉar estas ŝi gaja fraŭlino!

Kaj ĉiuj laŭtege kriante ŝin laŭdas,
Je ŝia talio admiras,
Ŝin multe elvokas, senfine aplaŭdas,
Al ŝi ornamejon eniras...

Jen domo gajega. En ĝia salono
Belegaj virinoj promenas...,
En tiun-ĉi domon pro vino kaj mono
Tre multaj fraŭlinoj alvenas...

Digitized by Google

Jen vidu : ekfalas sur molan kanapon,
En brakoj de iu sinjoro,
Belega fraŭlino... Jen levis ŝi kapon
Kaj ridas en bona humoro....

Ĉu vi ŝin ekkonis? Tre gaja fraulino!...
Pasie ŝin kisas sinjoro,
Karesas kaj donas pokalon da vino, —
Ŝi trinkas kaj... ridas el koro!...

Post tio forflugas apenaŭ nur jaro,
Kaj ŝin mi denove ekvidis, —
Sed kie? Sur kota drinkeja ŝtuparo
Ĝi staris malsobra kaj ridis....

Foriĝis jam ŝia beleco vizaĝa,
Nenio antaŭa jam restis...
Ŝi min ekrigardis kun vido malsaĝa
Kaj kvazaŭ kontenta ŝi estis.

« Vi eble per brando regali min volas? »
Demandis ŝi min arogante :
« Ĉar vidu... hodiaŭ... mi... iom petolas!... »
Kaj ŝi ŝanceliĝis ridante...

Kaj ĉiam ridanta, kaj ĉiam kontenta,
Vivanta pro mono kaj vino,
Senzorga, senhonta, sensaĝa, sensenta, —
Jen vivo de gaja virino!...

---

4. MALLIBERULO

Ne besto sovaĝa, fermita en kaĝo,
De ĉeno fortika sin ŝiras,
Ne gaja birdeto, kaptita per reto,
Pri freŝa aero sopiras, —

Digitized by Google

De ĉeno sin ŝiras, senfine sopiras
Junulo tre bela, tre brava!...
Predikis li veron, justecon, liberon,
Kaj pensis, ke estas li prava....

Revanto ne vidis, ke ĉiuj nur ridis
Je lia parolo sovaĝa :
Sin amo inspiris, sed ĉiuj rediris,
Ke estas li homo malsaĝa!...

Li multe suferis, li multe esperis,
Li kredis, ke venos libero, —
Kaj ree kun flamo predikis pri amo,
Pri paco tutmonda, pri vero....

Ho, kia eraro! Neniam homaro
Resonos al voko predika :
Homaro — prudenta, kaj estas sensenta
Al voko malforta amika!

Sed li ne silentis : le pensis, li sentis,
Ke homoj lin fine komprenos,
Ke liaj amikoj al liaj predikoj
De ĉie kun ĝojo alvenos....

Kaj jen rezultato : li en kazemato
En ŝarĝaj katenoj nun sidas,
De ĉeno sin ŝiras, senfine sopiras,
Kaj vane liberon avidas. —

---

5. PRINTEMPO

Printempo venas! Vivon donas
Al ĉio belulina veno :
Varmega suno jam proponas
Radiojn siajn, kaj mateno

Digitized by Google

Vizaĝon belan kun rideto
Al ĉiuj montras; jam de montoj
Kun bruo fluas rivereto,
Kaj detruataj estas pontoj....

Denove ĉio reviviĝas,
Kantadas venon de printempo....
Por mi nur daŭras, ne finiĝas
Malbona, malvarmega tempo!
Por mi forestas suna lumo,
Kaj de printempo bela veno
Nenion donas... Nur mallumo,
Mallumo sola kaj ĉagreno!...

---

6. AL LABORISTO

(El Foss.)

Ho, frnto! Dum vi laboradi
Ankoraŭ povas sen ripozo,
Ne volu manon etendadi
Al bonaj homoj pro almozo.

Sed kiam de kruela sorto,
Ho, mia mizerega frato,
Foriĝas tuta via forto, —
Vi vin mortigu per malsato.

---

7. INFANO DE ZORGO

(El Gerder.)

Finiĝis varmega jam tago,
Kaj nokto agrabla fariĝis,

Digitized by Google

Sub ombra cipreso, ĉe lago
Diino de Zorgo sidiĝis.

El ruĝa argilo Diino
Malgaje figuron skulptadis, —
Kaj luno, de nokto reĝino,
De blua ĉiel' rigardadis.

Jen Zeŭso al bela Diino
Parolis kun dia favoro :
« Rakontu, malgaja knabino,
Pri via doloro en koro?

« Ho, Zeŭso, Diino rediras :
Alportu al mi vi plezuron!
De vi mi nur solan deziras :
Vivigu vi mian figuron! »

— Volonte! Mi vin kontentigos :
Viviĝas figuro jam via!...
Sed tamen de nun mi devigos,
Ke estu eterne ĝi mia! —

« Ho, ne! Al li Zorgo parolas :
Figuron mi longe skulptadis,
Al vi mi ĝin cedi ne volas,
Ĉar ĝin mi por mi preparadis!

Por mi ĝin restigu! « korege
Ŝi Zeŭson potencan admonis.
— Ho, ne! mi ĝin amas varmege,
Al ĝi ĉar animon mi donis! —

« Pro kio disputon vi tenas? »
Subite la Ter' al li diras :
Al mi ĝi sen dub'apartenas,
Ĉar tera en teron foriras! »

Digitized by Google

Kaj dioj disputis senfine,
Ĉar cedi neniu deziris
Figuron argilan, — sed fine
Al Kron' ili ĉiuj ekiris.

« Ĉar unu al dua ne volis
Figuron vi tiun-ĉi cedi, — »
Grishara Saturn' elparolis :
« Vi kune ĝin povas posedi. »

« Aŭskultu-do, dioj : nur kiam
Ĝi mortos, anim' aportenos
Al Zeŭso potenca, — kaj tiam
Jam Ter' ĝian korpon alprenos.

Kaj vi, ho, de Zorgo Diino,
Ĝin povas posedi ĝis morto!... »
Mi pensas, ke tia difino
Similas al homa la sorto?...

---

8. DEKTRIA NUMERO

Li estas krimulo!... Mallevis li kapon,
Pri vivo pasinta pensante,
Malsupren al brovoj surŝovis li ĉapon,
Kaj iras, per ĉenoj sonante....

Vi pensas, kredeble, ke estas li homo?
Ho, vane! ĝi estas malvero :
Li estas nur ia vivaĵo sen nomo,
Cifero, « dektria numero »...

Piedojn kaj manojn katenoj turmentas,
Animon plenigas doloro,

Digitized by Google

En korpo malsana malvarmon li sentas,
Sopiron grandegan en koro.

Li forte laciĝis, ripozi li volas,
Kaj jen li sidiĝas sur tero...
« He, vi!... sonas krio : vi ree petolas?!...
Vin levu, « dektria numero »!

Kaj ree li paŝas, per ĉenoj sonante,
Kaj ree sopiras sen fino,
Pri celo de sia vojaĝo pensante,
Pri domo, infanoj, edzino....

Rapide traflugas en lia memoro
Pentraĵoj de vivo mizera...
Kaj ree en korpon penetras doloro,
En koron — turmenta infera!...

En malliberejo malluma, malpura,
Senkulpe ŝlosita li estis, —
Kaj tie en stato malbona, terura
Kvin jarojn longegajn li restis!

Li jam humiliĝis al juĝo malvera,
Kaj nur liberiĝon avidis, —
Sed vane : subite lin sorto severa
Denove kruele jeridis...

En malliberejo fariĝis ribelo, —
Al ĝi ankaŭ lin oni igis...
Sed oni neniom aliris ol celo,
Por ĉiam nur sin pereigis....

Kaj jen rezultato!... Mallevis li kapon,
Pri vivo pasinta pensante,
Malsupren al brovoj surŝuvis li ĉapon,
Kaj paŝas, per ĉenoj sonante.

Digitized by Google

Vi kredas sendube, ke estas li homo?
Ne kredu, — ĝi estas malvero :
Li estas nur ia vivaĵo sen nomo,
Cifero, « dektria numero »...

---

9. HETMANO (suĵeto estas pruntita).

(Poemo.)

En senviva arbaro vivas brava anaro
Da rabistoj kun sia hetmano.
Li, ankoraŭ junulo, estas glora bravulo
Kaj ĵam tenas potencon en mano.

Ĉiuj multe lin timas, lian saĝon estimas,
Lian vivon zorgeme prigardas,
Li-do estas severa, malkontenta, kolera,
Kaj rabistojn fiere rigardas.

En pasinta somero li kun muta kolero
Patran domon forlasis por ĉiam,
Kredi veron li ĉesis, sanktan Dion forgesis,
Kaj rabisto fariĝis de tiam.

Li el mondo forkuris kaj solene li ĵuris
Senkompate forvenĝi homaron,
Kaj kun tiu-ĉi ĵuro kruelega, terura,
Li foriris senvivan arbaron.

En arbaro sur fundo de kavego profunda
Lin okaze rabistoj renkontis :
Forkurinto mizera kun konfido sincera
Lian sorton al ili rakontis.

Lin rabistoj komprenis kaj tuj mem lin alprenis,
Kiel membron de bando ilia,

Digitized by Google

Sed tre baldaŭ bandano mem fariĝis hetmano,
Komandanto de aro malpia.

Li, kruela, kuraĝa, kvazaŭ besto savaĝa,
Al pasantoj kuradis renkonte,
Kaj, kaptante oferon, ĝin ĵetadis sur teron
Senkompate, senkore, senhonte.

Eĉ rabistoj malvarmaj iafoje kun larmoj
Kruelecon hetmanan rigardis,
Sed, ĉe vido de brilo sur lakita tranĉilo,
Ion diri al estro sin gardis.

Foje unu bandano pri senkulpa infano
Senkompatan hetmanon ekpetis,
Sed per propra lin mano taj mortigis hetmano
Kaj al hundoj por manĝo forĵetis...

Lin jam serĉis polico, kaj kun lerta malico.
Grandan monon promesis al tiu,
Kiu vivan lin trovos, aŭ mortigi nur povos,
Sed lin trovis, mortigis neniu.

Longe vagis sen baroj en senvivaj arbaroj
Nekaptebla hetmano kuraĝa,
Kaj mokeme nur ridis, kiam aŭdis aŭ vidis,
Ke lin serĉas polico sensaĝa.

Unu fajon lin trovis kaj mortigi eĉ provis
Du tro lertaj, kuraĝaj soldatoj,
Sed hetman' ilin ligis kaj kun si veturigis.
En tendaron de siaj kunfratoj.

Malfeliĉaj kaptitoj estis forte vergitaj
De hetmano en densa arbaro,
Kaj post tiam bandanoj kun katenoj sur manoj
Ilin sendis kun rid'al estraro.

Digitized by Google

Kaj estraro kolora en indigno sincera
Nepre kapti krimulon intencis :
Kun decido tiela kontraŭ bando ribela
Ĝi regulan militon komencis.

Kaj subite arbaro, ĉirkaŭita per baro
El soldatoj tre bone armitaj,
Estis tute simila je grandega kaptilo
Kun bestegoj en ĝi enŝlositaj.

Al rabistoj kaptitaj venis spertaj senditoj
Kun propono de plena pardono,
Se nur ili sen vorto humiliĝos al sorto
Kaj hetmanon fordonos pro mono....

— Nu; amikoj-kunfratoj, nin ĉirkaŭis soldatoj,
Diris brava hetmano fiera :
— Humiliĝu al sorto, ĉar minacas vin morto, —
Mi ĝin diras el koro sincera!

— Mi konsilas vin cedi, ĉar ne povas mi kredi,
Ke vi estas kapablaj al grando...
Ekrigardu, kunfratoj : en arbaro soldatoj
Nin ĉirkaŭis de rando ĝis rando.

— Vin soldataj mortigos, aŭ po unu kunligos
Kaj elternos el via arbaro,
Sed se vi nur deziros, vi liberaj eliros
Kaj kun mono el tiu-ĉi baro....

— Nu, malpiaj bandanoj, jen al vi miaj manoj
Senarmitaj kaj jam sendanĝeraj :
Ligu ilin sen timo, kaj kun gaja animo
Iru for el arbaro liberaj!...

Lin respondis neniu, — sed en brusto de ĉiu
Frapis koro per sento kolera....

Digitized by Google

— Vi obstine silentas? Ĉu kun mi vi konsentas? —
Diris ree hetmano fiera.

Kaj tuj mem sonis krio : « nin devigos nenio
De hetmano foriri perfide!
Ni hetmanon estimas, ni danĝeron ne timas!
Ni batalon deziras avide!... »

Kaj senditoj kaptitaj estis tuj disŝiritaj
De rabistoj kun krio sovaĝa...
Tiam juna hetmano kun tranĉilo en mano
Proksimiĝis al bando kuraĝa.

Jen li ĉapon formetis, ĝin sur teron li ĵetis
Kaj per brusto ondanta enspiris :
Kaj memfide, kun vido de kuraĝa decido,
Al rabistoj solene li diris :

— Venis tempo fatala de kruela batalo :
Ni atendas aŭ venkou, aŭ morton,
Nin danĝero minacas, kal al vi mi donacas
Mian kapon, kaj koron, kaj forton!

— Sed mi kredas, kolegoj, ke eĉ grandaj nubegoj
Da soldatoj kun trafaj pafiloj
Nun disflugos por ĉiam kaj batalos neniam
Kontraŭ niaj brilantaj tranĉiloj!...

Kun konfido anima kaj kun ĝojo senlima
Lin salutis rabistoj — kunfratoj :
« Vivu estr' estiminda! Vivu frato aminda!
Forpereu malnoblaj soldatoj!... »

Kaj en nokto senstela tuta bando ribela
Sian neston malluman forlasas....
Rampas ventre kunfratoj, kaj simile je katoj
Ili mute, senbrue trapasas....

Digitized by Google

Jen ekpafo trasonis... bando tuĵ ĝin ekkonis :
Por komenco ĝi estas signalo...
Kaj rabistoj atakas : pafas, tranĉas kaj hakas...
Komenciĝis kruela batalo!..

Kiel iaj demonoj saltas lertaj friponoj,
Eksvingante per akraj tranĉiloj....
Kaj batalon bruantan, homan sangon fluantan
Kaŝas nokto sub nigraj flugiloj...

En mateno-dŏ frua estis ĉio senbrua,
Hele suno suriris brilanta...
Sed ĝi sangon ekvidis, kaj foriri rapidis
Sin kovrinte per nubo fluganta...

Kaj en tuta ĉielo tuj fariĝis ribelo :
Fulmotondro eksonis kolere,
Nigraj nuboj ekbruis kaj pluvego ekfluis,
Pri mortintoj plorante sincere...

Kaj per larmoj naturaj homaj agoj teruraj
Estas iom post iom lavataj...
Nur sur loko fatala, kie estis batalo,
Restos longe skeletoj soldataj....

. . . . . .
. . . . . .

Multaj jaroj forpasis. Jam hetmano forlasis
Sian bandon kaj sian metion.
Li senfine sopiris, en dezerton foriris,
Kaj en ĝi rememoris li Dion.

Lia vivo sencela, malprudenta, ribela
Elpentriĝis en lia memoro :
Ĉiam vivis li krima kun malpura animo,
Sen espero, sen kredo en koro.

Nun malpia krimulo jam ne estas junulo, —
Baldaŭ venos jam morto severa,

Digitized by Google

Poste — juĝo de Dio... Lin pravigos nenio,
Ĉar ne kredis li, vermo fiera!...

En senlima sopiro lin vizitis deziro
Formortigi sin mem, kiel hundon...
Kun decido tiela en animo ribela. . . . . .
Li eniris kavegon profundan. . . . . .

. . . . . .

Lia mano tremanta kun tranĉilo brilanta, . . .
Jam sin levis al gorĝo sulkita...
Unu movo de mano — kaj por brava hetmano
Estus ĉio por ĉiam finita!...

Sed subite formetis li tranĉilon kaj ĵetis
Ĝin rapide kun forto sur teron :
Li eksentis kun ĝojo je unua nur fojo
En mizera animo esperon...

Li de ĝojo ekploris, ĉar li tuj rememoris,
Ke li povas formorti kun gloro :
Lia vivo rompita estas alte taksita
De estraro per multo da oro..

Li ekĝemis facile, al ĉielo humile
Siajn manojn li pie etendis,
Kaj kun kredo kreskanta al Potenca Juĝanto
Sian preĝon unuan li sendis.

Tiu preĝo sincera por hetmano fiera
Estis ĝusta saniga balzamo :
Nun, anstataŭ sopiro, lin vizitis deziro
De reveno al bono, al amo...

Kaj terura rabisto al malriĉa botisto
Venas nokte kun stranga propono :
« Vi fortike min ligu kaj en urbon venigu,
Kaj ricevos vi multe da mono. »

Digitized by Google

Malriĉulo ekmiris : «'Ĉu ne estas, li diris,
Vi freneza, amiko amata?! »
— Ne, mi estas en sano, — sed mi estas hetmano
De rabistoj, krimulo sciata....

. . . . . .
. . . . . .
. . . . . .
. . . . . .

.... Jen en mezo de placo, kiel morta minaco
Por senkoraj scivolaj vidantoj,
Staras alta Pendingo, ĉirkaŭita per ringo
De senmovaj policaj gardantoj.

Kaj subite murmuro de nevola teruro
Sonis brue en popolamaso :
Sur pendinga submeto kun feliĉa rideto
Maljunulo aperis malgrasa....

Jen per mano tremanta kun kateno sonanta
Sanktan signon de kruco li faris,
Kaj kun vido trankvila en vizaĝo humila
Sin al morto kruela preparis.

Oni donis signalon... Kaj en maŝon fatalan
Estas kapo grizhara metita....
Kelkaj movoj malfortaj, konvulsioj postmortaj,
Kaj spektaklo jam estas finita!...

El bluaĵo ĉiela lumas suno tre hela
Per radioj varmegaj brilantaj...
Ĉio estas silenta, ĉio estas kontenta,
Kaj senbrue disiras vidantoj...

Digitized by Google

10. SUR STRATO

(Sceno el efektiva vivo.)

Sur strato promenas gravega sinjoro :
Li ĵus fortagmanĝis, kaj iras kontenta,
Kun plena ventrego, kun ĝojo en koro,
Senzorga, trankvila, fiera, sensenta.

Subite al li knabineto aliras.
Malgrasa ŝi estas, en vesto malriĉa, —
Plorante, ŝi manon etendas kaj diras :
« Ho, donu almozon al mi, malfeliĉa! »

— For, for, abomena, senhonta knabino!
Labori vi devas, almozon ne petu!...
Vin sendis, kredeble, malĉasta patrino
Por ke je almozo vi brandon aĉetu?

« Ho, ne, estimata, aminda sinjoro!
Patrino... ho, mia karega patrino!
Ŝi, eble, jam mortis en tiu-ĉi horo,...
Malsana ŝi estas... — Ne, truda knabino,

Foriru, foriru! Al via rakonto
Ne kredas mi tute : ĝi estas malvera.
For, for! ne mensogu! Al vi estas honto
Pasantojn trompadi per vido mizera!.. »

Kaj ree promenas gravega sinjoro
Kun plena ventrego, kun vido kontenta,
Kun nigra animo, kun ĝojo en koro,
Feliĉa, trankvila, fiera, sensenta....

Digitized by Google

II. NAJTINGALO

(Malgrandrusa kanto.)

Ne pepadu, najtingalo,
En mateno frue,
Ne pepadu, malgrandeta,
Sub fenestr' proksime...

Via kanto estas bela,
Vi bone kantadas,
Vi, feliĉa, jepariĝis
Kaj nesteton havas.

Mi, mizera, malfeliĉa,
Sen nesto, sen paro, —
Kaj ne povis mi en mondo
Kun ĝojo kantadi.

Flugu, kantu vi al tiuj,
Kiuj bone vivas :
Ili de kantado via
Multe amuziĝus.

Sed al mi kantado via
Bruston nur disŝiras,
Koron pikas, kaj animon
Turmentas senfine!...

Strigo — birdo por mi restu :
Ĝi ploras, ne kantas....
Ploru, strigo, kaj ĝemegu,
Morton al mi voku!...

Digitized by Google

12. FROSTETO

(Rusa kanteto.)

Ho, frosteto kara,
Rusa vi bravulo!
Iras vi en gantoj
Kaj en fela ĉapo!
Ho, frosteto kara
Kun vangetoj ruĝaj!
Korpon vi frostigas,
Sed anim' varmiĝas!
Ĉu frostet' memoras,
Kiam kun knabino
Sur glitveturilo,
Kvazaŭ birdo, flugis
Mi en nokt' malluma?
Kaj al mi mallaŭte
Ŝi kun am' murmuris :
« Vi frostiĝis, kara?
Apud mi kuŝiĝu,
Mi vin tuj varmigos!... »
Pelton ŝi malfermas, —
Kaj ĉe blanka brusto
Bone mi varmiĝas!...
Ŝiaj okuletoj
Fajreretojn ŝutas,
Kaj vangetoj ŝiaj
Kvazaŭ flamo brulas, —
Mia fajra koro
Ankaŭ ekbruliĝas....
Ho, frosteto kara,
Rusa vi bravulo,
Ja por mi vi ĉiam
Estis frat' amindą!

Digitized by Google

13. FASTANTOJ

(Fablo.)

Profite en urbo sekalon vendinte
Kaj monon por ĝi ricevinte,
Antono reiris kun ĝojo
Al hejmo. Subite sur vojo

Rabistoj duope al li alŝteliĝis.,.
De ili forkuri rapide li penis,
Sed ili lin kaptis, kaj monon deprenis,
Kaj poste, lin mem mortiginte, foriĝis.

Lasinte arbaran densejon,
Rabistoj eniris drinkejon.
Al ili mastro brandon donas,
Kolbason, ŝinkon li proponas...

Sed unu rabisto al mastro rediras :
« Vi estas sendube tre granda pekulo, —
Je via propono senfine mi miras!...
Forgesis pri tio vi, senprudentuto,

Ke fasto hodiaŭ ja estas, —
Ĝi sankta por ni ĉiam restas.... »
. . . . . .
Ĉu ne ekkonas vi, legantoj,
Vin mem en tiuj-ĉi fastantoj?

---

14. HUSARO

(El Puskin.)

Ĉevalon sian li purigis,
Estante forte kolerega,

Digitized by Google

Kaj diris : « min diabl' devigis
En loko loĝi malbonega!

Ni ĉiam tie-ĉi restadas
En turka kvazaŭ batalado :
Nur solan supon ni manĝadas
Kaj eĉ ne pensas pri drinkado.

Kaj mastro tie-ĉi malbona,
Malbonan havas li edzinon...
Nek via skurĝ', nek vorto bona
Admonas tie-ĉi virinon!..

Jen urbo Kiev! lando kia!
En buŝon falas mem buletoj,
Kaj vinon havas domo ĉia, —
Kaj kiaj tie virinetoj!...

Ne estas eĉ domaĝ', je Dio,
Sin mem pro ili pereigi!,..
Malbone estas nur per tio.... »
— Per kio? Volu min sciigi! —

Kaj li komencis plibonigi
Lipharon. » Eble ne timulo —
Li diris — estas vi, sed igi
Vin miri povas mi — spertulo. »

« Aŭskultu : regimento nia
Ĉe Dnepro larĝa enlokiĝis.
Mastrino estis bona mia,
Kaj tombon ŝia edz' foriĝis.

Kun ŝi mi baldaŭ amikiĝis;
Ni vivis pace, tute bone,
Al mi Mario humiliĝis,
Ne diris vorton eĉ malbone.

Digitized by Google

Se mi malsobra estis tute,
Ŝi mem min zorge kuŝigadis;
Ŝi ĉiam pace, sendispute
Je ĉio tuj mem konsentadis

Feliĉan vivon mi pasigis,
Kaj longe tiel vivus eble, —
Sed jen subite ĵaluzigis
Min io, — mem diabl' kredeble.

Mi pensis : kial baptanino
Sin levas nokte? Kiu volas?
Tre juna estas ŝi virino
Kaj tial, eble, ŝi petolas!...

Mi observadi ŝin intencis.
Jen foj' ne dormis mi (en korto
Jam estis nokto, kaj komencis
Bruegi vent' kun granda forto).

Kaj vidas mi : ŝi forrampetis
De forno, prenis ŝi karbeton,
Min tre facile pripalpetis
Disblovis apud forn' fajreton;

Ŝi ekbruligis kandeleton,
Kun ĝi angulon ŝi foriĝis,
De tie prenis boteleton,
Sur balailon ŝi sidiĝis,

Ŝi senvestiĝis, kaj sorbinte
El boteleto, ŝi tra tubo,
Sur balailo sidiĝinte,
Tuj malaperis, kvazaŭ nubo!

« Ŝi eble estas sorĉistino »,
Mi pensis, kaj de forn' rapidas,

Digitized by Google

Por vidi sorĉon de virino;
Kaj jen mi boteleton vidas.

Mi flaris : ia acidaĵo...
Mi plankon verŝis el botelo :
Forflugis — kia mirindaĵo! —
Kaj forna forko kaj sitelo!

Sub benko katon mi ekvidis,
Sur ĝin mi ŝprucis el botelo :
Ĝi ternis tuj kaj ekrapidis
Subite fornon post sitelo.

Sur ĉion ŝprucis sen kompato
Jam mi per tuta forto mia, —
Kaj ĉio : tablo, benko, pato
Forflugis unu post alia.

Al ili mi ne volis cedi, —
Kaj trinkis mem per unu fojo
Restaĵon... Ĉu vi povas kredi?
Mi ekaperis tuj en vojo :

Mi flugis, — kien? mem ne sciis,
Kun forto tranĉis nur aeron,
Al steloj mi : « pli dekstren » kriis...
Kaj jen ekfalis mi sur teron.

Jen mont'. Sur ĝi kaldronoj bolas
Kaj oni faras ian ludon :
Kantadas, fajfas kaj petolas,
Kun granda ran' edzigas judon.

Mi kraĉis... Flugas jen Mario :
« For! hejmen kuru, petolulo!
Vin oni tuj formanĝos!.. » — Kio?!
— Nu, mi ne estas timemulo :

Digitized by Google

Vi ne kriegu! Kie vojo
Al hejmo estas? — « Jen sidiĝu
Sur fornan feron, — kun malĝojo
Respondis ŝi, — kaj tuj foriĝu!.. »

— Vi volas, ke husar' sidiĝu
Sur fornan feron? Baptanino,
Mi petas vin, ne freneziĝu,
Ne estu vi malsaĝulino!...

— Ĉevalon!... « Prenu, malsaĝulo! »
Ŝi efektive diris veron :
Jen antaŭ mi ĉeval' — brabulo
Per hufo forte batas teron.

Sidiĝas mi kun brava vido
Sur ĝin kaj trovi bridon penas,
Sed vane! Rajdas mi sen brido —
Kaj tuj.. al forno mi alvenas.

Kaj jen mi tion saman vidas...
Ĉevalo tute jam forestas,
Kaj mi sur benko rajde sidas :
Jen kia strang' okazo estas! « —

Kaj li daŭrigis plibonigi
Lipharon. « Eble ne timulo, —
Li diris, — estas vi, sed igi
Vin miri povas mi — spertulo. »

---

15. GARANTIO

(El Ŝiller.)

Damon' unu fojon mallaŭte trairis
Kun akra tranĉilo sub bask' al tirano —

Digitized by Google

Al Dionisio, — sed unu gardano
Lin kaptis subite. Tiran' al li diris :
« Pro kio al mi vi, bastardo, aliris? »
— Mi sanktan promeson ekvalis plenumi... —
« Krimulo! mi tuj vin ordonos krucumi! »

— Jam longe al morto mi estas pretita,
Kaj, kredu, ne diros mi eĉ unu vorton
Pro mia pardono, ĉar havas mi forton,
Por morti sur kruco; sed se inklinita
Vi estas al bono, — ho, estu donita
Al mi kelka tempo, por fraton edzigi, —
Ĉe vi — do mi povas amikon restigi. —

Kruele ekbrilis tirana rigardo,
Kaj jenli eldiris post kelka silento :
« Tre bone, kun tio mi estas konsenta;
Sed bone vi tamen memoru, bastardo,
Ke vian amikon mi tenos sub gardo
Ne pli, ol tri tagojn, — kaj poste li mortos,
Al vi li per tio pardonon alportos. »

Al sia amiko Damono alvenis
Kaj diris : « tiran' min aljuĝis krucumi,
Ĉar volis mi sanktan promeson plenumi...
Kaj mi nur tri tagojn ricevi elpenis
Por fraton edzigi... » Kaj li ĉirkaŭprenis
Amikon kaj petas : « Ho, restu, karulo,
Vi por garantio ĉe malbonegulo! »

Amiko volonte konsentis, kaj restis
En malliberejo li por garantio,
Kaj tuj liberigis Damonon per tio....
Damono edziĝon de frato forfestis,
En tria mateno tre frue sin vestis
Kaj vojon rapidas, malfrui timante
Kaj ĉiam pri sia amiko pensante...

Digitized by Google

Subite tre forta ventego fariĝis,
Kaj tondro, kaj fulmo, kaj granda pluvego;
Pli forte, pli brue koleras ventego, —
Kaj jen riveretoj de mont' ekruliĝis,
Riveron plenigis, kaj ĝi ekondiĝis....
Damono al ponto rapidas de monto, —
Kaj vidas, ke estas rompita jam ponto.

Li vagas sub pluvo sur bord' de rivero,
Kaj tre malproksime li vidas dometon;
Li krias, li vokas, li petas ŝipeton,
Sed vane, — neniu ĉar kun malespero
Ekvolos batali kun brua rivero....
Kaj baldaŭ rivero jam aliformiĝis :
Je maro ĝi larĝa simila fariĝis.

Kaj jen lian koron plenigis doloro —
Li ploras, antaŭen li manojn etendas,
Kaj preĝon varmegan al Zeŭso li sendas :
« Kompatu! — li petas kun granda fervoro —
Kaj min ekrigardu kun dia favoro!
Se al Sirakuzoj vi min ne alportos,
Ho! mia amiko senkulpe ja mortos! »

Sed vane kompaton de Zeŭso li petas :
Ventego, kaj ondoj, kaj pluv' ne ĉesiĝas,
Sed ĉiam pli fortaj, teruraj fariĝas, —
Kaj tempo forpasas... Damono formetas
De si sian veston, kuraĝe sin ĵetas
En bruan riveron kaj naĝas, tranĉante
Per brusto nur ondon, kun mort' batalante...

Kaj jen li jam estas sur bordo, — elŝiris
Sin mem li el brakoj teruraj de morto,
Kaj multe dankem' al favoro de sorto
Rapidas li plu.... Sed subite eliris
El granda arbaro rabistoj. Aliris

Digitized by Google

Al ili Damono, — kaj ili malpace
Ĉirkaŭis lin tute, rigardas minace.

« Ho, kion vi volas, krimuloj? — li diris —
Ankoraŭ ne scias, friponoj, vi tion,
Ke, krom ŝarĝa vivo, mi havas nenion, —
Sed vivo ne estas jam mia! » Li iris
Al ili, de unu bastonon elŝiris,
Per ĝi li eksvingis, kaj tri formortigis,
Aliajn — do ĉiujn facile forigis.

Sed suno post pluvo varmege bruligis
Migranton, kaj tute li perdis jam forton,
Kun granda teruro atendis li morton, —
Kaj preĝis li Zeŭson : « vi min liberigis
El ondoj bruegaj, de mi vi forigis
Rabistojn, — ĉu tie-ĉi devas suferi
Mi vane kaj morti, amikon oferi?!... »

Kaj — kio-do? — ŝajnas al li, murmuretas
Ne tre malproksime malgranda rivero :
Rapide sin turnas al ĝi kun espero
Damono — kaj vidas, ke fonto fluetas.
Al ĝi superforte li tuje vagetas,
Soifon brulegan kun ĝoj' kvietigas
Kaj korpon malsanan en ĝi refreŝigas

Jam suno varmega majeste subiras
Kaj ombroj longegaj kuŝiĝas sur tero :
Tre baldaŭ jam venos trankvila vespero.
Sur vojo al urb' du migrantoj jen iras,
Damono — do ilin sur voj' preteriras.
Migrantoj parolas, Damono aŭskultas
Kaj aŭdas : « nun lin oni jam ekzekutas!... »

Tumulto piedojn al li flugiligas, —
En lia animo — senfinaj teruroj....

Digitized by Google

Kaj jen Sirakuzoj! Nur suprojn de turoj
Malalta jam suno facile origas :
Jam estas vespero!... Kaj li rapidigas
Ankoraŭ pli paŝojn, — kaj vidas — en strato
Renkontas lin lia servant' Filostrato.

— Revenu, ĉar ĉio jam estas finita!
Li diris malgaje : — en urbon ne iru,
Mi petas vin, el Sirakuzoj foriru!
Li estas jam al ekzekuto metita.
Li kredis ĝis fin', ke li estos trompita
Neniam de sia amik', kaj nenio
Lin povis devigi ne kredi je tio... —

« Ho, se jam malfrui al mi estas sorto,
Kaj se mi ne povas de mort' liberigi
Amikon, mi devas min ankaŭ mortigi :
Tirano ne diru, ke kuris de morto
Mi nur dank' al mia anima malforto!
Al vi mian vivon volonte mi cedas,
Sed sciu, ke homoj kaj amas, kaj kredas!... »

Vespere Damon' Sirakuzojn eniras
Kaj vidas, ke kruco sur placo jam staras,
Kaj oni jam tute amikon preparas,
Por lin ekzekuti... Kun forto traŝiras
Amason popolan Damono kaj diras :
« Mi morton deziris de Dionisio, —
Mi estas krimulo, li — nur garantio! »

En granda mirego popol' silentiĝas...
En ĝojo amikoj tuj sin ĉirkaŭprenas,
Kaj ploras, — pri kio — neniu komprenas,
Sed larmoj el ĉiuj okuloj ruliĝas....
... Minaca tirano pri ĉio sciiĝas;
Li je amikeco tiela tre miras
Kaj verajn amikojn li vidi deziras.

Digitized by Google

Kaj jen ili venas. Kun vido afabla
Tirano renkontas amikojn kaj diras :
« Vi tute min venkis, senfine mi miras!...
Mi estas ankoraŭ por amo kapabla,
Kaj se mi ne tute al vi malagrabla,
Permesu al mi, ke en ligo mi via,
Amikoj varmegaj, por vi estu tria! »

NEVOLA MORTIGINTO

(Rakonto.)

I. Varmega tago jam finiĝis,
Tre bela sun' adiaŭ diris
Al tero, kajal proksimiĝis
Trankvila nokto. Mi reiris
Al domo mia kaj koleris,
Ĉar tutan tagon mi ĉasadis,
Kaj mia ĉaso ne prosperis :
Mi eĉ ĉasaĵon ne vidadis.
Sur mia voj' en unu loko
Al lago venis mi, kaj vidas
Sur ĝia bordo kun fiŝhoko
Konata maljunulo sidas.
Mi lin salutis : « helpu Dio! »
— Mi dankas, — maljunulo diras.
« Nu, eble, vi, pro kompanio,
Kun mi jam hejmen kune iras? »
— Ho, ne, sinjoro! mi intencas
Tre longe sidi, — dankas kore;
Vi finis ĉason, mi komencas, —
Nenion kaptis mi ankoraŭ.
Sed eble vi malmulte provos
Fiŝetojn kapti? Mi fiŝhokon

Digitized by Google

Provizan havas, tial povos
Al vi mi servi, — prenu lokon. —

Mi tuj konsentis, ĉar laciĝis
Mi kaj apenaŭ mi iradis, —
Fiŝhokon prenis kaj sidiĝis
Sur laga bord'. Ni paroladis
Pri mia ĉaso malprospera.
Al maljunulo mi rakontis
Kun fajro forta kaj sincera
Pri tio, kion mi renkontis
En ĉaso, li do tre atente
Rakonton mian aŭskultadis
Kaj nur korkaĵon diligente
Sur akvsupraĵo observadis. —

II. Mi eksilentis. Maljunulo
Fiŝhokon sian plibonigis
Kaj diris : « kiam mi junulo
Ankoraŭ estis, mi pasigis
En ĉaso tutan tempon mian.
Sed nun mi ĉasi tute ĉesis,
Forĵetis eĉ pafilon mian,
Kaj kiel tenì ĝin — forgesis. »
Je tio miris mi kaj petis,
Ke li sciigu min, pro kio
Pafilon, ĉason li forĵetis?
« Tre longa estas historio ! »
Al mi malgaje li rediris,
Per griza kapo balancante,
Kaj li subite eksopiris,
Rakonti, ŝajne, ne volante.
Sed jen silenton li ĉesigas
Kaj, cigareton ekfumante,
Komencis : « eble vi devigas
Min rakontadi, atendante

Digitized by Google

Ekaŭdi ĝojan historion?
Se tiel estas, mi certigi
Vin devas, ke al vi nenion
Tre gajan povas mi sciigi! »
— Vi vane tiel opinias, —
Rediris mi al maljunulo.
« Ne vane, ĉai mi bone scias,
Pri kio pensas eĉ junulo! »
Kaj ree li eksilentinte,
Fiŝhokon sian plibonigis;
Sed post momento, ekĝeminte,
Li jam sen halto ekdaŭrigis.

III. « Aŭskultu. Antaŭ dudek jaroj
Mi ofte kun pafil' ĉasadis,
Kaj jen en tiuj ĉi arbaroj
Mi multajn tagojn pasigadis.
Ankoraŭ tiam troviĝadis
Multego da sovaĝaj kaproj,
Kaj en arbar'sin renkontadis
Eĉ ursoj kaj teruraj aproj.

Jen iam vintre en mateno
Sur kampo, apud mem arbaro
Ĉasistoj estis en kunveno.
Mi ankaŭ estis. Jam hundaro
De ĉeno forte sin ŝiradis
Kaj, ne havante paciencon,
Aeron frostan nur flaradis,
Sentante baldaŭ jam komencon.
Ni ankaŭ, ĉason atendante,
Malpaciencaj jam fariĝis,
Kaj, tre mallaŭte parolante,
En ĉeno ĉiuj ni stariĝis...

IV. Subite en densejo sonis
Trumpeto forta, — mi ektremis :

Digitized by Google

Per tio ĝi signalon donis,
Ke estas ursoj.., Mi ekpremis
Pafilon mian kaj instinkte
Nevole ĉirkaŭ ekrigardis :
De mi proksime, sin arminte
Tre bone, oficiro staris.
En manoj tenis li pafilon,
Ĉe zono larĝa kaj lakita
Pistolon havis kaj tranĉilon.
Mi estis tute konvinkita,
Ke tiel brava militisto
Sendube estas kuraĝulo,
Ke vera estas li ĉasisto
Kaj tial estos ne timulo;
Sed bedaŭrinde mi eraris!...
Mi tamen devas plu rakonti...
... Mi ĉe arbara rando staris
Kaj urson tie ĉi renkonti
Mi tre esperis, ĉar mi scias
Kutimojn ursajn... Jen mi aŭdas, —
Al mi « vin gardu » iu krias...
Antaŭen bone mi rigardas
Kaj, — kia granda mirindaĵo! —
Subite mi proksime vidas
Ursegon : ĝi en arbetaĵo
Senmove kaj silente sidas
Kaj kvazaŭ pensas, kien devas
Ĝi kuri? ĉie estas baro...
Jen multepeze ĝi sin levas
Kaj tuj eliras el arbaro.

V. Mi kelkajn paŝojn posten faris,
Min al pafilo jam almetis,
Kaj urson pafi min preparis,
Sed... ho, teruro! mi faletis
Je ŝtipo kaj subite teron

Digitized by Google

Mi tute falis kaj... ekpaſis...
Por mi ekvidis mi danĝeron
Grandegan : urson mi ne traſis!
Ĝi tre rapide kun kriego
Sur min sin ĵetis kaj kun forto
Min premis, ŝiris per ungego...
Jam tre proksime estis morto!...
Mi oficiron ekrigardis —
Kaj kun teruro mi ekvidis,
Ke li sin mem nur bone gardis,
Ĉar li jam kuri for rapidis...
Tranĉilon preni mi intencis, —
Ne povis, ĉar min urso premis...
Mi fortojn perdi jam komencis
Kaj de doloro mi nur ĝemis...

VI. Subite pafo!... Urso saltis
De mi tuj, tute min lasinte,
Kaj ĝi de mi proksime haltis. —
Jen liberecon eksentinte,
Min levis mi kun malfacilo,
Al urso mem mi alŝteliĝis
Kaj ĝin ekbatis per tranĉilo :
En gorĝon rekte ĝi eniĝis...
Mi bone traſis, — urso mortis.
Ĉasistoj ĉiuj tuj kunvenis, —
Sed mi malforton ne elportis
Kaj falis... Ili min subtenis
Kaj portis al glitveturilo...
Subite vidas mi — aliris
Kun sia bela batalilo
Jen oficiro; li ekmiris :
« Ho, kio tie ĉi fariĝis?
Mi estas tute ekfrapita!
Sinjoro, vi ekmalsaniĝis? »
Per tio ĉi indignigita,

Digitized by Google

Ekkriis mi : « arogantulo!
Vi ĉion tute bone vidis,
Sed vi, malnobla timemulo,
De mi forkuri ekrapidis! »
Kaj en incito mi minuta
Min levis el glitveturilo
Kaj lin kun mia forto tuta
Mi tuj ekbatis per tranĉilo...
Mi vidis sangon, aŭdis krion,
Sed mi nenion jam komprenis,
Ĉar tute perdis mi konscion...
Mi falis. — iu min subtenis....

VII. Mi sen konscio longe restis,
Kaj kiam mi ekkonsciiĝis, —
En malsanejo mi jam estis.
Vespero jam alproksimiĝis...
Nenion tute mi komprenis...
Tre longe kuŝis mi silente
Kaj ion rememori penis...
Jen venis iu. Tre atente
Li ekrigardis min kaj diris :
« Nu, ĉu pli bone vi vin sentas? »
Li tute ĝis mi men aliris,
Murmuris : « bone, mi kontentas... »
Proksime li de mi sidiĝis
Kaj ekparolis : « nu, ĉasisto,
Vi eble jam ekprudentiĝis?
Respondos jam al esploristo? »
Je tio ĉi mi tre ekmiris
Kaj ne respondis; li daŭrigis :
« Al mi pli frue vi ja diris,
Ke lin sendube vi mortigis... »
Subite ĉion mi komprenis...
Ekkriis laŭte mi, ekpenis

Digitized by Google

Min levi, — kaj denove svenis :
Malsana korpo ne eltenis!..,

VIII. Terure tempon mi pasigis!
Kaj mia korpo kaj animo
Suferis... ho, de viv'senigis
Mi homon!... Kun senfina timo,
Malpacience mi atendis
Severan juĝon, — mi ploradis,
Al Dio mi petegojn sendis,
Mi ĝemis, mi freneziĝadis!
Sed baldaŭ tute mi saniĝis,
Suferojn parte mi eltenis
Kaj nun pli forta mi fariĝis.
Kaj jen terura tago venis :
Nun mi, anstataŭ malsanejo,
Kun malmodera tremo vidis,
Ke en majesta mi juĝejo
Sur benko de juĝatoj sidis.
Min puno tute ne timigus,
Mi ĝin eĉ volis en animo,
Ĉar sole ĝi min liberigus
De min preminta ŝarĝa krimo...
Sed mi timegis, ke ĵurintoj
Min sen bedaŭro ekkulpigos
Kaj de aliaj mortigintoj
Min tute ne diferencigos.
Ho, Dio! mi, honesta homo,
Eterne estos kondamnita
Kaj mia senmakula nomo
De ĉiuj estos mallaŭdita!...

IX. Jen ekparolis prokuroro;
Mi tre atente aŭskultadis, —
Sed frapis forte mia koro,
Kaj mi nenion komprenadis...

Digitized by Google

Li finis; advokat' komencis
Pravigi min, — li multe penis;
Kaj lin kompreni mi intencis,
Sed vane : ree ne komprenis!...
Nur tion bone mi sciiĝis,
Ke nun mi estas en juĝejo,
Ke malbonulo mi fariĝis
Kaj estos en malliberejo...

X. Ĵurintoj iris konsiliĝi,
Post ili ankaŭ nun juĝantoj
Eliris, — eble por nutriĝi...
Mi restis sola kun gardantoj.
Duono pasis nur da horo,
Ĵurintoj dum konsiliĝadis,
Sed mia malfeliĉa koro
Centjaron kvazaŭ suferadis!
Priskribi, kio min turmentis
En tiu temp' — ne estas eble,
Kaj kion tiam mi trasentis,
Por mi eĉ mem ne kompreneble!
Se povas vi vin mem prezenti
Starantan antaŭ pafilego,
Ekpafi preta, — kion senti
Vi devus, — mia jam timego,
Kredeble, estos komprenita;
Alie — tute kun nenio
Ĝi povas esti komparita!
Esperis sole mi je Dio...
Subite pordo malfermiĝis :
Ĵurintoj kaj juĝantoj venis...
Al mi kapturno komenciĝis,
Mi ŝanceliĝis kaj eksvenis...

XI. Konsciiĝinte, mi min trovis
Sur lito, hejme ; min domanoj

Digitized by Google

Ĉirkaŭis, — mi do movi povis
Nek per piedoj, nek per manoj,
Ĉar tute mi ekmalfortiĝis...
De ŝarĝa krimo pravigita,
Honesta ree mi fariĝis,
Sed longe estis mi premita
Per tio, ke animo mia
De krimo estas pravigita
Per juĝo homa, sed ne Dia!
De tiu tempo mi forlasis
Jam tute ĉason kun pafilo,
Kaj, krom fiŝhoko nur, mi ĉasis
Jam kun nenia batalilo... »
Li eksilentis. Jam finiĝis.
Malluma nokto, kun rideto
Mateno roza proksimiĝis,
Nebulo flugis sur lageto....
Kaj jen, levinte nin, de lago
Ni kun akiro nun foriris.
Nur kiam venis hela tago,
Al domo mia mi aliris.

BORIS GODUNOV

(Dramo de A. Puŝkin.)

Ĉambro en Kremlo (20 Februaro 1598).

Princoj ŜUJSKIJ kaj VOROTINSKIJ.

Vorotinskij. Ni estas rajtigitaj urbon gardi,
Sed, ŝajne, ni nenion havas fari:
Malplena — Moskvo, ĉar post patriarko
Al monaĥejo eĉ popol' ekiris.
Per kio, pensas vi, finiĝos ĉio?

Digitized by Google

ŜUJSKIJ. Per kio? Tre facile estas scii :
Popolo krios kaj ankoraŭ ploros,
Boris ankoraŭ, kvazaŭ malsobrulo
Ĉe brando, eksulkiĝos tre malmulte,
Kaj, fine, dank' nur al favoro sia,
Humile preni kronon li konsentos,
Kaj poste — poste li komencos regi
Denove, ree.
VOROTINSKIJ. Sed monat' jam pasis,
Dum li en monaĥejo kun fratino
Forlasis tute, ŝajne, mondan vivon.
Nek patriarko, nek bojaroj noblaj
Ĝis nun lin kun sukceso konvinkadis;
Aŭskultas li nek larmajn admonadojn,
Nek varmajn petojn, nek ploregojn Moskvajn,
Nek voĉon eĉ de Granda Konsiliĝo.
Fratinon lian oni vane petis,
Ke ŝi Boris'on benu por reĝado;
Je li simile, monaĥin'-reĝino
Fortika estas kaj neelpetebla.
Boris, videble, ŝin al tio igis.
Nu, kio estos, se reganto vere,
De zorgoj regnaj forte lacigita,
Ne prenos tute tronon senpotencan?
Vi kion diros?
ŜUJSKIJ. Diros mi, ke vane
Verŝiĝis sango de infan'-reĝido, —
Kaj diros, ke Dimitrij povus vivi.
VOROTINSKIJ. Terura estas krimo!... Sed ĉu vere
Boriso pereigis lin?
ŜUJSKIJ. Sed kiu?
Sed kiu Ĉepĉugov'on subaĉetis?
Kaj kiu ankaŭ sendis Bitjagovskij'n
Kun Kaĉalov? Uĝliĉon tuj sendita
Sur lok' esplori tiun ĉi aferon,
Postsignojn freŝajn tie mi eltrovis :

Digitized by Google

Ja, tuta urbo estis ateŝtanto,
Urbanoj ĉiuj tre konsente diris;
Kaj, reveninte, mi per unu vorto
Krimulon povus tute pereigi.
VOROTINSKIJ. Kaj kial do vi lin ne pereigis?
ŜUJSKIJ. Li, mi konfesas, tiam min konfuzis
Per sia aroganta trankvileco;
Li min rigardis tiam kvazaŭ prava :
Min pri detaloj multe li demandis, —
Kaj jen al li ripetis sensencaĵon
Mi tium saman, kiun li deziris.
VOROTINSKIJ. Malbone, princo.
ŜUJSKIJ. Kion do mi farus?
Al Teodoro ĉion dirus eble?
Sed ĉiam ĉion aŭdis li kaj vidis
Per aŭdo kaj rigardo Godunova :
Se tute mi certigus lin je ĉio, —
Boriso lin je mala ekcertigus,
Kaj poste oni, eble, min forsendus
Kaj tiam, kiel ankaŭ mian onklon,
Min eĉ sufokus en malliberejo.
Ne fanfaronas mi, sed se okazus,
Nenia ekzekuto min timigus;
Mi — ne timulo, sed — ne malsaĝulo,
Kaj mi ne volas vane preni maŝon.
VOROTINSKIJ. Terura estis krimo!... Sed kredeble
Jam pento turmentadas mortiginton, —
Kaj certe sango de infan' senkulpa
Malhelpas lin, ke tronon li alprenu.
ŜUJSKIJ. Transpaŝos; li ne estas tre timena!...
Honoro granda estos por Rusujo!
Tataro, sklav', bofrato de Maluto,
Krimulo, en anim' ekzekutisto,
Akceptos kronon, sceptron Monomaĥan!...
VOROTINSKIJ. Ne glora estas li, — ni — multe pli!...
ŜUJSKIJ. Mi pensas, jes.

Digitized by Google

VOROTINSKIJ. Ja Ŝujskij, Vorotinskij....
Ĉu scias vi? naturaj estas princoj.
ŜUJSKIJ. Naturaj, kaj devenas de Rjuriko.
VOROTINSKIJ. Aŭskultu, princo, — ni ja havas rajton
Heredi Teodoron.
ŜUJSKIJ. Eĉ pli multe,
Ol Godunov.
VOROTINSKIJ. Ja efektive!
ŜUJSKIJ. Vidu :
Se Godunov ruzadi ne forlasos,
Komencu ni popolon ekscitigi,
Foriru ili tute de Boriso :
Da princoj propraj ili multe havas
Kaj tial povas kiun ajn elekti.
VOROTINSKIJ. Ni estas multaj, idoj de Rjuriko,
Sed estas van' batali kun Boriso!
De ni popolo tute malkutimis,
Forgesis, ke ni estas Rjurikidoj,
Ĉar longe ni jam restas sen provincoj
Kaj longe nur al reĝoj ni servadas, —
Sed li popolon tutan jam ensorĉis
Per amo, per timigo kaj per gloro.
ŜUJSKIJ (rigardas fenestron).
Kuraĝos li, sed ni... Silentu! Vidu :
Popolo iras reen en senordo, —
Ni kuru, kaj sciiĝu, ĉu jam fino?...

Ruĝa Placo.

POPOLO.

UNUA. Neelpetebla! Li de si forpelis
Bojarojn ĉiujn, pastrojn, patriarkon.
Malsupren ili tute vane falis;
Brilanta trono forte lin timigas.
DUA. Ho, Dio mia! Kiu nin regados?
Malĝojo estas!

Digitized by Google

TRIA. Jen sekretario,
Eldiros li decidon magistratan.
POPOLO. Silentu! Jen sekretario diras;
Aŭskultu!...
ŜĈELKALOV (sur Ruĝa perono). Granda Konsiliĝ' decidis
Ankoraŭ lastan fojon sin returni
Al malĝojega koro de reganto :
Denove morgaŭ sankta patriarko,
En Kreml' farinte plej solenan preĝon,
Antaŭirata per standardoj sanktaj,
Kun ĉiuj sanktfiguroj Dipatrinaj,
Ekiros, — kaj kun li bojaroj ĉiuj,
Nobeloj multaj, elektitaj homoj
Kaj loĝantaro Moskva ortodoksa, —
Ni ĉiuj iros kaj reĝinon petos,
Ke ŝi kompatu nian orfan Moskvon
Kaj ŝi Borison benu por reĝado.
Vi iru nun kun Dio viajn domojn
Kaj preĝu, — flugu al ĉielo sankta
Fervora preĝo de ortodoksuloj. —

(Popolo desiras.)

Knabina Kampo.

NOVA-KNABINA MONAHEJO. POPOLO.

UNUA. Eniris ili de reĝin' ĉambreton;
Boris eniris kaj bojaroj noblaj
Kun patriarko.
DUA. Kio do?
TRIA. Ankoraŭ
Obstinas li; espero tamen estas.
VIRINO (kun infano). Ne ploru! Nu, silentu, ĉar vin lupo
Tuj prenos kaj formanĝos! Nu, silentu!
UNUA. Ĉu ni ne povas trans barilon rampi?
DUA. Ho, ne! Malvaste estas eĉ en kampo,
Ne sole tie! Baroj kaj tegmentoj,

Digitized by Google

Etaĝoj ĉiuj de preĝeja turo,
Kupoloj ĉiuj kaj eĉ ĉiuj krucoj
Pleniĝis je popolo.

TRIA. Estas bone!

UNUA. Sed kia bruo estas!

DUA. Jes... Aŭŝkultu!
Popol' ekkriis; kvazaŭ ondoj falas
Popolaj vicoj.... jen ankoraŭ! Frato,
Jam nia estas vico : nu, genuu!...

POPOLO (sur genuoj; krio kaj ploro).
Kompatu, nia patro! Nin potencu!
Ho, reĝu, patro!

UNUA (mallaŭte). Kial oni ploras?

DUA. Ne scias mi! Bojaroj, eble, scias
Nur bone tion.

VIRINO (kun infano). Kial vi ne ploras?
Jam oni devas plori nun!... Jen lupo!
Ploregu tuj! (Infano ploras.) Tre bone!...

UNUA. Ĉiuj ploras —
Ni ankaŭ kio?

DUA. Mi ne havas larmojn.
Ankoraŭ kio?

UNUA. Ĉu mi povas scii!...

POPOLO. Li prenis kronon! Tute li konsentis!
Li estas nia! Vivu, reĝ'-Boriso!

Kremlaj ĉambroj.

BORISO, PATRIARKO, BOJAROJ.

BORISO. Ho, sankta patro kaj bojaroj noblaj!
Animo mia estas malkovrita :
Vi ĉiuj vidas, ke mi prenas sceptron
Kun granda timo kaj kun humilego.
Tre malfacila estas devo mia!
Heredas mi potencojn Iohanajn,
Heredas ankaŭ mi anĝelon-reĝon!...

Digitized by Google

Sanktulo vera, mia patr' potenca!
Ekvidu larmojn de fidelaj sklavoj,
Kaj sendu vi al tiu, kiun amis,
Kaj kiun tie ĉi vi ekaltigis,
Sanktegan vian benon por reĝado :
Ke regu mi popolon mian glore,
Ke estu mi kaj justa, kaj bonega.
Al mi vi helpu nur, bojaroj gloraj,
Kaj servu, kiei vi al li servadis,
Ankoraŭ kiam kune ni laboris
Por bono de popolo nia Rusa.

BOJAROJ. Neniam ni je nia ĵur' perfidos.

BORISO. Nun iru kaj salutu ni jam ĉerkojn
De formontintaj potenculoj Rusaj,
Kaj poste — tutan vi popolon voku
Festenon fari, — voku tute ĉiujn :
Je ĉiuj mi senfine estos ĝoja.
(Li foriras, bojaroj ankaŭ.)

VOROTINSKIJ (haltiginte princon Ŝujskij).
Divenis vi.

ŜUJSKIJ. Sed kion?

VOROTINSKIJ. Vi memoras?
Ne longe?...

ŜUJSKIJ. Ne, nenion mi memoras.

VOROTINSKIJ. Sed kiam ja popol' knabinan kampon
Ekiris...

ŜUJSKIJ. Nun ne estas temp' memori;
Konsilas mi forgesi iafoje...
Cetere tiam per mallaŭdo ŝajna
Deziris mi nur vin malmulte provi,
Deziris mi ékscii viajn pensojn;
Sed jen popolo jam salutas reĝon —
Foreston mian povas li rimarki,
Mi sekvu lin. (Li foriras.)

VOROTINSKIJ. Ho, ruza kortegulo!

Digitized by Google

Nokto. Ĉambreto en Ĉudova Monahejo.
(1603 j.)

PIMENO, GRIGORIO (dormanta).

PIMENO (skribas antaŭ sankta lampo).
Ankoraŭ unu lasta nur rakonto, —
Kaj mia jam kronik' finita estos;
Kaj mi plenumos devon, kiun Dio
Al mi ordonis. Dio min ne vane
Devigis longe tie ĉi vivadi
Kaj legi min kaj skribi ekinstruis:
Monaĥo ia laborema iam
Laboron mian tre fervoran trovos,
Bruligos, kiel mi, li lampon sanktan,
Kaj dè kroniko polvon forskuinte,
Rakontojn miajn verajn li transskribos, —
Ke sciu idoj de ortodoksuloj
Pasintan sorton de patruja lando,
Ke reĝojn siajn grandajn rememoru
Por laborad', por bono kaj por gloro;
Kaj por pekado, por mallumaj krimoj
Humile Dion pardoneman preĝu.
En maljuneco mi denove vivas;
Pasinta ree antaŭ mi trapasas....
Ĉu longe fluis ĝi, je agoj plena,
Ondante, kvazaŭ granda oceano?
Ĝi estas nun silenta kaj trankvila:
Malmulte da personoj mi memoras,
Malmultaj ankaŭ vortoj min atingas, — —
Alia do — pereis senrevene!
Sed tago estos tuj, forbrulas lampo....
Ankoraŭ unu lasta nur rakonto. (Skribas.)

GRIGORIO (vekiĝinte). Denove tio sama! Trian fojon!
Ho, sonĝo malbenita!.... Jen li sidas
Kaj ĉiam skribas antaŭ lamp', — videble

Digitized by Google

Okulojn tutan nokton li ne fermis.
Tre amas mi trankvilan vidon lian,
Precipe kiam pri pasintaj jaroj
Kronikon sian skribas li; mi ofte
Diveni provis, kion li priskribas :
Ĉu pri regad' malluma de tataroj?
Ĉu pri ekzekutadoj de Johano?
Ĉu pri popola brua konsiliĝo?
Ĉu pri patruja gloro? Tute vane!
Nek en rigardoj, nek sur lia frunto
Tralegi oni povas liajn pensojn;
Kaj ĉiam vid' — humila kaj majesta....
Sekretario griza tiel same
Trankvile vidas kulpajn kaj senkulpajn,
Egale aŭdas bonon kaj malbonon,
Kaj nek kompaton, nek koleron scias.

PIMENO. Ĉu vi vekiĝis, mia frato?

GRIGORIO. Benu,
Min, sankta patro mia.

PIMENO. Dio benu
Hodiaŭ vin, kaj ĉiam, kaj eterne.

GRIGORIO. Vi ĉiam skribis kaj ne dormis tute,
Kaj mian koron longe pekaj revoj
Turmentis, kaj diablo min konfuzis.
Mi sonĝis, kvazaŭ per ŝtuparo kruta
Mi turon venis, — kaj de alta pinto
Ekvidis Moskvon, kvazaŭ formikejon;
Sur plac' malsupre estis multaj homoj, —
Kun rido ili ĉiuj min montradis;
Kaj mi timegis, kaj mi hontis kune, —
Kaj falis mi rapide kaj vekiĝis....
Tri fojojn tion saman mi sonĝadis.
Ĉu ne mirinde?

PIMENO. Juna sango ludas;
Per preĝo kaj per fasto kvietiĝu,
Kaj viaj sonĝoj je vidaĵoj bonaj

Digitized by Google

Pleniĝos. Jen ĝis nun ankoraŭ, ciam,
Se mi ne preĝas longe antaŭ nokto —
Ne dormas mi trankvile kaj senpeke :
Mi sonĝas tiam jen festenojn riĉajn,
Militistaron, jen batalojn bruajn, —
Amuzoj senprudentaj de juneco!

GRIGORIO. Junecon vian gaje vi pasigis!
Batalis vi sub turoj de Kazano,
Armeon Litvan iam vi rebatis,
Kortegon luksan de Johano vidis!
Feliĉa vi!... Kaj mi de knabaj jaroj
En monaĥejo, plej mizera, vivas!
Sed kial mi ne povas bataladi
Kaj festenadi en palacoj reĝaj?
Mi povus, kiel vi, en maljuneco
De mondo vanta tute min forigi
Kaj meti min trankvilan monaĥejon.

PIMENO. Ne plendu, ke vi frue pekan mondon
Forlasis, ke malmulte da tentaĵoj
Al vi potenca Dio sendis. Kredu :
Ensorĉas ofte gloro nin kaj lukso,
Kaj tre malica amo de virinoj.
En vivo mi per multo plezuriĝis;
Sed vere trovis mi feliĉon plenan
Nur kiam monaĥejon mi eniris.
Memoru, filo, vi pri grandaj reĝoj :
Pli alta kiu estas? Sola Dio.
Kuraĝas kiu kontraŭ reĝ'? Neniu
Sed ofte ora krono ilin premas —
Anstataŭ ĝi kapuĉon ili prenas.
Johano reĝo serĉis trankviliĝon
En simileco de laboroj niaj;
Palac' kun ĉiuj ĝiaj fieruloj
Je monaĥejo tute similiĝis :
Servantoj en kapuĉoj, en harvestoj,
Novicoj fariĝadis kaj monaĥoj,

Digitized by Google

Kaj reĝo mem abáto estis pia.
Vidadis mi en tiu sama ĉambro
(En ĝi Kirilo pia tiam vivis,
Verema viro; tiam mi jam ankaŭ
Eksciis dank' al Di' sensignifecon
De mondo), — tie ĉi mi vidis reĝon
De ekzekutoj kaj de pensoj lacan :
Enpensa, pia, li, Minaca, sidis;
Ni ĉiuj antaŭ li senmove staris,
Kaj li kun ni mallaŭte paroladis.
Li diris al abat' kaj al frataro :
« Ho, patroj miaj; venos iam tago —
Kaj tie ĉi pro savo mi jam estos;
Vi, Nikodim', Sergio kaj Kirilo,
Alprenu vi promeson mian sanktan :
Alvenos mi, krimulo malbenita,
Kaj al piedoj viaj, sankta patro,
Falinte, pia mi monaĥ' fariĝos. »
Parolis tiel plej potenca reĝo,
Kaj dolĉe fluis liaj bonaj vortoj,
Kaj ploris li. Kaj ni kun larmoj preĝis,
Ke Dio bona sendu amon, pacon
Al lia peka, malkvieta koro. —
Kaj filo lia Teodor'? Sur trono
Pensadis ĉiam li pri paca vivo
De Diservanto. Li palacon reĝan
Aliformigis en monaĥan ĉambron;
En tiu ĉambro ŝarĝaj reĝaj pensoj
Ne indignigis jam animon lian.
Ekamis Dio reĝan humilecon,
Kaj ja sub li Rusuj' en granda gloro
Konsolis sin, — kaj kiam li mortadis,
Nepriskribebla mirindaĵ' okazis :
Al lia lito venis viro luma,
Videbla sole nur al pia reĝo, —
Kaj Teodor' kun li interparolis

Digitized by Google

Kaj nomis lin plej granda patriarko....
Kaj ĉiuj estis forte timigitaj,
Ĉielan tiun vidon kompreninte,
Ĉar antaŭ reĝo sankta patriarko
En ĉambro tiu tiam ne troviĝis.
Kaj kiam mortis li, palaco tuta
Pleniĝis tuj per sankta bonodoro,
Vizaĝ' do lia, kvazaŭ suno, brilis. —
Jam ne ekvidos ni tielan reĝon!
Ho, plej terura, granda malĝojego!
Ni kolerigis Dion, ni ekpekis :
Regnestron ni de reĝo mortiginton
Elektis!

GRIGORIO. Longe jam, ho sankta patro,
Demandi vin deziris mi pri morto
De juna Dimitrio; vi ja tiam,
Mi aŭdis, estis en Ugliĉ'.

PIMENO. Memoras!...
Devigis Dio min malbonon vidi, —
Terura peko! Tiam mi Ugliĉon
Pro ia novicaĵ' sendita estis.
Mi venis nokte. Jen matene frue
Ekaŭdis mi tumultan sonorilon....
Kriego, bruo.... Oni kuras korton
Reĝinan... — ankaŭ mi, — kaj tie estas
Jam tuta urbo... Vidas mi reĝidon :
Jen mortigita li sur tero kuŝas.
Reĝin' — patrino apud li en sveno,
En malespero ploras nutristino, —
Kaj jam popol' furioziĝe trenas
Malpian perfidintan vartistinon....
Subite jen kruela, tute pala
Aperas tie Judo — Bitjagovskij.
« Jen, jen krimulo ! » ĉiuj tuj ekkriis,
Kaj oni lin disŝiris. Poste multaj
Ekkuris post aliaj tri krimuloj;

Digitized by Google

Kaŝintajn sin krimulojn oni kaptis
Kaj alkondukis al infan' malviva :
Ho. mirindaĵo! — malvivul' ektremis!
« Ekpentu! » al krimuloj oni kriis;
Kaj en teruro granda sub hakilo
Ekpentis ili — kaj Borison nomis.

GRIGORIO. De kia aĝ' reĝido tiam estis?

PIMENO. Sep-jara, ŝajne; nun li sekve estus —
(Dek jaroj pasis jam... Ne, ne, pli multe :
Dek du.) — li estus via samaĝulo
Kaj reĝus; Dio do alie volis.
Per tiu ĉi rakonto mi nun finos
Kronikon mian; jam de tiu tempo
Malmulte mi eniĝis mondon. Frato,
Ellernis vi legadon kaj skribadon,
Al vi transdonas mi laboron mian.
Libera kiam estos vi de preĝo,
Ne filozofiante nur, priskribu
Vi ĉion, kion vi en vivo vidos :
Militon, pacon, kaj regadon reĝan,
Kaj mirindaĵojn ĉiujn de sanktuloj,
Kaj profetaĵojn, kaj ĉielajn signojn, —
Al mi do tempo estas jam ripozi,
Estingi lampon.... Sed sonor' jam estas
Al sankta preĝ'.... Servantojn benu, Dio!....
Al mi bastonon donu, Grigorio.... (li foriras.)

GRIGORIO. Boriso!... Ĉio antaŭ vi tremadas!
Neniu memorigi vin kuraĝas
Pri sorto de infano malfeliĉa;
Kaj en malluma ĉambro jen ermito
Teruran tie ĉi raporton skribas....
Kaj tiel de terura juĝo Dia,
Vi ankaŭ juĝon mondan ne evitos!...

Digitized by Google

Ĉambroj de patriarko.

PATRIARKO kaj ABATO de ĈUDOVA MONAĤEJO.

PATRIARKO. Kaj li forkuris, patro abato?

ABATO. Forkuris, sankta patro, — jen jam pasis tria tago.

PATRIARKO. Petolulo malbenita! El kia gento li devenas?

ABATO. El gento de Otrepiev'oj, de nobelidoj; en frua juneco li fariĝis monaĥo, — oni ne scias kie, loĝis en Suzdal, en Jefima monaĥejo; de tie li foriris, estadis en diversaj monaĥejoj, — fine li venis al mia Ĉudova frataro; mi, vidante, ke li estas ankoraŭ juna kaj senprudenta, donis lin sub estradon de patro Pimeno, maljunulo kvieta kaj humila. Li estis scianta legi kaj skribi, li legadis niajn kronikojn, verkadis kanonojn por sanktuloj, — sed, videble, tiu ĉi sciado ne de Dio estis al li donita....

PATRIARKO. Ho, tiuj ĉi sciuloj! Kian sensencaĵon li elpensis! « Mi estos reĝo en Moskvo! » Ho, vazo diabla!.... Sed pri tio ĉi oni ne devas eĉ raporti al reĝo; pro kio tumulti patron-regnestron? Sufiĉe estos anonci pri lia forkuro al sekretario Smirnov, aŭ al Sekretario Jefimiev... Kia herezo! « Mi estos reĝo en Moskvo! » Oni devas kapti, kapti servanton diablan, kaj forsendi lin Solovkan monaĥejon por eterna pentado. — Tio ĉi ja herezo estas, patro abato?

ABATO. Herezo, sankta patro, ĝusta herezo!...

Reĝa palaco.

DU KORTEGULOJ.

UNUA. Regnestro kie?

DUA. En dormejo sia.

Kun ia li sorĉisto sin enŝlosis.

UNUA. Jen kia estas lia okupado!

Sorĉistoj, magiistoj, sorĉistinoj!

Digitized by Google

Divenas ĉiam, kvazaŭ fianĉino.
Mi volus scii, kion li divenas?
DUA. Jen iras li. Ĉu volas vi demandi?
UNUA. Malluma li....
(ili foriras.)
REĜO (eniras). Atingis mi potencon...
Jam sesan jaron reĝas mi trankvile,
Feliĉon do ne havas!... Ĉu ne tiel
Ni en juneco enamiĝas, volas
Plezurojn amajn, sed nur kvietigis
Malsaton koran ni per posedado, —
Malvarmiĝinte jam, ni turmentiĝas!...
Al mi sorĉistoj vane promesadas
Longegajn tagojn de potenc' trankvila, —
Nek vivo, nek potenco min gajigas :
Mi antaŭsentas tondron kaj malĝojon.
Feliĉ' forestas. Pensis mi popolon
En kontentec', en gloro kvietigi,
Kaj per boneco ĝian amon trovi, —
Sed vanan provon baldaŭ mi forlasis :
Potenco viva por popol' ne estas
Agrabla, — ĝi mortintojn sole amas. —
Malsaĝaj estas ni, se kri' popola,
Aŭ forta plor' tumultas nian koron. —
Malsaton sendis Di' sur nian teron;
Popolo en suferoj pereadis;
Por ili tuj malfermis mi grenejojn;
Mi oron ŝutis; mi laborojn trovis —
Kaj ili furioze min mallaŭdis!
Bruleg' iliajn domojn neniigis;
Por ili mi konstruis novajn domojn —
Kaj ili min riproĉis je brulego!
Jen estas juĝo, amo de popolo!
En familio serĉis mi konsolon,
Filinon mi ekvolis edzinigi;
Fianĉon morto, kvazaŭ vent', forportis —

Digitized by Google

Kaj jen subite ruza famo faras
Min kulpa je filina vidvineco,
Min mem, min mem, min, patron malfeliĉan!...
Se iu mortas, — mortigint' mi estas :
Mi rapidigis morton Teodoran,
Venenis ankaŭ mi fratin'-reĝinon,
Humilan monaĥinon... mi eterne!
Mi sentas : nin nenio iam povas
En mondaj malĝojegoj kvietigi;
Nenio.... Eble, sola konscienco, —
Jes, sola ĝi, sendube, ektriumfos
Je malboneco kaj je kalumnio;
Sed se en ĝi makulo kvankam unu,
Nur unu, eĉ okaze, eltroviĝas,
Mizero estas : kvazaŭ per ulcero
Anim' forbrulos, koro veneniĝos,
Riproĉo, kvazaŭ per martelo, frapas
En kap', kaj naŭzo ĉiam, kaj kapturno,
Kaj punktoj estas sangaj en okuloj...
Forkuri vi deziras, sed... Terure!
Terure!... Plej mizera estas tiu,
En kiu konscienc' ne pura estas!...

Drinkejo sur Litva limo.

MISAILO haj VARLAAMO, vagistoj — kvazaŭ monaĥoj; GRIGORIO OTREPIEV en ordinara vesto; MASTRINO.

MASTRINO. Per kio do mi vin regalos, honoraj maljunuloj?

VARLAAMO. Per tio, kion Dio donis, mastrineto. — Ĉu vi ne havas brandon?

MASTRINO. Kial do ne, pastroj miaj! Mi tuj alportos.

(Ŝi eliras.)

MISAILO. Pro kio do vi eksopiris, kolego? Jen estas limo Litva, kiun vi tiel volis atingi.

Digitized by Google

GRIGORIO. Ĝis kiam mi ne estos en Litvo, ĝis tiu tempo mi ne povas esti trankvila.

VARLAAMO. Kial vi tiel ekamis Litvon? Jen ni, patro Misailo kaj mi, peka, de tiu tempo kiel ni forkuris el monaĥejo, ni pri nenio eĉ pensas : ĉu Litvo, ĉu Rusujo, ĉu fajfilo, ĉu harpo, por ni estas tute egale, estu nur brando... kaj jen ankaŭ ĝi estas!...

MISAILO. Bone estas dirite, patro Varlaamo.

MASTRINO (eniras). Jen, vi havas, patroj miaj. Trinku por sano.

MISAILO. Mi dankas, kara, Dio vin benu. (Ili trinkas. Varlaamo ekkantas.) Kial do vi ne kantas kaj ne trinkas?

GRIGORIO. Mi ne volas.

MISAILO. Libero estas por liberulo...

VARLAAMO. Kaj paradizo — por malsobrulo, patro Misailo! Trinku do glaseton pro mastrineto... (li trinkas.) Tamen, patro Misailo, kiam mi drinkas, tiam mi ne amas sobrajn : alia afero estas drinkado, kaj alia — fierado; se vi volas vivi kiel ni, — ni petas, se ne — for! malaperu : arlekeno ne estas kolego por pastro.

GRIGORIO Sidu ĉe brando kaj pensu pri grando, patro Varlaamo!... Ĉu vi vidas, mi ankaŭ iafoje scias bone diri.

VARLAAMO. Pri kio do mi devas pensi?

MISAILO. Forlasu lin, patro Varlaamo.

VARLAAMO. Kial do li estas tia fastulo? Li mem al ni venis, kiel kolego, oni ne scias — kiu, ne scias — de kie, sed li tiel fieras. (Li trinkas kaj kantas.)

GRIGORIO (al mastrino). Kien iras tiu ĉi vojo?

MASTRINO. Litvon, mia kara, al Luevaj montoj.

GRIGORIO. Kaj ĉu malproksime estas Luevaj montoj?

MASTRINO. Ne malproksime, ĝis vespero oni povus tien aliri, se ne estus baroj reĝaj kaj gardantaj observistoj.

GRIGORIO. Kiaj baroj? Kion tio ĉi signifas?

MASTRINO. Iu forkuris el Moskvo kaj estas ordonite ĉiujn kapti kaj pririgardi.

Digitized by Google

GRIGORIO (al si mem). Jen vi havas!... (Laŭte.) Kium do oni bezonas? Kiu forkuris el Moskvo?

MASTRINO. Dio lin konas, ĉu ŝtelisto, ĉu rabisto, — sed tie ĉi eĉ bonaj homoj nun ne povas trairi. Kaj kiaj rezultatoj el tio ĉi estos? Neniaj; oni eĉ laman diablon ne kaptos : kvazaŭ Litvon ne ekzistas alia vojo, krom vojo granda! Jen, ekzemple, de tie ĉi — sin turnu maldekstren, kaj per arbaro iru sur vojeto ĝis preĝejeto, kiu estas super Ĉekana rivereto, kaj poste rekte trans marĉon al Ĥlopino, de tie al Zaĥarievo, kaj tie jam ĉiu knabeto povas vin alkonduki al Luevaj montoj. Tiuj ĉi observistoj nur pasantojn premas, kaj nin, mizerulojn, ĉirkaŭŝiras. (Estas aŭdata bruo.) Kio tie ankoraŭ estas? Ha, jen estas ili, malbenitaj! ili patrolas.

GRIGORIO. Mastrino! ĉu vi ne havas en dometo ian alian angulon?

MASTRINO. Ne, mia kara, — mi mem volus min kaŝi. Estas nur solaj vortoj, ke ili patrolas, — sed donu al ili brandon, panon kaj ĉion, — malviviĝu ili, malbenitaj! Ke ili....

(Observistoj eniras.)

OBSERVISTO. Bonan tagon, mastrino!

MASTRINO. Bone venu, karaj gastoj, mi petas!

UNUA OBSERVISTO (al dua). Ba! Tie ĉi oni drinkas; ni havos, kion manĝeti. (Al monaĥoj.) Vi kiaj homoj estas?

VARLAAMO. Ni estas Diaj maljunuloj, monaĥoj humilaj, ni iradas en vilaĝoj, kaj kolektas almozon kristanan por monaĥejo.

OBSERVISTO (al Grigorio). Kaj vi?

MISAILO. Nia kolego....

GRIGORIO. Mi estas burĝo el urbeto: mi akompanis maljunulojn ĝis limo; de tie ĉi mi iros hejmen.

MISAILO. Ĉu vi jam ne volas....

GRIGORIO (mallaŭte). Silentu.

OBSERVISTO. Mastrino, donu ankoraŭ brandon; ni do tie ĉi kun maljunuloj trinkos kaj interparolos.

Digitized by Google

DUA OBSERVISTO (mallaŭte). Knabo, ŝajne, estas nuda, de li oni nenion povas preni; sed maljunuloj....

UNUA. Silentu, tuj ni ilin palpos. — Kio do. patroj miaj, ĉu bone iras viaj aferoj?

VARLAAMO. Malbone, filo, malbone! Nun kristanoj fariĝis avaraj; ili monon amas, monon kaŝas. Malmulte ili donas al Dio. Venis peko granda sur popolojn terajn. Ĉiuj komencis komercadi, profitadi; pensas pri monda riĉeco, sed ne pri savo de animo. Ni iradas, iradas; petadas; iafoje en tri tagoj eĉ tri kvaronkopekojn ne povas elpeti. Tia estas peko! Forpasas semajno, dua, ni enrigardas monujon, kaj en ĝi estas tiel malmulte, ke eĉ honte estas monaĥejon iri; kion fari? de malĝojo ni eĉ restaĵon fordrinkas; mizero estas, kaj nenio plu. — Ho, malbone estas, videble, nia lasta tempo venis....

MASTRINO (ploras). Dio kompatu kaj savu!

(En daŭro de Varlaama parolo unua observisto signifie rigardas Misailon.)

UNUA OBSERVISTO. Alekso! Ĉu vi havas reĝan ordonon?

DUA. Jes, mi havas.

UNUA. Donu do ĝin al mi.

MISAILO. Kial vi tiel atente min rigardas?

UNUA OBSERVISTO. Jen kial: el Moskvo forkuris iu malbona herezisto, Griŝko Otrepiev. Ĉu vi tion ĉi aŭdis?

MISAILO. Mi ne aŭdis.

OBSERVISTO. Ne aŭdis? Bone. Kaj tiun forkurintan herezistón reĝo ordonis kapti kaj sufoki. — Ĉu vi tion ĉi scias?

MISAILO. Ne, mi ne scias.

OBSERVISTO. (al Varlaamo). Ĉu vi scias legi?

VARLAAMO. En juneco mi sciis, sed forgesis.

OBSERVISTO (al Misailo). Kaj vi?

MISAILO. Min ne instruis Dio.

OBSERVISTO. Jen, vi havas reĝan ordonon.

MISAILO. Por kio mi ĝin bezonas?

Digitized by Google

Observisto. Al mi ŝajnas, ke tiu ĉi forkurinta herezisto, ŝtelisto kaj fripono — estas vi.

Misailo. Mi? Kompatu! kion vi diras!

Observisto. Haltu! Fermu pordon. Jen ni tuj ekscios.

Mastrino. Ha! malbenitaj turmentantoj! Ili eĉ maljunulon ne forlasas!

Observisto. Kiu tie ĉi scias legi?

Grigorio (eliras antaŭen). Mi scias!

Observisto. Jen, prenu... Sed de kiu vi ellernis?

Grigorio De nia sanktaĵisto.

Observisto. (donas al li ordonon). Legu do laŭte.

Grigorio (legas). « El Ĉudova monaĥejo seninda monaĥo Grigorio, el gento de Otrepievoj, fariĝis herezisto kaj, instruita de diablo, kuraĝis eksciti sanktan frataron per diversaj tentaĵoj kaj malpiaĵoj. Kaj, laŭ informiĝoj, montriĝis, ke forkuris li malbenita Griŝko, al limo Litva... »

Observisto (al Misailo). Kiel do ne vi?

Grigorio. « Kaj reĝo ordonis lin kapti.... »

Observisto. Kaj sufoki!

Grigorio. Tie ĉi ne estas dirite : « sufoki. »

Observisto. Vi mensogas! ne ĉiun vorton oni skribas en linion. Legu : kapti kaj sufoki.

Grigorio. « Kaj sufoki. Aĝon havas ŝtelisto Griŝko.... (rigardante Varlaamon) pli, ol kvindek jaroj, lia alteco estas meza, frunton li havas senharan, barbon grizan, ventron dikan. » (Ĉiuj rigardas Varlaamon.)

Unua observisto. Fratoj! Tie ĉi estas Griŝko! tenu, ligu lin! Mi eĉ ne pensis pri tio ĉi!

Varlaamo (depreninte paperon). For, petoluloj! Kia mi estas Griŝko? Kiel! kvindek jaroj, barbo griza, ventro dika! Ne, frato, vi ankoraŭ juna estas por fari ŝercojn kun mi. Mi jam longe ne legis kaj legas tute malbone, sed nun mi jam tralegos, se oni min volas sufoki (Li legas silabe.) « Aĝon li havas de dudek jaroj. » — Kio, frato, kie do estas kvindek? vidu — dudek?

Digitized by Google

DUA OBSERVISTO. Jes, mi memoras, dudek; tiel same ankaŭ al ni estis dirite.

UNUA OBSERVISTO (al Grigorio). Vi, frato, videble estas ŝerculo.

(En daŭro de legado, Grigorio staras, mallevinto kapon, havanto manon en brusta poŝo.)

VARLAAMO (daŭrigas). « Alteco lia estas malgranda, brusto larĝa, unu mano estas pli mallonga, ol alia, okuloj estas bluaj, haroj — flavruĝaj, sur vango estas veruko, sur frunto — alia. » Ĉu ne vi, amiko, tio ĉi estas?

(Grigorio subite elmetas ponardon; ĉiuj antaŭ li disiras; li rapide sin ĵetas fenestron.)

OBSERVISTOJ. Tenu! Tenu!...

(Ĉiuj kuras en senordo.)

Moskvo. — Domo de Ŝujskij.

ŜUJSKIJ; multego da gastoj; vespermanĝo

ŜUJSKIJ. Ankoraŭ vinon! (Li sin levas, ĉiuj ankaŭ.)
Karaj gastoj miaj,
Ĉerpilon lastan! Legu preĝon, knabo.

KNABO. Ĉiela reĝ', estanta ĉie, ĉiam!
Atentu preĝon vi de sklavoj viaj :
Unua preĝo pri regnestro nia,
De Dio elektita kaj plej pia,
Pri aŭtokrata reĝo de kristanoj.
En domo gardu lin, kaj en milito,
Sur vojoj, kaj sur lito de ripozo.
Al li de malamikoj venkon donu,
Kaj glora estu li de mar' ĝis maro.
En sano floru lia familio,
Kaj ĝiaj plej amindaj branĉoj ombru
Senfinan mondon; kaj al ni, al sklavoj,
Li estu, kiel ĉiam, bonfavora,
Afabla, bona, longepacienca;
Kaj fontoj de saĝec' lia senfina
Sur nin elfluu sufiĉege, gaje!

Digitized by Google

Kaj jen, ĉerpilon reĝan eklevinte,
Ni preĝas antaŭ Vi, Ĉiela Reĝo.

ŜUJSKIJ (trinkas). Ho, estu ĉiam sana, granda reĝo!
Adiaŭ, gastoj miaj vi plej karaj;
Mi dankas, ke ne abomenis mian
Regalon vi. Adiaŭ, bonan nokton!

(Gastoj foriras, li akompanas ilin ĝis pordo.)

PUŜKIN. Fine ili foriris; nu, princo Vasilij Ivanoviĉ, mi jam pensis, ke ni ne povos eĉ interparoladi.

ŜUJSKIJ (al servantoj). Vi kial buŝon malfermis? Vi ĉiam nur sinjorojn viajn subaŭskultas. Forigu ĉion de tablo kaj iru for! — Kio okazis, Atanaso Miĥajloviĉ?

PUŜKIN. Mirindaĵoj, kaj nenio plu!
Hodiaŭ mia nev', Gavrilo Puŝkin,
Al mi kurjeron sendis el Krakovo.

ŜUJSKIJ. Nu?

PUŜKIN. Strangan li al mi novaĵon skribas...
Fil' de Johan'... Atendu (aŭskultas ĉe pordo).
Reĝa knabo,
Laŭ ordo de Boriso mortigita....

ŜUJSKIJ. Sed tio ĉi ne estas nov'.

PUŜKIN. Atendu :
Dimitrij vivas.

ŜUJSKIJ. Jen sciigo kia!
Reĝido vivas! Nu, mirinde estas!
Nur tio ĉi?

PUŜKIN. Aŭskulu min ĝis fino;
Li estus kiu ajn, ĉu mem reĝido,
Ĉu ia eĉ spirit' en lia vido,
Aŭ tre kuraĝa uzurpul' — fripono, —
Sed tie nun Dimitrij ekaperis.

SUJSKIJ. Ne povas esti.

PUŜKIN. Lin mem Puŝkin vidis.
Unue kiam li palacon venis,
Tra vicoj da sinjoroj Litvaj rekte
Trairis li sekretan ĉambron reĝan.

Digitized by Google

ŜUJSKIJ. Sed kiu li, de kie?
PUŜKIN. Mi ne scias.
Nur oni scias, ke li longe servis
Ĉe Viŝneveckij; kaj ke kiam estis
Malsana li, li al konfesprenanto
Malkovris ian sekretaĵon gravan;
Kaj fierul', sekreton eksciinte,
Dorlotis lin, kaj levis lin de lito
Kaj lin al Sigizmund' forveturigis.
ŜUJSKIJ. Vi ion aŭdis pri bravulo tiu?
PUŜKIN. Mi aŭdis, ke li estas saĝa, lerta,
Al ĉiuj plaĉas. Forkurintojn Moskvajn
Li ravis tute. Litvaj pastroj estas
Kunuloj liaj. Reĝo lin dorlotas —
Kaj, oni diras, helpi lin promesis.
ŜUJSKIJ. Nu, tio ĉi konfuzo tia estas,
Ke esti povas eĉ kapturno, frato.
Sendube, jes, li estas uzurpulo!
Konfesas mi, danĝero estas granda,
Sciigo grava estas! se atingos
Popolon ĝi, ventego estos forta.
PUŜKIN. Ventego tia, ke malcerte reĝo
Konservos kronon sur saĝega kapo.
Kaj prave estos, ĉar li nin regadas
Simile je minaca reĝ' Johano.
Ĉu havas vi utilon, ke forestas
Por ĉiuj ni videblaj ekzekutoj,
Ke nun de sangigita plank' publike
Kanonojn ni ne kantas jam al Kristo,
Ke oni ne bruligas nin kaj reĝo
Per sia sceptro ne subŝovas karbojn?
Ĉu havas garantion ni en vivo!
Nin ĉiutage malfavor' atendas,
Malliberej', kapuĉo, aŭ katenoj,
Kaj ankaŭ eĉ malsata mort', aŭ maŝo.
Pli eminentaj niaj gentoj kie?

Digitized by Google

Kaj Ŝestunov, kai Sickij-princoj kie?
Romanov, li, espero de patrujo?
Forturmentitaj estas en ekzilo....
Tiela sama estos via sorto.
Eĉ hejme, kvazaŭ per Litvanoj, estas
Ni ĉirkaŭitaj per malfideluloj :
De ĉie — langoj, pretaj nin perfidi,
Ŝtelistoj, de estrar' subaĉetitaj.
Dependas ni de ĉia servutulo,
Se lin ni iafoje prave punis.
En propraj eĉ bienoj ni ne regas :
Maldiligentan sklavon ne forpelu!
Lin nutru! Laboriston eĉ ne provu
Forvoki de najbar'! alie — puno!
Ĉu iam aŭdis vi similan ion
Eĉ en reĝado de Minaca reĝo?
Ĉu vivas jam pli bone nun popolo?
Demandu ĝin. Jen, venos uzurpulo,
Al ĝi promesos li diversajn bonojn, —
Kaj estos jam amuz'.
ŜUJSKIJ. Vi estas prava.
Sed ĉu vi scias? Pri sciigo tiu
Silentu ni ĝis tempo.
PUŜKIN. Kompreneble,
Por si nur sciu. Estas vi prudenta;
Kun vi mi ĉiam amas paroladi,
Kaj se min io iam nur tumultas,
Mi tion jam de vi ne povas kaŝi;
Al tio mielvino kaj biero
Al mi malligis langon mian tiel...
Adiaŭ princ'!
ŜUJSKIJ. Adiaŭ, ĝis sinvido.

(Akompanas lin.)

Digitized by Google

Reĝaj ĉambroj.

REĜIDO desegnas geografian karton. REĜIDINO, NUTRISTINO de reĝidino.

KSENIO (kisas portreton). Ho, mia kara fianĉo, mia plej bela reĝido, ne al mi vi apartenas, ne al via fianĉino, sed al malluma tombeto en fremda landeto : neniam mi min konsolos. eterne mi ploros.

NUTRISTINO. Nu, reĝidino! Fraŭlino, ploras, kvazaŭ roso falas : suno suriros, roson sekigos. Vi havos alian fianĉon — kaj belegan kaj afablan. Vi lin ekamos, mia infano aminda, kaj vi forgesos Johanon-reĝidon.

KSENIO. Ne, nutristineto, al li, eĉ mortinta, mi estos fidela.

(Boriso eniras.)

REĜO. Ksenio mia! ho, filino kara!
Ankoraŭ fianĉino — jam vidvino!
Vi ĉiam ploras pri fianĉo via?
Infano mia! sorto ne permesis
Al mi feliĉon vian eĉ vidadi.
Kredeble kolerigis ni ĉielon,
Feliĉon vian mi ne povis fari;
Sed vi, senkulpa! kial vi suferas?
Kaj vi, fileto mia, kion faras?

TEODORO. Mi? Terŏn Moskvan mi desegnas; vidu :
Jen estas tuta nia regn'; jen Moskvo,
Jen Novgorod', jen Astraĥan'! Jen maro,
Plej densaj estas jen arbaroj Permaj,
Kaj jen Sibir'.

REĜO. Kaj tio kio estas,
Jen, tie elkurbiĝas?

TEODORO. Volgo estas.

REĜO Tre bone! Dolĉaj fruktoj de scienco!
De nubo kvazaŭ, povas tuj ekvidi
Vi regnon tutan : urbojn kaj riverojn....
Ho, lernu, fil'; scienco mallongigas
Spertadojn de rapidfluanta vivo.

Digitized by Google

Jen iam, eĉ tre baldaŭ, eble, ĉiuj
Provincoj tiuj, kiuj vi hodiaŭ
Desegnis sur papero tiel bone,
Sub via glora potencado estos.
Ho, lernu, mia filo, pli facile
Laboron regnan tiam vi komprenos.

(Eniras Semiono Godunov.)

Jen iras kun raporto Semiono.
(Al Ksenio.) Animo mia, iru vian ĉambron;
Adiaŭ, kara; Dio vin konsulu.

(Ksenio kun nutristino foriras.)

Nu, kion diros Semion'?

SEMIONO GODUNOV. Hodiaŭ
Al mi de Puŝkin kaj de princ' Vasilij
Servantoj venis frue kun raporto.

REĜO. Nu!

SEMIONO GODUNOV. Kaj servant' de Puŝkin alraportis,
Ke en maten' hieraŭ alveturis
Al ili el Krakov' kurjer', — kaj baldaŭ
Li sen letero resendita estis.

REĜO. Tuj kaptu lin.

SEM. GODUNOV. Mi sendis persekuton.

REĜO. Kaj Ŝujskij?

SEM. GODUNOV. Jen hieraŭ li regalis
Amikojn siajn: fratoj Miloslavskij,
Buturlin estis, Saltikov Miĥajlo,
Kaj Puŝkin, kaj ankoraŭ kelkaj homoj;
Disiris ili tre malfrue. Puŝkin
Kun mastro mem nur en soleco restis,
Kaj longe ili interparoladis.

REĜO. Alvoku tuje princon Ŝujskij.

SEM. GODUNOV. Reĝo!
Li estas tie ĉi.

REĜO. Al mi lin voku!

(Godunov foriras.)

REĜO. Kun Litvo interkomuniko! Kio?!...

Digitized by Google

De Puŝkin gento estas abomena,
Al Ŝujskij ankaŭ mi ne tre konfidas :
Li ruza kaj kuraĝa, evitema....
(Ŝujskij eniras.)
Bezonas mi kun vi interparoli.
Sed, ŝajne, vi mem venis pro afero,
Kaj tial mi aŭskultos vin unue.
ŜUJSKIJ. Regnestro! devas mi al vi raporti
Sciigon gravan.
REĜO. Mi jam vin aŭskultas.
ŜUJSKIJ (mallaŭte montrante Teodoron).
Sed reĝo, jen...
REĜO. Reĝido povas scii
Pri tio, kion scias Ŝujskij. Diru.
ŜUJSKIJ. El Kiev' sciigo venis....
REĜO. Tiu, kiun
Kurjer' al Puŝkin mem alveturigis?
ŜUJSKIJ. (Li ĉion scias!...) Pensis mi, regnestro,
Ke vi ne scias tiun ĉi sekreton.
REĜO. Nenio, princo; volas mi kombini
Sciigojn, — ĉar alie ne ekscios
Ni veron.
ŜUJSKIJ. Mi nur tion bone scias,
Ke en Krakov, aperis uzurpulo,
Kaj ke sinjoroj kaj mem reĝ' lin amas.
REĜO. Sed kiu estas tiu uzurpulo?
ŜUJSKIJ. Nescias.
REĜO. Sed... per kio li danĝera?
ŜUJSKIJ. Regnestro! forta estas via regno;
Per amo vi kaj per malavareco
Aldonitigis korojn de subuloj;
Sed mem vi scias, ke popolamaso
Perfida estas, forte ribelema,
Kaj ne espera, kaj superstiĉema, —
Obea estas al inspir' momenta,
Al vero — surda kaj indiferenta,

Digitized by Google

Ĝi nur al fabloj ĉiam konfidadas.
Kuraĝo senprudenta al ĝi plaĉas;
Kaj, se fripono tiu nesciata
Transiros iel nian limon Litvan,
Al li popolamason malsaĝegan
Altiros nom' reviva de Dimitrij.

REĜO. Dimitrij!... Kiel? tiu ĉi infano?
Dimitrij!... Ha!... — Reĝido, vi foriru.

ŜUJSKIJ (al si mem). Ruĝiĝis li : ventego estos!...

TEODORO. Reĝo,
Permesu, ke....

REĜO. Ne, mia filo, iru.

(Teodoro foriras.)

Dimitrij!...

ŜUJSKIJ (al si mem). Li nenion tute sciis.

REĜO. Aŭskultu, princo, ĉion tuj pretigu;
De Litv' Rusujo estu debarita
Per baroj; ke neniu kreitaĵo
Transiru nian limon; ke leporo
Eĉ ne alkuru el Poluj'; ke korvo
Ne flugu el Krakovo. Nu, rapidu!

ŜUJSKIJ. Tuj.

REĜO. Haltu. Ĉu ne vere, ke sciigo
Tre sprita estas? Ĉu vi iam konis
Mortintojn, el ĉerkujoj elirintajn,
Por demandadi reĝojn, leĝajn reĝojn,
Publike, unuvoĉe elektitajn,
De sankta patriarko mem kronitajn?
Ridinde? ha? Sed kial vi ne ridas?

ŜUJSKIJ. Regnestro!...

REĜO. Ne, aŭskultu, princ' Vasilij :
Eksciis kiam mi, ke tiun knabon...
Ke tiu ĉi knabeto iel mortis,
Mi sentis vin por esplorado; nun do
Per kruco, kaj per Dio mi vin petas,
Laŭ konscienco, vi anoncu veron :

Digitized by Google

Ĉu vi ekkonis mortigitan knabon?
Kaj ĉu ne estis ŝanĝo? Nu, respondu.
ŜUJSKIJ. Sed ĵuras mi....
REĜO. Ne, Ŝujskij, vi ne ĵuru,
Respondu: ĉu reĝido estis?
ŜUJSKIJ. Jes.
REĜO. Pripensu, princ', favoron mi promesas,
Mensogon jam pasintan mi ne punos
Per malfavoro. Sed se nun vi ankaŭ
Deziras ruzi vi — je kap' de mia filo
Mi ĵuras vin kruele ekzekuti.
Mi tiel ekzekutos, ke Johano
Eĉ mem en ĉerko de terur' ektremos.
ŜUJSKIJ. Ne puno, — malfavoro min timigas!
Ĉu mi kuraĝos antaŭ vi malici?
Kaj ĉu mi povis tiel ekerari,
Ke lin mi ne ekkonis? Mi tri fojojn
Vizitis en preĝejo malvivulon,
Portitan tien per Uglîĉo tuta.
Ĉirkaŭis lin ankoraŭ dek tri korpoj,
Per man' popola disŝiritaj, — ili
Jam rimarkeble tute forputradis,
Vizaĝo do reĝida estis klara,
Trankvila, freŝa, kvazau li nur dormis;
Profunda vund' ankoraŭ ne krustiĝis,
Kaj trajtoj liaj tute ne ŝanĝiĝis. —
Ho ne, regnestro, tute mi ne dubas:
Dimitrij mortis.
REĜO. Nu, sufîce, iru. (Ŝujskij foriras.)
Ha, ŝarĝe estas!... Pensojn mi kolektu!...
Mi tentis: sango tuta al vizaĝo
Sin ĵetis, poste reen ĝi defluis....
Jen kial dek tri jarojn intersekve
Infanon mortigitan mi sonĝadis!
Jes, jes — jen kial! nun mi jam komprenas.
Sed kiu estas mia kontraŭulo?

Digitized by Google

Kaj kiu kontraŭ mi? Nur nomo, ombro, —
Ĉu povas ombr' de mi forŝiri kronon,
De idoj miaj heredaĵon preni?
Ho, malsaĝulo! kial mi ektimis?
Nur blovu vi fantomon — ĝi forflugos.
Jes, estas decidite : mi ne timos —
Malŝati tamen mi nenion devas....
Tre peza vi, ho, ĉapo Monomaĥa!

Krakovo. Domo de Viŝneveckij.

UZURPULO kaj PASTRO ĈERNIKOVA.

UZURPULO. Ne, mia patro, embaras' forestas.
Animon molan de popolo mia
Mi bone scias : ĉiam sankta estos
Por ĝi ekzemplo de regnestro ĝia.
Por religio — ĝi indiferenta.
Kaj baldaŭ — donas mi eĉ garantion —
Entute religio orienta
Ekamos forte Petran vikarion.
PATRO. Vin bone gardu sankta Ignatio!
Alie jam komencos vi vivadi.
Sed nun, reĝido, devas vi ĝis tiam
Intencojn viajn en anim' kaŝadi;
Ŝajnigi sin kun plej malpia mondo
Al ni ordonas ofte sankta devo :
Aferojn viajn, vortojn — juĝas homoj,
Intencojn do nur sola Dio vidas.
UZURPULO. Amen! Kiu tie?

(Eniras servanto.)

Diru : ni akceptas.

(Pordo malfermiĝas. Eniras amaso da RUSOJ kaj POLOJ.)

Kolegoj miaj! morgaŭ jam eliros
Ni el Krakovo. Mi deziras, Mniŝek,
Al vi Samboron post tri tagoj veni.
Mi scias, ke kastel' gastama via

Digitized by Google

Briladas ĉiam per lukseco nobla
Kaj estas glora per mastrino juna.
Marinon plej belegan mi esperas
Ekvidi tie. Vi do, ho amikoj,
Rusujo, Litvo, kun kuraĝ' levintaj
Standardojn fratajn kontraŭ malamiko
Malica ĉiam, mia malbonulo, —
De Slavoj filoj, baldaŭ mi kondukos
Por batalado kolegarojn viajn!
Sed inter vi mi vidas novajn homojn?

GAVRILO PUŜKIN. Alvenis ili al favoro via
Pro glavo kaj servado.

UZURPULO. Mi tre ĝojas.
Alvenu. Kiu do, al mi vi diru,
Belulo tiu?

PUŜKIN. Kurbskij.

UZURPULO. Glora nomo!
Parenc' vi estas de hero' Kazana?

KURBSKIJ. Mi — filo lia.

UZURPULO. Vivas li?

KURBSKIJZ. Ne, mortis....

UZURPULO. Grandega saĝo! Viro de batalo!...
De tiu tempo tamen, kiam estis
Li sub antikva Olga urb' kun Litvoj,
Por venĝi tie siajn ofendantojn, —
Pri li silentas famo.

KURBSKIJ. Mia patro
Pásigis reston de vivado sia
En de Batorij donacita tero.
En izoleco li trankvile vivis,
Serĉante en sciencoj nur konsolon;
Sed ne konsolis lin laboro paca :
Patrujon de juneco memorante,
Pri ĝi li ĉiam forte sopiradis.

UZURPULO. Ho, estro malfeliĉa! Kiel hele!
Tre ĝojas mi, heroo mia nobla,

Digitized by Google

Ke lia ido kun patruj' paciĝas —
De patroj kulpojn mi ne rememoras;
Alproksimiĝu, Kurbskij... donu manon!
Tre strange! Fil' de Kurbskij mem kondukas
Sur tronon — kiun? filon de Johano!...
Min helpas ĉio : homoj kaj mem sorto!
Kaj vi?

POLO. Sobanskij mi, nobel' libera.

UZURPULO. Mi vin salutas, id' de libereco!
Al li trionon de salajr' elpagu.
Sed tiuj ĉi? Sur ili mi ekkonas
Patrujan veston. Ili estas niaj.

ĤRUSĈOV (salutas). Jes, nia patro-reĝ'. Ni estas viaj
Fervoraj, elpetitaj servutuloj.
El Moskvo ni de malfavor' forkuris
Al vi, regnestr', — pro vi ni estas pretaj
Eĉ morti, — estu niaj malvivuloj
Por vi ŝtupar' al Moskva reĝa trono.

UZURPULO. Kuraĝu vi, senkulpaj turmentitoj —
Permesu nur al mi atingi Moskvon,
Kaj tie jam Boris elpagos ĉion.
Vi kiu?

KARELO. Venis mi de Don' libera.
Al vi min sendis niaj kuraĝuloj,
Okulojn viajn klarajn reĝajn vidi,
Al vi proponi ĉiujn niajn kapojn.

UZURPULO. Mi konas Donon : mi ne dubis vidi
Standardon Donan inter miaj vicoj.
Tre dankas ni militon nian Donan.
Ni scias, ke kozakoj nune estas
Maljuste alpremataj kaj pelataj;
Sed se nin Dio helpos ekposedi
De patro tronon, tuj, laŭ antikveco,
Favoros ni fidelan nian Donon.

POETO (alproksimiĝas, malalte salutante kaj kaptante baskon de Griŝko.)
Plej granda princo kaj reĝid' plej klara!

Digitized by Google

UZURPULO. Vi kion volas?
POETO (donas al li paperon). Prenu kun favoro
Mizeran frukton de fervor-laboro.
UZURPULO. Ho, kion vidas mi? Latinaj versoj!
Plej sankta estas lig' de glav' kun liro, —
Ĉar unu laŭr' amike ilin ligos.
Sub norda mi ĉielo eĉ naskiĝis,
Sed kun latina muzo konatiĝis,
Kaj florojn de Parnas' mi kore amas.
Mi kredas profetaĵojn de poetoj.
Ne vane en ilia flama brusto
Ekbolas ravo : faron, kiun gloris
Poetoj, jam antaŭe benu, Dio!
Alvenu, kara. Pro memoro mia
Alprenu. (Donas al li ringon.)
Kiam jam kun mi fariĝos
Antaŭdifin' de sorto, kiam kronon
Prapatran mi surmetos, ree aŭdos
Mi voĉon vian kaj inspiran himnon :
« Musa gloriam coronat gloriaque musam. »
Kaj nun, amikoj, ĝis sinvido morgaŭ!
ĈIUJ. Eliru!... Vivu princ' Dimitrij, vivu!
Eterne vivu granda princo Moskva!

Kastelo de vojevodo Mnišek en Samboro.

Tualetejo de Marino.

MARINO, RUZJA (ornamas ŝin). SERVANTINOJ.

MARINO (antaŭ spegulo).
Ĉu baldaŭ? Vi ne povas rapidigi?
RUZJA. Permesu — estas jen malfacilaĵo, —
Per kio vi vin volas ornamigi,
Per belaj perloj, aŭ per smeraldaĵo?
MARINO. Al mi vi donu kronon diamantan.
RUZJA. Bonege! Vi memoras? vi ĝin vestis

Digitized by Google

Ankoraŭ kiam balon plej brilantan
Kortegan vi veturis? Tie estis
Vi kvazaŭ suno, — ĉiuj viroj restis
De vi en rav', fraŭlinoj for rapidis....
Ĥotkeviĉ juna tiam vin ekvidis
Kaj sin mortpafis.... Kiu proksimiĝas
Al vi nur, tiu tuj vin enamiĝas!...

MARINO. Ĉu baldaŭ?

RUZJA. Tuj, fraŭlino kara mia.
Je vi espera forte patro via;
Ne vane vidis vin reĝido, eble;
Ne povis li eĉ kaŝi ravon sian;
Kaj tial povas vi jam koron lian
Facile venki nun kredeble.
Ĉe ni lin sole amo tenas!
Monaton tutan jam, veninte
Al ni, militon forgesinte
Kaj tronon Moskvan, li festenas
Kaj Rusojn, Litvojn kolerigas....
Al tio kio lin devigas?
Esperas mi, ke, kiam vin, fraŭlino,
Dimitrij faros Moskvan jam reĝinon,
Vi ne forlasos vian servantinon?

MARINO. Ĉu pensas vi, ke estos mi reĝino?

RUZJA. Sed kiu? La plej bela vi ja estas,
Je vi egalaj per belec' forestas!
De Mniŝek gento cedis al nenia;
Vi estas bela super laŭdo ĉia....
Feliĉa estos tiu, kiun vi ekamos,
Al kiu via bona kor' per amo flamos —
Se eĉ li estus reĝo nia
Aŭ eĉ de francaj reĝoj ido....
Ne sole tiu ĉi reĝido
Mizera, nesciata ia!

MARINO. Reĝidon tuta mond' lin opinias.

RUZJA. Sed ja pasintan vintron li estadis

Digitized by Google

Ĉe Viŝneveckij, kaj al li servadis.
MARINO. Li kaŝis sin.
RUZJA. Nu, tion ĉi mi scias.
Sed ĉu jam estas vi sciinta,
Pri li popolo kion diras?
Ke estas li el Moskvo forkurinta
Fripono, kiu nur pro krimo iras.
MARINO. Ho, kia sensencaĵo!
RUZJA. Tute vere!
Je tio ĉi ne kredas mi, fraŭlino;
Sed danka devas esti li sen fino,
Ke lin el multaj amas vi sincere....
SERVANTINO (enkuras). Alvenis gastoj!
MARINO. Kiel, kara mia,
Vi tiel babilema estas
Kaj kiel longe vi min vestas!
RNZJA. Tuj, tuj!... (servantinoj kuradas kaj rekuradas).
MARINO (al si mem).
Ekscios mi pri sort' pasinta lia....

Vico da lumigitaj ĉambroj. Muziko.

VIŜNEVECKIJ kaj MNIŜEK

MNIŜEK. Kun mia nur Marino li parolas,
Pri unu nur Marino ankaŭ pensas...
Afero al edziĝo proksimiĝas;
Ĉu pensis vi — konfesu, Viŝneveckij,
Ke iam ŝi, Marin' — reĝino estos?
VIŜNEVECKIJ. Mirinde estas!... Sed ĉu pensis Mniŝek,
Servanto mia prenos tronon Moskvan?
MNIŜEK. Sed kia ja Marino mia estas?
Al ŝi mi sole diris : nu, rigardu!
Reĝidon ne forlasu!... kaj subite
Finiĝis ĉio, li — en ŝiaj retoj!
(Muziko ludas polkon, Uzurpulo kun Marino iras en unua paro.)
MARINO (al Uzurpolo). Jes, morgaŭ, jes en dekunua horo,

Digitized by Google

Aleo de tilioj, ĉe fontano....
(Ili foriras. Dua paro.)

SINJORO. Sed kion trovis en Marin' Dimitrij?

SINJORINO. Ŝi estas belulino.

SINJORO. Ŝtona nimfo :
Okuloj, buŝo — sen ridet' sen vivo....
(Nova paro.)

SINJORINO. Ne bela estas li, sed tre agrabla;
En li vidata estas reĝa sango.
(Nova paro.)

SINJORINO. Eliro kiam?

SINJORO. Kiam li ordonos.
Ni pretaj estas; sed kun li Marino
Videble, longe nin en kapto tenos.

SINJORINO. Agrabla estas kapto.

SINJORO. Jes, se ankaŭ... (Ili foriras; ĉambroj fariĝas malplenaj.)

MNIŜEK. Ni, maljunuloj, nune jam ne dancas,
Muziko nin jam tute ne alvokas,
Manetojn ni ne premas kaj ne kisas....
Mi tamen ne forgesis petolaĵojn!...
Nun jam ne tio, kio estis iam!
Junar' ne tiel estas jam kuraĝa,
Beleco ankaŭ jam ne tiel ĝoja;
Konfesu : ĉio jam malgaja estas.
Forlasu ilin; iru ni, kolego,
Ordonu ni malŝtopi boteleton
Da vin' hungara ĉirkaŭherbigitan,
En anguleto ni duope trinku
Plej densan bonodoran fluidaĵon,
Kaj poste paroladu ni pri io.
Nu, iru, frato.

VIŜNEVECKIJ. Kaj afero iros.

Nokto, Ĝardeno, Fontano.

UZURPULO (eniras). Kaj jen fontan'; ŝi tien ĉi alvenos.
Naskiĝis, ŝajne, mi ne tre timema,

Digitized by Google

Mi antaŭ mi proksime vidis morton :
Animo antaŭ morto ne tremadis.
Al mi minacis eĉ mallibereco,
Min oni persekutis — mi ne timis
Kaj per arogantec' libera restis.
Sed kio nun animon mian premas?
Pro kio nun mi tiel forte tremas?
Ĉu estas tio ĉi pasia tremo?
Ne, tio estas timo. Tutan tagon
Atendis mi sinvidon kun Marino,
Pripensis tion, kion mi eldiros,
Ensorĉos kiel mi fieran saĝon,
Kaj kiel nomos ŝin reĝinon Moskvan;
Sed venis hor', — nenion mi memoras,
Ne trovas mi parolojn ellernitajn;
Imagon mian tute am' konfuzas...
Sed io jen ekbrilis... jen brueto...
Ne, tio — lumo de malica luno,
Ventet' ekbruis tie ĉi....

MARINO (eniras). Reĝido!

UZURPULO. Ŝi!... Tuta sang' en vejnoj malvarmiĝis.

MARINO. Dimitrij! vi?

UZURPULO. Ho, sorĉa, dolĉa voĉo!
(Iras al ŝi.) Ĉu estas vi? Ĉu vin mi, fine, vidas
Kun mi sub nokta ombro en soleco?
Ho, kiel malrapide iris tago
Kaj malrapide suno estingiĝis!
Kaj kiel longe vin mi atendadis!

MARINO. Forkuras horoj, mi ne havas tempon —
Mi tie ĉi kun vi kunveni volis
Ne por aŭskulti delikatajn vortojn
De amo. Vortoj estas malnecesaj.
Mi kredas, ke vi amas; sed aŭskultu :
Decidis mi kun via sorto brua
Kunigi mian sorton; sekve povas
De vi, Dimitrij, mi postuli solan :

Digitized by Google

Postulas mi, ke vi al mi malkovru
Esperojn ĉiujn de animo via,
Intencojn ĉiujn kaj eĉ ĉiujn timojn;
Ke mi kun vi kuraĝe povu kune
Eniri vivon — kaj ne kiel blinda
Sklavino de deziroj ĉiuj edzaj,
Silenta kromvirino sole via,
Sed kiel via inda leĝ-edzino
Kaj helpantino de regnestro Moskva.

UZURPULO. Almenaŭ nun permesu, ke forgesu
Mi tute zorgojn kaj tumultojn miajn!
Forgesu mem, ke antaŭ vi vi vidas
Reĝidon. Ho, Marino, nun vi vidu
En mi de vi amanton elektitan,
Feliĉan eĉ de sola vido via.
Aŭskultu kore vi petegojn amajn!
Permesu koron vi plifaciligi!

MARINO. Ne estas tempo, princ'; vi malrapidas,
Kaj amo de kolegoj viaj ĉiuj
Jam malvarmiĝas; kaj jam nun danĝeroj,
Laboroj viaj multe pligrandiĝas;
Jam min atingis malagrabla famo,
Kaj nova jam novaĵ' novaĵon ŝanĝas;
Kaj Godunov rapide pretiĝadas....

UZURPULO. Ĉu estas en potenco Godunova
Feliĉo sola mia, via amo?
Ne, ne! Rigardas nun indeferente
Mi tronon lian kaj potencon reĝan.
Sed via am'... sen ĝi por kio estas
Kaj mia viv', kaj gloro, kaj potenco?
Vi en dezerto eĉ, en terdometo
Por mi anstataŭigos reĝan kronon.
Jes, amo via....

MARINO. Hontu! Ne forgesu
Plej altan kaj plej sanktan vi difinon:
Ja via rang' pli kara devas esti

Digitized by Google

Por vi, ol ĉiuj ĝojoj, ravoj vivaj, —
Ĉar kun nenio povas ĝi egali.
Vi devas scii, ke ne al junulo,
Ravita tute per beleco mia,
Mi kun soleno donas manon mian,
Sed nur al heredist' de Moskva trono,
Nur al reĝido, kiun sorto savis.

UZURPULO. Marino bela, vi min ne turmentu,
Ne diru, ke ne min, sed mian rangon
Elektis vi. Marino, vi ne scias,
Ke vi al mi per tio koron pikas.
Ĉu vere, se... ho, dubo plej terura!
Eldiru : se al mi ne reĝan naskon
Antaŭdifinus mia blinda sorto,
Se mi ne estus filo de Johano,
Ne tiu ĉi infano forgesita, —
Ĉu tiam... tiam vi min ankaŭ amus?

MARINO. Dimitrij, vi ali' ne povas esti;
Alian mi ne amus.

UZURPULO. Ne! sufiĉe —
Ne volas mi dividi kun mortinto
Al li apartenantan amantinon;
Sufiĉe sin ŝajnigi! mi eldiros
Jam tutan veron; sciu, ke Dimitrij
Pereis, mortis — kaj ne reviviĝos;
Ĝu volas scii vi, mi kiu estas?
Al vi mi diros : estas mi monaĥo;
Ekenuinte de mallibereco,
Mi sub kapuĉo mia grandan planon
Pripensis; mi al mondo mirindaĵon
Preparis, kaj el monaĥej' forkuris
Mi al kozakoj bruaj kaj kuraĝaj;
Ellernis rajdi mi kaj glavon uzi,
Al vi mi venis, nomis min « Dimitrij »
Kaj polojn mi sencerbajn tute trompis.
Nu, kion diros, vi, Marin'fiera?

Digitized by Google

Ĉu vi kontentas per konfeso mia?
Silentas vi?

MARINO. Ho, honto, ho, malĝojo! (Silento.)

UZURPULO (mallaŭte). Ho, kien do entiris min ĉagreno!
Feliĉon, malfacile konstruitan,
Mi por eterne, eble, pereigis.
Mi estas malsaĝul'! (Laŭte.) Mi vidas, vidas;
Vi forte hontas je ne princa amo;
Eldiru do al mi fatalan vorton,
En via man' vi havas mian sorton;
Atendas mi. (Stariĝas sur genuojn.)

MARINO. Vin levu, uzurpulo!
Ĉu pensas vi en mi, per genuflekso,
En konfidema kvazaŭ knabineto,
Vantegan mian koron favorigi?
Eraris vi : mi ĉe piedoj miaj
Eĉ grafojn noblajn, kavalirojn vidis;
Sed ilin malvarmege mi forjetis, —
Kaj ne por vi, monaĥo forkurinta....

UZURPULO (sin levas). Ne malestimu junan uzurpulon;
En li sin kaŝas, eble, grandaj ecoj,
Je Moskva reĝa trono tute indaj
Kaj indaj je plej kara mano via....

MARINO. Je maŝo indaj, ho arogantulo!

UZURPULO. Mi estas kulpa: dank' al fiereco
Mi Dion trompis, trompis ankaŭ reĝojn, —
Mensogis mi; sed vi min ekzekuti
Ne povas; antaŭ vi mi estas prava.
Ne, mi ne povis trompi vin, Marino.
Por mi vi estis sola nur sanktaĵo,
Kun ĝi ŝajnigi min mi ne kuraĝis :
Nur amo, amo nur ĵaluza, blinda,
Nur sola amo mia min devigis
Eldiri....

MARINO. Ho, per kio vi vin laŭdas!
Konfeson vian ĉu postulis iu?

Digitized by Google

Se vi, vagist' sennoma, nesciata,
Mirinde du popolojn jam blindigis, —
Almenaŭ nun vi nepre devas esti
Je via sukcesego tute inda
Kaj kuraĝegan trompon garantii
Nun per sekret' profunda kaj eterna.
Nu, diru, ĉu mi povas min aldoni
Al vi kaj, forgesinte mian genton
Kaj honton virgan, mian bonan sorton
Kunigi kun mizera via sorto,
Se mem vi ĉiam tiel flirtanime
Kaj simple malhonoron vian montras?
Vi nur pro amo ĉion elbabilis!
Mi miras, kial antaŭ mia patro
Vi ne malkovris sin pro amikeco,
Aŭ ankaŭ antaŭ nia reĝ' pro ĝojo,
Aŭ antaŭ eĉ sinjoro Viŝneveckij
Pro fervorego de fidela sklavo.

UZURPULO. Al vi mi ĵuras, ke el koro mia
Nur vi konfeson povis elturmenti;
Mi ĵuras, ke neniam kaj nenie,
Nek en festeno ĉe pokal' da vino,
Nek en amika kora parolado,
Nek sub tranĉilo, nek en turmentado —
Sekreton tiun ĉi mi elbabilos.

MARINO. Al mi vi ĵuras, kaj mi devas kredi.
Mi kredas! Sed, ĉu povas mi ekscii,
Per kio ĵuras vi? Per nom' de Dio,
Vi, pia kvazaŭfil' de jezuitoj?
Aŭ pér honor', kiel heroo nobla?
Aŭ, eble, kiel vera reĝa filo,
Per sola reĝa vort'? Ĉu tiel? Diru.

UZURPULO (fiere). Min ombro de Minaca reĝ' filigis,
« Dimitrij » min el ĉerk' malluma nomis,
Kaj ĉirkaŭ mi popolojn ekondigis, —
Kaj por ofer' al mi Borison donis.

Digitized by Google

Reĝido — mi. Sufiĉe! Mi nun hontas,
Ke antaŭ vi, fierulino pola,
Mi malaltiĝis. Fino! Nun adiaŭ!
Milita ludo, miaj grandaj zorgoj
Sopiron aman, eble, silentigos.
Ho, kiel vin komencos mi malami,
Forpasos kiam malhonora amo!
Mi iros nun, — aŭ krono, aŭ pereo
Atendas en Rusujo mian kapon;
Ĉu en batalo mi honore mortos,
Aŭ kiel eĉ krimul' sur ŝtipo placa, —
Ne estos vi jam mia amikino;
Kun mi vi mian sorton ne dividos;
Sed iam, eble, forte vi bedaŭros
Pri tiu sorto, kiun vi forĵetis.

MARINO. Sed se mi ĝustatempe vian trompon
Elmontros klare antaŭ ĉiuj homoj?

UZURPULO. Vi, eble, pensas, ke mi vin timegas!
Ke oni kredos al knabino pola
Pli multe, ol al mí, reĝido rusa?
Sed sciu: reĝo, papo kaj sinjoroj
Ne pensas eĉ pri ver' de vortoj miaj.
Dimitrij mi, aŭ ne — egale estas,
Mi estas nur preteksto de milito.
Nur tion ĉi bezonas ili; vin do,
Ribelistin'. silenti ili igos.
Adiaŭ.

MARINO. Ho, reĝido, haltu. Fine
Mi aŭdas jam parolon de grandaĝo.
Kun vi ĝi, princo, tute min pacigas.
Atencon senprudentan mi forgesas,
Reĝidon ree vidas. Sed aŭskultu:
Jam tempo, tempo estas! Ne prokrastu,
Konduku regimentojn vi al Moskvo;
Posedu Kremlon, ankaŭ tronon Moskvan —
Kaj poste jam al mi svatiston sendu;

Digitized by Google

Sed, aŭdas Dio, dum piedo via
Ankoraŭ ne ekpaŝos tronajn ŝtupojn,
Dum ne deĵetos vi de tron' Borison,
Pri via am' mi tute ne aŭskultos. (Foriras.)

UZURPULO. Plivolas mi kun Godunov batali,
Aŭ ruzi kun kortega jezuito,
Ol kun virin'. Diablo ilin prenu!
Konfuzas, elkurbiĝas ŝi, kaj rampas,
El manoj lerte glitas, muĝas, pikas...
Serpento estas!... Mi ne vane tremis.
Ŝi nun apenaŭ min ne pereigis.
Sed mi decidis : morgaŭ ni eliros.

Limo Litva (16 Oktobro 1604).

Princo KURBSKIJ kaj UZURPULO, ambaŭ estas rajde.
Regimentoj proksimĝas al limo.

KURBSKIJ. (Alveturinte unue.)
Jen estas ĝi, jen estas rusa limo!
Rusujo sankta! mi jam estas via!
Kun malestim' mi polvon alilandan
Forskuas; kun avid' aeron novan
Enspiras mi : por mi ĝi estas hejma;
Ho, patro mia! nun animo via
Konsolis tute sin, kaj jam en ĉerko
Ekĝojos viaj malfeliĉaj ostoj!
Hered' ekbrilis ree nia grava,
Plej glora glav' — de Moskvaj reĝoj servo!
Nun en festeno brua ekdibocos
Ĝi pro espero-reĝo, patro nia!...

UZURPULO. (Li veturas malrapide kun mallevita kapo.)
Feliĉa estas li! animo pura
En li de ĝojo, gloro ekpetolis!
Heroo mia, ho mi vin envias!
Heroo, en ekzilo edukita,
Ofendojn patrajn tute forgesinte,

Digitized by Google

Liberiginte lian kulpon tutan,
Vi prepariĝas pro Johana filo
Nun verŝi vian sangon, — leĝan reĝon
Redoni al patrujo... Estas vero,
En vi anim' de ĝojo devas flami.

KURBSKIJ. Ĉu vi ne ĝojas en animo via?
Rusujo estas via jam, reĝido.
En ĝi jam vin atendas ĉiuj koroj,
Kaj via Moskvo, via Kreml' kaj regno.

UZURPULO. Ho! Kurbskij! Rusa sango elverŝiĝos!
Batalas vi pro reĝ', vi estas puraj.
Sed mi kondukas kontraŭ fratoj; Litvon
Mi sur Rusujon vokis; mi en Moskvon
Al malamikoj bonan vojon montras!
Sed ne sur min ekfalu mia peko,
Sed nur sur vin, Boris — reĝmortiginto!
Antaŭen!....

KURBSKIJ. Jes antaŭen! kaj pereo
Al Godunov, al mortigint' de reĝo!

(Ili rapide veturas. Regimentoj transiras limon.)

Reĝa magistrato.

REĜO, PATRIARKO kaj BOJAROJ.

REĜO. Ĉu ebla ĝi? Monaĥo forkurinta
Al ni kondukas krimajn kolegarojn,
Al ni kuraĝas eĉ minaci! Tempo
Jam estas humiligi malsaĝulon!
Veturu vi, Trubeckij kaj Basmanov;
Bezonas helpon niaj vojevodoj.
De ribelisto ĉirkaŭita estas
Ĉernigov. Savu urbon.

BASMANOV. Mia reĝo!
De nun apenaŭ pasos tri monatoj —
Kaj eksilentos fam' pri uzurpulo;
Ni Moskvon baldaŭ lin alveturigos

Digitized by Google

En fera kaĝo, kvazaŭ beston. Ĵuras
Per Dío mi. (Li kun Trubeckij foriras.)
REĜO. Al mi regnestro Sveda
Per senditaro ligon proponadis;
Sed ne bezonas ni malpropran helpon —
Sufiĉe ni da propraj homoj havas,
Por forrebati perfidistojn litvajn.
Rifuzis mi.
Ŝĉelkalov! tuj dissendu
Ordonojn vi al ĉiuj vojevodoj,
Ke ili tuj sidiĝu sur ĉevalojn
Kaj ke por servo siajn homojn sendu;
En monoĥejoj ankaŭ vi elektu
Servantojn kelkajn. En pasintaj jaroj,
Mizero kiam al patruj' minacis,
Monaĥoj mem por batalado iris;
Sed nun tumulti ilin ni ne volas —
Por ni preĝadu ili : tia estas
Ordono kaj aljuĝo de bojaroj.
Kaj nun dissolvu ni demandon gravan :
Vi scias, ke malbona uzurpulo
Dismetis ĉie plej malican famon;
De li leteroj ĉie dissenditaj
Produktis dubon kaj tumulton grandan :
Sur placoj vagas murmuret' ribela,
Kaj saĝoj bolas:.. oni devas ilin
Malmute malvarmigi; mi tre volus
Al ekzekutoj multaj antaŭveni, —
Sed kiel kaj per kio? nun decidu.
Vi, sankta patro, vian penson diru.
PATRIARKO. Benita estu Dio, inspirinta
Favoron kaj kvietan paciencon
Al via koro, ho, regnestro granda;
Ne volas vi pereon de pekanto.
Sed vi atendas, ke erar' forpasu :
Forpasos ĝi, sun' de eterna vero

Digitized by Google

Lumigos ĉiujn. —
Mi, preĝanto via,
En faroj mondaj tre ne kompetenta,
Kuraĝas nun al vi eldiri jenon :
Diabla fil', fripono malbenita,
Nomadas sin « Dimitrij » en popolo;
Per nomo de reĝid', per vesto kvazaŭ
Malpropra, li sin tute, ŝajne, kaŝis;
Sed nur diŝsiru ĝin — kaj li subite
Malhonoriĝos per nudeco propra.
Jen Dio mem al ni rimedon sendas :
Regnestro, sciu : antaŭ ses jam jaroj,
En tiu sama jaro, kiam Dio
Vin por regado en favoro benis —
Al mi en hor' vespera iam venis
Paŝtisto simpla, maljunul' grandaĝa;
Mirindan diris li al mi sekreton :
« Mi en juneco, diris li, blindiĝis,
Kaj sciis mi nek nokton kaj nek tagon
Ĝis maljuneco. Vane min kuracis
Per herboj mi kaj per almurmurado,
Kaj vane mi iradis por saluto
En monaĥejoj al mirindfaristoj,
Kaj vane ŝprucis mi el sanktaj putoj
Okulojn blindajn per saniga akvo —
Al mi ne sendis Dio resaniĝon.
Jen, fine, mi esperon tute perdis,
Alkutimiĝis, kaj eĉ miaj sonĝoj
Al mi neniajn jam alprezentadis
Objektojn ekzistantajn en naturo,
Nur sonojn sonĝis mi.
Jen unu fojon
En sonĝo aŭdas mi, ke voĉ' infana
Al mi ekdiris : iru, maljunulo,
Ugliĉon, de Aliformiĝ' preĝejon;
Sur mia tombo tie vi ekpreĝu,

Digitized by Google

Favora Dio, eble, vin pardonos.
Sed kiu vi? demandis mi infanon.
Dimitrij mi, reĝido. Reĝ' ĉiela
Akceptis min en rondon de anĝeloj
Kaj nun mi — granda mirindaĵfaristo.
Ekiru, maljunulo. Mi vekiĝis
Kaj pensis : eble, efektive, Dio
Al mi donacas sanktan resaniĝon.
Kaj mi ekiris malproksiman vojon.
Ugliĉon mi atingis; jen mi venas
Preĝejon sanktan kaj aŭskultas preĝon,
Kaj en fervoro mi anima ploras,
Sed tiel dolĉe, kvazaŭ jam blindeco
Per larmoj el okuloj miaj fluis.
Popolo jam eliris, — kaj mi diris
Al nepo : min konduku vi al ĉerko
De sankt-reĝido. Kaj knabeto mia
Kondukis min, — kaj nur mi antaŭ ĉerko
Mallaŭtan preĝon pie elparolis,
Okuloj sin malfermis : kaj ekvidis
Mi lumon Dian, nepon kaj tombeton. »
Jen, reĝo, kion maljunul' rakontis.

(Komuna konfuzo. En daŭro de tiu ĉi rakonto Boris kelkajn fojon elvisas per tuketo vizaĝon.)

Ugliĉon tiam mi intence sendis
Servanton, kaj eksciis li, ke multaj
Ricevis resaniĝon antaŭ ĉerka
Tabulo de reĝido mortigita.
Konsilas mi : restaĵojn sanktajn Kremlon
Transporti kaj starigi en preĝejo
De Ĉefanĝeloj : kaj popolo klare
Ekvidos tiam trompon de krimulo,
Kaj fort' diabla tute malaperos.

(Silento.)

Princo Ŝujskij. Ho, sankta patr', intencojn de Plejsupra
Ĉu scias iu? Miilin ne kritikos.

Digitized by Google

Neputran morton, forton mirindfaran
Li povas doni al infanaj ostoj;
Sed oni devas famon de popolo
Esplori tre atente, senpartie;
Kaj ĉu ni povas nun, en brua tempo,
Eĉ pensi pri afero tiel grava?
Parolas oni, ke sanktaĵon uzas
Ni, kiel ilo, en aferoj mondaj.
Popolo jam sen tio ŝanceliĝas,
Kaj multe da paroloj bruaj estas:
Ne estas temp' ondigi saĝojn homajn
Per tiel grava nova enkonduko.
Mi vidas, ke forigi oni devas
De uzurpulo dismetitan famon;
Sed estas ja rimed' alia ankaŭ.
Regnestro, se vi nur al mi permesos,
Mi mem aperos tuj sur plac' popola,
Admonos mi, riproĉos malsaĝulojn
Kaj trompon de fripono mi elmontros.

REĜO. Nu, estu tiel! Sankta patriarko,
Mi petas vin palacon nian veni:
Bezonas mi kun vi interparoli.

(Li foriras; post li ankaŭ bojaroj.)

UNU BOJARO (mallaŭte al alia).
Ĉu vi rimarkis, kiel reĝ' paliĝis,
Kaj ŝvito de vizaĝo lia gutis?

DUA. Mi ne kuraĝis eĉ okulojn levi,
Mi ne kuraĝis spiri kaj min movi.

UNUA. Kaj liberigis Ŝujskij'-princ'. Bravulo!

Placo antaŭ katedra preĝejo en Moskvo.

POPOLO.

UNUA. Ĉu baldaŭ jam reĝo eliros el preĝejo?
DUA. Meso finiĝis; nun fariĝas preĝo?
UNUA. Kio do? oni jam malbenis lin?

Digitized by Google

DUA. Mi staris en vestiblo kaj aŭdis, ke diakono anoncis : Griŝko Otrepiev estu malbenita!

Unua. Malbenu, malbenu; reĝinon ne interesas Griŝko.

DUA. Kaj al reĝo unu oni kantas eternan memoron.

UNUA. Eternan memoron al viva! Ho, kiaj ili estas malpiuloj!

TRIA. Jen bruo! Ĉu ne reĝo?

KVARA. Ne, tio ĉi estas frenezulo.

(Eniras FRENEZULO, en fera ĉapo, pripendigita pêr ĉenoj kaj ĉirkaŭita per KNABETOJ.)

KNABETOJ. Fera ĉapeto! Fera ĉapeto!...

MALJUNULINO. Forlasu lin, diabletoj. Preĝu, feliĉulo, por mi peka.

FRENEZULO. Donu, donu, donu kopekon!

MALJUNULINO. Jen vi havas kopekon; preĝu do por mi.

FRENEZULO (Sidiĝas sur teron kaj kantas) :

Luno veturas,
Kateto ploras,
Frenezulo, vin levu,
Dion preĝu!

(KNABETOJ ree lin ĉirkaŭas.)

UNU EL ILI. Bonan tagon, frenezulo, kial do vi ĉapon ne deprenas? (frapas lian feran ĉapon). Jen, kiel ĝi sonas!

FRENEZULO. Jen, mi kopekon havas.

KNABETO . Ne estas vero! nu, montru.

(Deprenas kopekon kaj forkuras).

FRENEZULO (ploras). Oni prenis mian kopekon, oni ofendis frenezulon.

POPOLO. Reĝo, reĝo iras!

(Reĝo eliras el preĝejo; bojaro antaŭe disdonas al malriĉeguloj almozon. Bojaroj.)

FRENEZULO. Boris, Boris! Knabetoj ofendas frenezulon.

REĜO. Donu al li almozon! Pri kio li ploras?

FRENEZULO. Knabetoj min ofendas.... Ordonu ilin forbuĉi, kiel vi forbuĉis malgrandan reĝidon.

BOJAROJ. Iru for, malsaĝulo! Kaptu malsaĝulon!

Digitized by Google

REĜO. Forlasu lin. Preĝu por mi, frenezulo. (Foriras.)
FRENEZULO (tuj poste al li). Ne, ne! Oni ne povas preĝi por reĝo-Irodo : Dipatrino ne permesas.

Sjevsko [1].

UZURPULO, ĉirkaŭita per siaj homoj.

UZURPULO. Kaptito kie?
POLO. Tie ĉi.
UZURPULO. Alvoku!
(Eniras rusa kaptito.)
KAPTITO. Mi — Roĵnov; nobelo Moska.
UZURPULO. Ĉu longe servas vi?
KAPTITO. Monato pasis.
UZURPULO. Ĉu vi ne hontas, ke vi levis glavon
Sur min, Roĵnov?
KAPTITO. Ne mia estas volo.
UZURPULO. Ĉu vi batalis sub Sjeverskij?
KAPTITO. Venis
Mi post batalo jam, post du semajnoj.
UZURPULO. Boriso kio?
KAPTITO. Forte timigita
Per perdo de batalo kaj per vundo
De princ' Mstislavskij, — kaj li princon Ŝujskij
Alsendis al militistaro.
UZURPULO. Kial
Devokis li en Moskvon Basmanov'on?
KAPTITO. Meritojn liajn rekompencis reĝo
Per oro kaj honor'. En magistrato
Li estas.
UZURPULO. Ĉi li estis pli neceŝa.
Nu, kio do en Moskvo?
KAPTITO. Tre kviete.
UZURPULO. Ĉu oni min atendas?
KAPTITO. Dio scias;
Pri vi paroli oni ne kuraĝas.

1. Malgranda urbeto.

Digitized by Google

Al unu langon, al alia kapon
Fortranĉas oni. Tia estas tempo,
Ke ĉiutage oni ekzekutas;
Malliberejoj tute jam pleniĝis;
Sur placo, kie nur tri homoj estas —
Spion' jam tie ankaŭ ĉirkaŭsaltas,
Kaj mem regnestro en libera tempo
Sekretajn raportistojn demandadas.
Pli bone, sekve, tute jam silenti.

UZURPULO. Ne enviinde vivas homoj moskvaj!
Nu, kaj militistaro kio?

KAPTITO. Kio?
Vestita estas ĝi kaj ankaŭ sata,
Kontenta estas.

UZURPULO. Ĉu ĝi estas granda?

KAPTITO. Nur Dio scias.

UZURPULO. Tridek miloj estas?

KAPTITO. Eĉ povas vi kalkuli kvindek miloj!

(Uzurpulo enpensiĝas; ĉiuj rigardas unu alian.)

UZURPULO. Nu! kaj pri mi parolas oni kion?

KAPTITO. Pri via princa moŝto oni diras,
Ke, se eĉ estus vi fripono, tamen
Bravulo.

UZURPULO (ridante). Tion ĉi mi en afero
Elmontros. Nu, amikoj, ne atendu
Ni princon Ŝujskij; mi vin nun gratulas:
Batalo estos morgaŭ. (Foriras.)

ĈIUJ. Vivu Dmitrij!

POLO. Batalo! Ili havas kvindek milojn,
Kaj ni apenaŭ havas dekkvin milojn:
Li freneziĝis.

DUA. Nu, amiko: polo
Eĉ sola povas venki kvincent rusojn.

KAPTITO. Vi venkos! En batal', fanfaronulo,
De unu eĉ forkuros vi rapide.

POLO. Se glavon havus vi, arogantulo,

Digitized by Google

Mi vin (montrante sian glavon) per tio ĉi ekhumiligus.
KAPTITO. Ho, rusoj tute ne bezonas glavon :
Ĉu vi ne volas tion ĉi, sencerba!
(Montras pugnon. Polo fiere rigardas ĝin kaj silente foriras. Ĉiuj ridas.)

Arbaro.

UZURPULO kaj PUŜKIN. (En malproksimo kuŝas mortanta ĉevalo.)

UZURPULO. Ĉevalo malfeliĉa! Kiel vigle
Eksaltis ĝi hodiaŭ en batalon,
Vundita min rapide kiel portis.
Ĉevalo malfeliĉa!
PUŜKIN (al si men). Li bedaŭras
Ĉevalon, dum militistaro tuta
En polvon disbatita nun.
UZURPULO. Aŭskultu,
Ĝi, eble, nur de vundo eklaciĝis
Kaj ĝi ripozas?
PUŜKIN. Ne, ĝi malviviĝas.
UZURPULO (iras al ĉevalo). Ĉevalo mia! Kion fari? bridon
Forpreni kaj deseli. Malviviĝu
En liberec'.
(Li deselas ĉevalon. Eniras kelkaj poloj.)
Sinjoroj, bonan tagon!
Sed kial mi ne vidas princon Kurbskij?
Hodiaŭ mi lin vidis en batalo ;
Bravulon tuj ĉirkaŭis multaj glavoj,
Similaj je fiekseblaj feraj spikoj;
Sed lia glavo levis sin plej supre
Kaj forta krio ĉion supersonis.
Li kie estas?
POLO. Oni lin mortigis.
UZURPULO. Ho, estu paco al anim' kuraĝa!
Sed ni malmultaj post batalo restis!
Kozakoj, perfiduloj malbenitaj,
Krimuloj! vi, nur vi nin perceigis!

Digitized by Google

Eĉ tri minutojn ili ne eltenis!
Ni ilin punos : dekan mi pendigos!
Rabistoj!

PUŜKIN. Iu estas, eble, kulpa,
Sed estas ni jam tute disbatitaj
Kaj ekstermitaj.

UZURPULO. Sed afero povus
Tre bona esti; mi unuan vicon
Detruis, sed germanoj nin debatis;
Bravuloj ili estas! jes, bravuloj!
Por tio ilin amas mi; mi nepre
El ili kolegaron mian faros.

PUŜKIN. Hodiaŭ kie ni pasigos nokton?

UZURPULO. Jen tie ĉi, — en tiu ĉi arbaro.
Eliros frue ni; en Rilsk'on venos
Ni al tagmanĝo mem. Nu, bonan nokton.

(Li kuŝiĝas, metas selon sub kapon kaj ekdormas.)

PUŜKIN. Agrablan nokton!... Tute disbatita,
Reĝido, per forkuro sin savanta,
Li, tute kvazaŭ knab', senzorga estas;
Kredeble Dio mem lin ĉiam gardas, —
Kaj ankaŭ ni, amikoj, ne malĝoju!

Moskvo. Reĝaj ĉambroj.

BORIS, BASMANOV

REĜO. Venkita estas li, sed ĉu ni havas
Utilon? ĝojis ni de vana venko.
Kolektis ree li militistaron
Kaj nin minacas de Putivlaj muroj.
Kaj kion do herooj niaj faras?
Ĉe Kromoj [1] ili staras, kaj kozakoj
Je ili ridas nur el ĉirkaŭbaroj.
Jen gloro! Ne, ne estas mi kontenta;
Mi kiel estron — vin al ili sendos —
Ne genton, sed nur saĝon — vojevodon

1. Malgranda urbeto.

Digitized by Google

Mi faros; ili pri rangec' malĝoju!
Jam tempo estas malestimi plendon
De eminenta gento de bojaroj
Kaj plej perean moron fordetrui.

BASMANOV. Ho, reĝo mia! estu plej benita
Eterne tago, kiam rangajn librojn
Kaj kune ankaŭ kaj malpacojn ĉiujn,
Kaj fierecon gentan flam' ekstermos.

REĜO. Jam tre proksima estas tiu tago;
Unue nur mi devas humiligi
Popolon.

BASMANOV. Ho, ŝatinda ĝi ne estas!
Popolo estas ĉiam ribelema:
Ĉevalo vigla tiel mordas bridon,
Indignas tiel knab' potencon patran;
Ĉevalon do rajdant' direktas bone
Kaj patro ĉiam knabon ordonadas.

REĜO. Ĉeval' rajdanton iafoje ĵetas,
Ne ciam ankaŭ fil' al patr' obeas:
Ni povas nur per severeco granda
Popolon teni. Tiel pensis ankaŭ
Johan', humiligisto de ventegoj,
Plej saĝa, plej potenca aŭtokrato,
Kaj ankaŭ lia furioza nepo.
Popol' favoron tute ne sentadas;
Vi faru bonon — ĝi ne diros dankon;
Vi rabu, batu — rezultat' egala.

(Eniras bojaro.)

Nu, kio?

BOJARO. Gastoj alilandaj venis.

REĜO. Akceptos mi, atendu min, Basmanov,
Vi restu tie ĉi: kun vi bezonas
Paroli mi. (Foriras.)

BASMANOV. Spirito alta reĝa!
Nur uzurpulon malbenitan venki
Lin helpu, Dio; li ankoraŭ multe

Digitized by Google

Da bono al Rusujo povas fari.
En lia saĝo bona pens' naskiĝis —
Ne volas mi, ke ĝi foriĝu. Kia
Por mi areno estos, kiam rompos
Li kornon al bojaroj altagentaj.
Mi konkurantojn en milit' ne havas;
Mi apud reĝa tron' unua staros....
Kaj. eble.... Sed pro kio estas bruo?

(Tumulto, Bojaroj, kortegaj servantoj kuras en senordo, sin renkontadas, kaj murmuretas.)

UNUA. Al kuracisto!
DUA. Tuj al patriarko!
TRIA. Reĝidon, li al si reĝidon vokas!
KVARA. Konfesprenanton!
BASMANOV. Kio da fariĝis?
KVINA kaj SESA. Ekmalsaniĝis reĝo, reĝo mortas.
BASMANOV. Ho, Dio!
KVINA. Li de tron' subite falis,
Ekfluis sang' el buŝ' kaj el oreloj.

(Reĝon oni elportas sur seĝo; tuta reĝa familio; ĉiuj bojaroj.)

REĜO. Eliru ĉiuj, ĉiuj — kaj forlasu
Kun mi reĝidon solan. (Ĉiuj foriras.) Nu, mi mortas;
Ni kisu nin. Ho, mia fil', adiaŭ:
Tuj vi komencos reĝi... Dio, Dio!
Al Vi mi tuj aperos — kaj animon
Ne estas tempo per konfes'purigi!
Mi sentas — filo, vi por mi pli kara,
Ol sav' anima estas.... tiel estu!
Subulo mi naskiĝis, kaj subulo
Mi morti ankaŭ devas en mallumo;
Jen tronon mi atingis — sed per kio?
Vi ne demandu. Vi ne estas kulpa,
Sufice... Nun vi jam laŭ rajto reĝos,
Kaj sola mi al Dio mem respondos.
Ho, filo! ne forlogu vin malvere,
Kaj ne blindigu ankaŭ vin memvole.

Digitized by Google

En bruaj tagoj prenas vi potencon :
Tre, tre danĝera estas uzurpulo —
Per nom' terura estas li vestita.
De longa tempo en regado sperta,
Eltenis mi konfuzon kaj ribelon :
En timo oni antaŭ mi tremadis,
Perfido voĉon doni ne kuraĝis;
Sed vi — ne sperta, juna potenculo,
Sub forta fulmotondr' vi kiel reĝos?
Ribelon bruan kiel vi estingos?
Perfidon kiel vi de vi deturnos?
Sed Dio granda estas! Li junecon
Saĝigas kaj al malforteco donas
Li forton... Jen, aŭskultu : vi unue
Por vi elektu konsiliston bonan,
Fidindan, malvarmegan kaj maljunan,
Amatan de popolo kaj honoran
De gento glora inter bojararo —
Ekzemple, Ŝujskij. Por militistaro
Necesa estas lerta kondukanto :
Vi sendu Basmanovon kaj fortike
Eltenu plendon de bojaroj noblaj.
Vi de junec' kun mi en magistrato
Sidadis, scias vi regadon regnan;
Ne ŝanĝu vi iradon de aferoj.
Kutim' — animo estas de potenco.
Mi devis nun denove refarigi
Ekzekutadojn, malfavorojn — povas
Forigi ilin vi; kaj oni benos
Vin, kiel oni benis vian onklon,
Prenintan tronon de Minaca reĝo.
Sed poste iom vi post iom ree
Kuntiru forte regnajn kondukilojn;
Kaj nun vi povas ilin malfortigi,
El mano tamen ne elforlasante.
Favora estu al alilanduloj,

Digitized by Google

En servon ilin kun konfid' akceptu.
Konservu religian regularon.
Silenta estu; reĝa voĉ' ne devas
Sin perdi tute vane en aero :
Ĝi, kvazaŭ sankta son', anonci devas
Aŭ grandan feston, aŭ malĝojon grandan.
Ho, filo! Vi eniras tiujn jarojn,
En kiuj sang' ondiĝas de virinoj.
Ho, gardu, gardu vi purecon sanktan
De virguleco kaj fieran honton :
Se iu en juneco plezuriĝi
Kutimis per malvirta sentameco,
En granda aĝo tiu malafabla,
Malforta, sangavida ĉiam estas,
Kaj lia saĝo tute mallumiĝas.
En familio estu ĉiam kapo;
Patrinon vi estimu, sed potencu
Vi mem : vi estas viro kaj regnestro;
Fratinon vian ĉiam vi amadu,
Ĉar sola restas ŝia vi gardisto.

TEODORO (sur genuoj). Ne, ne, vi vivu kaj eterne reĝu —
Popol' kaj ni sen vi pereos tute!

REĜO. Finita estas ĉio — mallumiĝas
Okuloj miaj, jam malvarmon tomban
Mi bone sentas....

(Eniras patriarko, monaĥoj; post ili ĉiuj bojaroj; reĝinon oni konduka sub brakoj; reĝidino ploregas.)

Kiu tie estas?
Ha! sankta monaĥigo... Jes, tre bone...
Eksonis horo! Reĝo jam monaĥo
Fariĝas, — ĉerk' — ĉambreto mia estos.
Atendu, sankta patriark' : ankoraŭ
Mi reĝo estas... Ho, bojaroj miaj!
Jen estas tiu, kiu min heredas, —
Al li potencon mian mi transdonas;
Al Teodoro ĵuru... ho, Basmanov,

Digitized by Google

Amikoj miaj... antaŭ ĉerk' petegas
Mi vin : al li fervore, vere servu!
Li tiel juna estas kaj senkulpa.
Ĉu ĵuras vi?

BOJAROJ. Ni ĵuras.

REĜO. Mi kontentas.
Pardonu do al mi erarojn, pekojn,
Ofendojn volajn kaj sekretajn....
Estas
Mi preta jam, — aliru, sankta patro...

(Komenciĝas ceremonio de monaĥigado. Virinojn en sveno oni elportas.)

Tendaro.

BASMANOV kaj PUŜKIN.

BASMANOV. Eniru, tie ĉi libere diru,
Kaj tiel sekve li al mi vin sendis?

PUŜKIN. Al vi ĉiaman amikecon sian
Proponas li kaj plej unuan rangon
En Moskva regno.

BASMANOV. Sed sen tio estas
De Teodoro mi jam starigita
Tre alte : de militistar' mi estas
Unua estro; li pro mi eĉ rangojn
Aristokratajn malestimis tute.
Al li mi ĵuris.

PUŜKIN. Ĵuris vi al leĝa
De trono heredanto; sed se vivas
Pli leĝa?...

BASMANOV. Ne, aŭskultu, Puŝkin : kial
Malveron vi parolas? Mi ja scias,
Li kiu estas.

PUŜKIN. Litvo kaj Rusujo
Jam longe nomis lin « reĝid' Dimitrij »;
Sed tion ĉi mi tute ne defendas.
Ne ĝusta, eble, li Dimitrij estas,

Digitized by Google

Li estas, eble, ia uzurpulo;
Nur scias mi, ke frue, aŭ malfrue,
Sed Teodor' al li ekcedos Moskvon.

BASMANOV. Dum mi defendas mian junan reĝon,
Ĝis tiu temp' li tronon ne forlasos;
Da regimentoj ni sufiĉe havas!
Per venko nur mi ilin kuraĝigos, —
Sed kontraŭ mi de vi eliros kiu?
Kozak' Karelo, eble, — eble Mniŝek?
Ĉu multaj vi? apenaŭ ja ok miloj.

PUŜKIN. Eraris vi; eĉ tiom ni ne havas.
Mi diros eĉ, ke ni militistaron
Malbonan tute havas, ke kozakoj
Vilaĝojn rabas nur, ke ĉiuj poloj
Nur multe fanfaronas kaj drinkadas,
Ke rusoj... Eĉ paroli mi ne volas, —
Mi antaŭ vi malici ne deziras;
Sed ĉu ekscii volas vi, Basmanov,
Per kio ĉiam fortaj ni restadas?
Ne per militistaroj, ne per poloj,
Sed nur per opinio de popolo.
Memoras vi triumfon de Dimitrij,
Almilitadojn liajn tute pacajn?
Al li sen pafo, sen batalo ĉie
Sin donis obeeme ĉiuj urboj,
Kaj vojevodojn mem popolo ligis;
Vi vidis mem : ĉu viaj regimentoj
Kun li batalis tre volonte? Kiam?
Ankoraŭ apud Godunov! Sed nune?
Ho ne, Basmanov. tre malfrue estas
Disputi kaj inciti ree flamon
De tute finiĝinta jam milito :
Kun via saĝo kaj kun forta volo
Eĉ ne eltenos vi; pli bone estos,
Se vi unua donos plej prudentan
Ekzemplon kaj anoncos, ke Dimitrij

Digitized by Google

Regnestro leĝa estas, — estos bone,
Per tio lin vi tute kontentigos!
Vi kiel pensas?

BASMANOV. Morgaŭ vi ekscios.

PUŜKIN. Decidu.

BASMANOV. Nu, adiaŭ.

PUŜKIN. Vi pripensu.

(Li foriras.)

BASMANOV. Jes, prava li, perfido maturiĝas;
Sed kion faros mi? Ĉu mi atendos,
Ke ribelistoj ankaŭ min kunligu
Kaj al Otrepjev donu? Ĉu ne estos
Pli bone, se mi antaŭvenos ilin
Kaj mem... Sed ĵuron, ĵuron mi perfidos!
Eterne perdos mi honoron mian!
Konfidon de junulo kronportanto
Mi pagos per perfido plej terura!...
Al elpelito estas tre facile
Ribelon kaj konspiron pripensadi;
Sed mi, sed mi, amato de regnestro....
Sed mort'... potenco... de popol' mizeroj....

(Li enpensiĝas.)

He! kiu tie estas? (fajfas) Nu, alvenu!
Ĉevalon! Kaj trumpetu tuj kolekton!

Ekzekutejo.

Iras PUŜKIN, ĉirkaŭita per POPOLO.

POPOLO. Al ni reĝido jen bojaron sendis.
Aŭskultu, kion li al ni parolos.
Alvenu tien ĉi!

PUŜKIN (sur tribuno). Regnanoj Moskvaj!
Saluti vin al mi reĝid' ordonis. (Salutas.)
Vi bone scias, kiel zorg' ĉiela
Reĝidon nian de krimulo savis;
Kaj li krimulon ekzekuti iris,

Digitized by Google

Sed Dia juĝo batis jam Boris'on.
Rusujo al Dimitrij humiliĝis,
Basmanov mem al li kun pent' fervora
Jam alkondukis siajn regimentojn,
Al vi Dimitrij iras ame, pace.
Ĉu levos glavon vi, pro kontentigo
Al familio de Boris', sur reĝon
Plej leĝan kaj sur nepon Monomaĥan?

POPOLO. Sendube ne.

PUŜKIN. Regnanoj karaj Moskvaj!
Vi ĉiuĵ scias, kiam vi suferis
Sub potencado de fremdul' kruela :
Depagojn, ekzekutojn, malfavoron,
Laboron kaj malsaton vi ekprovis.
Dimitrij do favori vin intencas,
Bojarojn ĉiujn kaj popolon tutan.
Ĉu estos vi obstinaj senprudente?
Ĉu vi forkuros de favoroj liaj?
Sed iras li sur Moskvan patran tronon
Ne sola, sed kun akompan' minaca.
Ne kolerigu reĝon, timu Dion!
Kaj ĵuru tuj al leĝa potenculo;
Ekhumiliĝu : sendu al Dimitrij
Vi patriarkon kaj bojarojn viajn,
Sekretariojn, elektitajn homojn, —
Salutu ili al regnesto — patro.

(Li foriras. Bruo popola.)

POPOLO. Pri kio pensi? Li parolis veron.
Dimitrij vivu! vivu nia patro!

VILAĜANO (sur tribuno). Popol'! popol'! En Kremlon!
Reĝajn ĉambrojn!
Kaj ligu tuj hundidon de Boriso!

POPOLO. (Rapide kuras en amaso.)
Dronigi! ligi! Vivu reĝ' Dimitrij!
Pereu tuta gento de Boriso!

Digitized by Google

Kremlo. Domo de Boriso Gardantoj apud perono.

TEODORO apud fenestro.

MALRIĈEGULO. Donu almozon, pro Kristo!

GARDANTOJ. Iru for! oni ne permesas paroladi kun enŝlositaj.

TEODORO. Foriru, maljunulo, mi estas pli malriĉa, ol vi: vi libera estas.

(Ksenio sub kovrilo aliras al fenestro.)

UNU EL POPOLO. Frato kaj fratino — malfeliĉaj infanoj, — kvazaŭ birdetoj en kaĝo.

DUA. Kiun vi kompatas? Malbenita gento!

UNUA. Patro estis krimulo, infanetoj do estas senkulpaj.

DUA. Pomo de pomarbo ne malproksime falas.

KSENIO. Frateto! frateto! Ŝajnas, al ni bojaroj iras.

TEODORO. Tio ĉi estas Golicin, Mosalskij. Aliajn mi ne konas.

KSENIO. Ha, frateto, koro formortas!

(Golicin, Mosalskij, Malĉanov kaj Ŝerefedinov; post ili tri pafistoj.)

POPOLO. Disiru, disiru, bojaroj iras.

(Ili eniras domon.)

UNU EL POPOLO. Kial ili venis?

DUA. Kredeble, ĵurigi Teodoron Godunov.

TRIA. Efektive. Ĉu vi aŭdas, kia bruo estas en domo?... Tumulto! oni batalas!

POPOLO. Ĉu vi aŭdas? Krieto! Tio ĉi estas virina voĉo. Eniru.... Pordoj estaj fermitaj — krioj eksilentiĝis — bruo daŭras.

(Pordoj sin malfermas. Mosalskij aperas sur perono.)

MOSALSKIJ. Popolo! Mario Godunov kaj ŝia filo Teodoro sin venenis. Ni vidis iliajn malvivulajn korpojn. (Popolo en teruro silentas.) Kial do vi silentas? Kriu: vivu reĝo Dimitrij Johanoviĉ!

(Popolo silentas.)

Digitized by Google

DEMONO

Orienta rakonto.

Parto unua.

I. Traflugis super peka mondo
Demon' malgaja, elpelita;
Li estis per bruega ondo
De rememoroj ĉirkaŭita, —
Pri tiu temp' feliĉa, bela,
En kiu estis li kerubo,
Kometo kiam lin ĉiela
Renkontis kun rideto hela
El forkurinta luma nubo;
Ankoraŭ kiam tra nebuloj
Li rigardadis kun sciemo
En spac' amason-da migruloj
Ĉielaj; kiam li kredema
Ankoraŭ estis kaj amema,
Unua kreitaĵo bona, —
Al li nek dubo, nek malbono
Konataj estis, lia saĝo
Ankoraŭ estis lumigita...
Kaj multe, multe... kai tutaĵo
Ne povis esti memorita.

II. Ĉielon longe li forlasis, —
En mond' li sen rifuĝo estis
Eterno post eterno pasis,
Minuto post minuto, restis
Li ĉiam multe enuanta.
Li, teron pekan posedanta,
Malbonon semis sen plezuro;
Neniu staris al demono
Kontraŭ' en lia art' terura, —
Kaj tedis jam al li malbono.

Digitized by Google

III. Kaj super suproj de Kaŭkazo
Demono flugis elpelita.
Kazbeko, diamanto kvazaŭ,
Per neĝ' eterna priŝutita,
Sub li brilegis; ond' Darjala
Simila je serpento pala,
Kurbiĝis, kaj Terek' ribela,
Saltante kiel leonino [1]
Kun vila kolaharo bela
Sur forta kaj potenca spino,
Kriegis; bestoj kaj birdetoj
Je ĝia voĉo atentadis,
De sudo ĝin akompanadis
Amaso ora da nubetoj;
Ŝtonegoj altaj, en dormeto
Al ĝi klininte kapojn grizajn,
Observis kun esprim' sekreta
Rapidkurantajn ondojn ĝiajn;
Kasteloj multaj sur ŝtonegoj
Minace staris en nebuloj,
Gardantaj kvazaŭ grandeguloj
Ĉe de Kaŭkazo mem pordegoj!
Sovaĝa kaj belega estis
Ĉirkaŭa mondo; tamen restis
Spirit' fiera malkontenta;
En sia koro tre malpenta
Rigardis li kun malestimo
Kreadon de potenca Dio,
Kaj profundaĵon de animo
Al li penetris tut' nenio....

IV. Jen autaŭ li pentraĵ' alia
De malproksime sin prezentis

1. Iam oni min riproĉis (s-ro Grabovskij), ke mi diris malveron, ĉar *leonino ne havas kolharon*; mi ĝin bone scias, sed mi ja estas nur tradukinto, kaj en originalo estas dirite « leonino » (Vidu verkaron de Lermontov). *Trad.*

Digitized by Google

Gruzujo per beleco sia
Spiriton de neigo tentis.
Feliĉa, luksa lando kia!
Ruinoj ĉie sin etendis,
Riveroj jen sonor-kurantaj
Sur fund' el ŝtonoj multkoloraj,
Kaj najtingaloj bonkantantaj
Pri amo flama de senkoraj
Virinoj belaj de montaro;
Jen densa ombro de ĉinaro [1],
Ĉirkaŭvolvita per hedero;
Kavernoj, kie ĝis vespero
Timeme kaŝas sin cervaro;
Brilado, vivo kaj bruado
Sonora, dolĉa parolado
Kaj spir' agrabla de kreskaĵoj;
Kaj tagoj varmaj voluptaĵaj,
Per ros' malsekigitaj stelaj
Brilantaj noktoj, kvazaŭ helaj
Okuloj de gruzino juna,
Simila je lumado suna.
Sed, krom envio malvarmega,
Ekscitis de naturo tento
En kor' demona malbonega
Nenian ŝanĝon eĉ en sento, —
Kaj ĉion, kion nun li vidis,
Li aŭ malamis, aŭ jeridis.

V. Tre altan domon, korton larĝan
Gudalo princ' al si konstruis....
De sklavoj ĝi laboron ŝarĝan
Postulis, kaj pro ĝi forfluis
Da larmoj multe el okuloj
De obeemaj servutuloj.
Matene sur montar' najbara

1. Ĉinaro estas plej amata arbo en Kaŭkazo. *Trad.*

Digitized by Google

De ĝiaj muroj ombroj iras;
Jen estas en ŝtoneg' ŝtuparo :
Ĝi de angula tur' siṇ tiras
Al rivereto; kaj Tamaro,
Princino juna kaj tre bela,
En ĉadro [1] blanka, ciam hela
Tre ofte tie ĉi iradas
Kaj akvon el Aragv' ĉerpadas.

VI. Silente de ŝtonego ĉiam
Rigardis domo mallumega;
Sed festo nun en ĝi grandega
Bruegas jen kiel neniam :
Gudal' forsvatis ĵus filinon
Kaj havis tutan familion.
Jen sur tapiŝoj, sur tegmento
Sidiĝas juna fianĉino
Kun sia bona amikino.
Jen post montaro en silento
Sin kaŝas jam radio suna.
Fraŭlinoj kantas, kaj ekprenas
Tintilon fianĉino juna.
Jen ŝi ĝin super kapo tenas,
Gracie dancas kaj tintilas,
Jen flugas, jen subite haltas,
Jen ree kvazaŭ ĉamo saltas, —
Rigardo ŝia hele brilas;
Jen brovojn nigrajn ŝi kuntiras,
Jen naĝas kun teniĝ' inklina,
Kaj lerte sur tapiŝo iras
Glitanta piedet' diina;
Kaj ŝi rigardas kun rideto
De bela, ĉasta infaneto.
Radio luna klara, bela
Je tiu ĉi rideto hela,

1. Ĉadro estas vualo, kiun uzas orientaj virinoj. *Trad.*

Digitized by Google

Plei juna, de mem viv' donita,
Ne povas esti komparita.

VII. Mi ĵuras je noktmezo stela,
Kaj je radioj de suriro,
De tago mem kaj de subiro, —
Regnestro de Persujo bela,
Neniu reĝo posedanta
Tielan kisis okuleton;
Nenia eĉ fontan' ŝprucanta
Per sia roso plej brilanta
Tielan lavis piedeton;
Ankoraŭ man' nenies tera
Kun amo flama kaj sincera
Tielajn harojn displektadis.
Jes, de komenc' de mondo nia,
Mi ĵuras, belulino tia
Sub suno suda ne floradis.

VIII. En patra domo ŝi kun ĝojo
Nun dancas jam en lasta fojo....
De sort' nenio ŝin defendos :
Ho ve! jen morgaŭ jam atendas
Ŝin, de Gudal' heredantinon,
De viva liberee' filinon,
Patrujo fremda, kaj alia
Malgaja sorto de sklavino
En fremda rondo familia.
Kaj ofte bela fianĉino
Malgajon sentis en animo;
Sed tamen ĉiuj movoj ŝiaj
Konservis tiel sin graciaj
Kaj tiel plenaj de esprimo,
Ke, se Demono, traflugante,
En tiu tempo ŝin ekvidus, —
Antaŭon rememoriĝante,
Li, ekĝeminte, — for rapidus....

Digitized by Google

IX. Kaj li ŝin vidis.... Por momento
Neklarigebla nova sento
Malbonan koron ekondigis.
Dezerton de animo lia
Benita sono troplenigis,
Kaj li en profundaĵo ĝia
Komprenis ion el sankteco
De amo, bono kaj beleco....
Kaj longe tiu ĉi pentraĵo
Per si lin ĉarmis, kaj revaĵo
Pri viv' feliĉa, kiu pasis,
Lin longe, longe ne forlasis
Per ia forto alforĝita,
Eksciis li malgajon sencan;
Kun nova sent' konatigita,
Ekaŭdis voĉon li parencan.
Ĝi, eble, renaskiĝo estis?
En lia saĝo nun forestis
Jam vortoj de tentad' malpia.
Forgeso? ĝin ne donis Dio.
Kaj li ne pensis eĉ pri tio...
. . . . . .

X. Rapidas en malpacienco
Fianĉ' al festo de edziĝo;
Ĉevalon ĝis subir' de tago
Li forlacigis. Al Aragvo
Plej bela li feliĉe venas.
Malantaŭ li apenaŭ tenas
Kameloj multaj da donaco
Portaĵon inter ĝiboj altaj, —
En voja malaperas spaco
Ilia vico kun sonantaj
Sub koloj multaj sonoriloj —
De tute bona ord' montriloj....
De Sinodalo posedanto

Digitized by Google

Persone estas kondukanto
De riĉa karavano. Lia
Talio lerta kaj gracia
Per zono estas ĉirkaŭita;
Pro moro, ankaŭ pro singardo
Li estas ĉirkaŭpendigita
Per bela, riĉa batalilo :
Ĉe zono — glavo kaj ponardo,
Post dorso — tego kun pafilo,
Tre lukse, arte eltranĉita;
De lia ĉuĥo [1] per manikoj
Venteto estas amuzita,
Ĝi per galon' ĉirkaŭkudrita.
Ĉevala brido kun penikoj;
Brodita estas lia selo
Per multkoloraj riĉaj silkoj;
Sub li ĉevalo flama, bela.
En Karabaĥo edukita,
Je timo ĝi troplenigita,
Ronkante, strabas de krutaĵo
Saltantan ŝaŭmon de ondaĵo.
Danĝera estas vojo bela :
Ŝtonegoj — de maldekstra flanko,
De dekstra-do — river' ribela.
Malfrue. Nur altaĵo blanka
Lumiĝas; levis sin nebuloj....
Kaj jam rapidas plu migruloj.

XI. Jen staras preĝejet' sur vojo....
Sub ĝi jam longe kun malĝojo
Princ' ia estas enfosita,
Per man' venĝema mortigita.
De tiu temp' migranto ĉiu,
Al fest', aŭ al batal' iranta,
Ĉe sankta preĝejeto tiu

1. Ĉuĥo estas supra gruza vesto kun malplenaj manikoj. *Trad.*

Digitized by Google

Haltadis kun teniĝ' preĝanta;
Kaj preĝo tiu estis gardo
De malamiko kaj ponardo.
Sed nun fianĉo juna, brava
Ne pensis eĉ pri mor' praava,
Ĉar per malica lin revaĵo
Demono ruza ekondigis :
Nun li sub nokta mallumaĵo
Je fianĉino sin ĝojigis....
Kaj jen antaŭe aperetis
Du homoj.... pli... jen ekbriletis
Ankoraŭ io.... Jen ekpafo....
Kuraĝa princo, kun papaĥo [1]
Sur brovojn tute surŝovita,
Eĉ unu vorton ne eldiris;
Sur piedingoj sin levinte,
Pafilon turkan li eltiris, —
Kaj skurĝon supren eksvinginte,
Li kun plej granda kuraĝego
Antaŭen flugas.... ree pafo, —
Kaj ĝemo forta, kaj kriego :
Sendube — pafo ne sen trafo....
Ne longe batalad' daŭriĝis, —
Ĉar gruzoj baldaŭ jam distriĝis.

XII. Mallaŭte estas.... Sin puŝantaj
Sen ord' kameloj iafoje
Rigardis kun terur' sur vojo
Malvivajn korpojn de rajdantoj,
Soniloj sonis kun malĝojo.
Rabita estas karavano,
Kaj sur korparo jam kristana
Flugilojn nokta bird' etendas!
Ripozo paca de ĉerkujo
Kun patroj kune en Gruzujo

1. Papaĥo — alta fela ĉapo, kiun uzas loĝantoj de Kaŭkazo. *Trad.*

Digitized by Google

De nun jam ilin ne atendas;
Ne venos tien ĉi patrinoj
En ĉadroj [1] longaj, kaj fratinoj,
Por kun sopiro, kun plorego,
Kun ĝemo forta, kun petego
Sin klini antaŭ ĉerk' ilia!
Sed tie ĉi sur ŝtono voja
Per mano zorga kaj tre pia
Farita estos kruc' malĝoja;
Hedero nur per branĉo sia
Smeralda, en printemp' agrabla,
Envolvos ĝin kun vera ĝojo
Kaj kun kareso plej afabla;
Kaj jen, turninte sin de vojo,
Migranto iafoje pia
Ripozos en ombraĵo Dia....

XIII. Ĉevalo flugas jen sur valo,
Ĝi ronkas, kvazaŭ en batalo;
Jen ĝi subite tute haltas,
Facilan venton aŭskultante,
Jen ree, kvazaŭ tigro, saltas,
Per hufoj teron ekbatante
Kaj truojn nazajn disŝovante;
Jen ĝi, kolharon eksvinginte,
Antaŭen flugas, frenezinte.
Sur ĝi rajdant' silenta sidas;
Balancas li per kapo bela
Kaj klinas ĝin al kurbo sela.
Nenion li jam sentas, vidas,
Ne regas li per kondukilo,
En piedingo enŝovita
Piedo lia, kaj kovrilo
Per sango estas makulita....
Saltulo lerta, vi sinjoron

1. Ĉadro estas vualo, kiun uzas orientaj virinoj.

Digitized by Google

Tuj el batalo liberigis,
Sed kuglo lian junan koron
En mallumego eĉ mortigis!

XIV. En dom' Gudala ploro forta,
Amaso da popol' en korto :
Ĉevalo'kies lacigita
Sur ŝtonoj falis ĉe pordego?
Kaj kiu estas mortigita
Rajdanto tiu ĉi? Timego
Konservis sin sur frunto bruna.
En sango estas vesto tuta,
Kaj sur kolhar' en premo muta
Jam malvarmiĝis mano juna.
Ne longe vi fianĉon vian,
Ho, fianĉino, en gajeco
Al fest' atendis de edzeco!
Brilante princan vorton sian
Kaj tute vere li eltenis :
Al fest' li ĝustatempe venis....
Sed nun, ho ve! neniu vidos,
Ke ree sur ĉeval' li sidos!...

XV. Je tondr' simila puno Dia
Al familio flugis gaja!
Falinte, jen sur lito sia
Tamaro ploras, plej malgaja;
Ĉe ŝi ruliĝas larm' post larmo,
Tre alte, ŝarĝe brusto spiras....
Kaj jen ŝi aŭdas, kvazaŭ diras
Subite voĉo sorĉa, varma :
« — Ne ploru vane, kara mia!
Ja malvivulon larmo via
Per ros' brilanta ne vivigos;
De ĝi rigard' nur klara Dia
Nebula estos, ĝi bruligos

Digitized by Google

Koloron de vangetoj belaj —
Jes, larmoj estas nur sencelaj;
Li jam ne estos estimanta
Plej indan vian sopiradon;
Ĉielo estas karesanta
Spiritan lian nun rigardon :
Amuzas lin jam sankta kanto....
Ĉu estas senc' en sonĝoj teraj,
En larmoj de fraŭlin' sinceraj
Por gast' de paradiza lando?
Ne, ho anĝelo mia tera,
Al mi vi kredu, kreitaĵoj
De mondo tuta plej malvera
Ne indas unu eĉ momenton
De viaj karaj sopiraĵoj
Kaj vian plej malgajan senton.

« En aera oceano,
Sen remiloj kaj sen veloj
Naĝas bela karavano
Da graciaj lumaj steloj.

Inter kampoj travideblaj
En arkaĵ' ĉiela, alte
Flugas nuboj nekapteblaj
En lanuga ar' senhalte.

Jen disiĝas, jen kuniras —
Ili tute ja ne ĝojas,
Kaj estontan ne deziras,
Kaj pasintan ne malĝojas.

Vi en tago plej turmenta
Rememoru nur pri ili,
Estu vi al ter' sensenta
Kaj senzorga, kiel ili!

Apenaŭ per kovrilo sia
Kaŭkazajn suprojn nokt' ombrigos,

Digitized by Google

Apenaŭ mondon sorĉo ia
Per forto sia silentigos;
Apenaŭ vent' ŝtonegon puŝos
Kaj flavan velkan herbon tuŝos,
Apenaŭ flitos bird', kaŝita
En ĝi, per vento timigita;
Kaj sub vinbera branĉo bela
Apenaŭ flor', pro ros' ĉiela,
Foliojn solvos tre avide;
Apenaŭ luno malrapide
El de montaro sin eklevos
Kaj, rigardante vin, ekrevos, —
Al vi mi ĉiam alflugados,
Gastados ĝis suriro suna
Kaj por anĝelo mia juna
Mi sonĝojn orajn alblovados.... »

XVI. Ĉesiĝis vortoj, formortante
Post sono son' en malproksimo.
Rigardas ŝi, de lit' saltante....
Konfuz' aperis en animo
Neesprimebla : nek ektimo,
Nek flama rav', nek sopirado.
En ŝi nun ĉiuj sentoj ŝiaj
Samtempe estis en bolado :
Animo de katenoj siaj,
Ligintaj ĝin, sin liberigis,
Kaj koron ia fajr' bruligis,
Kaj, ŝajne, tiu voĉ' afabla
Ankoraŭ sonis tre agrabla.
Nur en mateno sonĝo kara
Animon lacan silentigis,
Sed ŝian penson ĝi ondigis
Per revo eksterordinara :
Nebula, muta enmigrinto,
Brilanta per belec' netera,

Digitized by Google

Al ŝia kapo sin klininta,
Kun tia amo plej sincera
Kaj kun malĝojo ŝin rigardis, —
Kompatis kvazaŭ ŝin, aŭ gardis.
Ne estis li anĝel' ĉiela,
Gardanto ŝia sankta, bela :
Kroneto el de sun' radioj
Ne kuŝis super bukloj liaj;
Kaj ne spirito de infero,
Malvirta turmentit' terura, —
Ho, ne! li estis bela, pura,
Simila tute je vespero :
Nek tago estis li, nek lumo,
Nek nokto nigra, nek mallumo!...

Parto dua.

I. « Ho patro! patro! min aŭskultu,
Tamaron vian ne insultu!
Mi ploras. Vidu mian ploron!...
Ĝi forsekigas junan koron....
Nenies estos mi edzino —
Al miaj vi fianĉoj diru ;
Eterne restos mi knabino
Kaj ili ĉiuj nun foriru.
Post tempo, kiam, mortigita,
Li estis jam enterigita,
Per revoj min neforbateblaj
Spirito ruza tumultigas;
Kaj sonĝoj tre nekompreneblaj
En nokto min maltrankviligas;
Ne povas preĝi mi anime :
Pens' pia estas malproksime,
Kaj mi en vejnoj fajron sentas...
Sekiĝas, velkas mia koro.
Ho patro! io min turmentas....

Digitized by Google

Ho, cedu, patr', al mia ploro!
En sanktan monaĥejon sendu
Filinon vian senprudentan;
Savinto tie min defendu,
Akceptu mian koron pentan.
Por mi forestas gajo luma....
Nur sankta monaĥejo restas :
Ĝi kaŝos min de viv' malluma,
Por mi ĝi ĉerk' agrabla estas. »

II. Kaj monaĥejon tre malluman
Kun parencaro ŝi enpaŝis,
Kaj tie ĉi ŝi bruston junan
Per nigra hara vesto kaŝis.
Sed, kiel sub ŝtofaĵ' arĝenta,
Sub vesto hara, plej humila,
Frapadis koro maltrankvila
En brusto per revaĵo tenta.
Eĉ ĉe altaro plej brilanta
En daŭro de solena kanto,
Per kiu oni Dion laŭdis,
Konatan ŝi parolon aŭdis.
Sub ark' preĝeja duonluma
Tre ofte, nur por ŝi vidata,
Figuro glitis tre konata;
En bonodor' facila fuma,
Brilante kiel stelo, tien
Li loge vokis ŝin... sed kien?

III. Jen monaĥejo en montaroj,
De tuta mond' apartigita,
Per vic' de poploj kaj ĉinaro' [1]
De ĉiuj flankoj ĉirkaŭita.
Tra ili, post subiro suna,
En ĉambr' briletis izolita

1. Ĉinaro estas tre ombra arbo, pleje amata de Kaŭkazanoj. *Trad*

Digitized by Google

Lampet' de monaĥino juna.
Sub ombr' de belaj migdalujoj,
Ĉe multaj krucoj plej maigajaj —
Gardantoj mutaj de ĉerkujoj, —
Kantadis ĥor' da birdoj gajaj;
Sur ŝtonoj malvarmetaj fontoj
Trafluis brue kaj saltante,
Kaj, sub superpendantaj montoj
En intermont' sin kunverŝante,
Ruliĝis inter arbetaĵo,
Per prujn' kovrita de floraĵo.

IV. En nord' montaro estis bela
En bril' de ĉielruĝo hela; —
Fumeto kiam bluiĝante
Gajigas koron de gruzinoj,
Kaj, orienten sin turnante,
Al preĝo vokas muezinoj [1];
Kaj kiam laŭta sonorilo,
De monaĥejo vekigilo,
Tremadas en aer' matena
En horo paca kaj solena;
Gruzino kiam bela, juna
Deklivas sin de kruta monto
Kun longa kruĉ' al brua fonto, —
Montaro en lumado suna
Per tuta sia ĉeno bela
Tre longe en altaĵ' ĉiela
Viola kvazaŭ muro restis.
Kaj en vespero ĝi sin vestis
Per tuko lume-ruĝa, hela.
Plej alta en montar' parenca —
Kazbeko : en eterna neĝo
En vest' arĝenta, kvazaŭ reĝo
Ĝi staras forta kaj potenca.

1. Muezinoj estas servantoj en orientaj preĝejoj. *Trad.*

Digitized by Google

V. Sed, plena je revaĵo krima,
Ne estis de Tamar'animo
Al ravoj puraj atingebla.
Por ŝi per ombr' nepenetrebla
Nun mondo estis ĉirkaŭita,
Egale ĉiam kaj per ĉio
Ŝi estis multe turmentita :
Matene per de sun' radio
Kaj nokte per mallum' terura.
Apenaŭ nokto superpendas,
Tre ofte ŝi ĉe sanktfiguro
En frenezeco sin etendas —
Kaj ploras; kaj en nokt' silenta
Migranto ia kun atento
Aŭskultas, kiel ŝi ploregas,
Kaj pensas li : « spirit' malpenta
Punita en kavern' ĝemegas! » —
Kaj li tre akran aŭdon streĉas,
Ĉevalon pelas, savon serĉas.

VI. Tre ofte en revaĵ' tremante,
Ĉe mem fenestro en silento
Tamaro sidas meditante;
Ŝi malproksimon kun atento
Rigardas longe kaj sopiras....
Al ŝi do ia voĉo diras :
« Li nepre venos! Sonĝoj viaj
Ne vane ja vin karesadis,
Kaj li kun vortoj flamaj siaj
Kaj kun rigardo plej brilanta
Al vi ne vane aperadis. »
Ŝi longe estas sopiranta,
Pro kio — tute ne komprenas;
Ŝi Dion sanktan preĝi penas,
Sed preĝas lin obstina koro;
De batalado lacigita,

Digitized by Google

Sur lito kuŝas ŝi kun ploro —
Kusen' bruligas, sufokita
Kaj timigita, ŝi eksaltas,
Sin levas brusto tre rapide
Kaj flamas ŝultroj, kaj ekhaltas
Spirado ŝia, kaj, avide
Serĉante brakojn plej pasiajn,
Ŝi strange diras vortojn iajn....

. . . . . .

VII. Gruzujo tuta per kovriloj
De nokto estas jam vestita.
Demon', per amo forlogita,
Rapidas gaje sur flugiloj
Humilan sanktan monaĥejon.
Sed ne kuraĝis li tuŝeti
Tre longe pacan rifuĝejon.
Kaj unu fojon eĉ forĵeti
Li tute, ŝajne, preta estis
Intencon de animo sia.
Enpensa, jam tre longe restis
Ĉe alta mur' spirit' malpia;
Li vagas, kaj de paŝoj liaj
Sen vento tremas eĉ folioj.
Antaŭen li rigardon sendas :
Fenestro estas lumigita, —
Jam longe iun ŝi atendas.
Kaj jen en valo izolita
Eksonis de ĉinhar'[1]) tintado
Kaj belaj sonoj de kantado;
Kaj fluis tiuj sonoj ĉarmaj
Mezure unu post alia,
Simile je agrablaj larmoj;
Kaj estis tiu kanto dia
Tre delikata kaj tre bela, —

1. Ĉinharo estaŝ muzika instrumento, simila je gitaro. *Trad.*

Digitized by Google

Ĝi kvazaŭ estis kunmetita
Por tero peka en ĉielo.
Ekvolis, eble, mem anĝelo
Sinvidi kun amiko tera,
Kaj al anim' de suferanto,
Kun amo sankta kaj sincera,
Ekkantis pri estinta, vera,
Por per belega sia kanto
Forigi lian suferadon?...
Nun amon, ĝian sopiradon,
Kaj ekscitiĝon, kaj malĝojon
Demono nur unuan fojon
Komprenis.... Li en maltrankvilo
Forflugi volas, — sed flugilo
Ne movas sin, ne ŝanceliĝas!
Kaj, — kia mirindaj' senfina! —
Sur vangoj ŝarĝa larm' ruliĝas....
Ĉe tiu ĉambro monaĥina
Ĝis nun ankoraŭ estas ŝtono,
Trabruligita per plej varma,
Je fajr' simila flama larmo,
Per ŝarĝa larmo de Demono!...

VIII. Jen rifuĝejon li eniras,
Por amo preta, li deziras
Jam bonon fari, li komprenis,
Ke nova viv' por li alvenis.
Ne klara trem' de atendado,
De necerteco muta timo,
Malĝojo ama, sopirado, —
Unue venis al animo
Fiera, peka de Demono;
Ĝi estis antaŭdir' malbona....
Eniras de neig' spirito
Kaj vidas : antaŭ li kerubo,
El sankta paradiz' sendito,

Digitized by Google

Gardant' de pekulino bela,
En vest' facila, kiel nubo, —
Li staras kun rideto hela,
Kaj per flugilo blanka sia
De malamiko ŝin ombrigis....
Kaj jen radi' de lumo Dia
Rigardon lian ekblindigis,
Kaj ne saluton li afablan, —
Riproĉon aŭdas malagrablan :

IX. « Spirit' malvirta, maltrankvila,
Vi kial tien ĉi eniris?
En rifuĝejo plej humila
Ĝis nun malbon' ankoraŭ spiris
Neniam; via adoranto
Forestas tie ĉi! Kun krimo,
Kun tento lerta en animo,
Malbonon sole dezirante,
Ne tuŝu sanktan amon mian!
Vin kiu vokis?
Respondante,
Spirit' malica plej malpian
Vizaĝon faris kaj ekridis;
Ĵaluze brilis, kiel flamo,
Rigardo lia, kaj revidis
En si antaŭan li malamon.
« Ŝi — mia! li ekkriis brue :
Forlasu ŝin! ŝi estas mia!
Aperis vi jam tro malfrue,
Ho, sankta de ĉiel' gardanto, —
Por mi kaj ŝi, sendito Dia,
Vi nun ne estas jam juĝanto.
Kaj ŝia koro, kaj beleco
Sendube tute miaj estas;
Kaj via virto, kaj sankteco
Jam tute tie ĉi forestas;

Digitized by Google

Vi vane gardi ŝin intencas,
Ĉar mi ŝin amas, mi potencas! »
Kaj jen malgaje rigardinte
Oferon de malpia tero,
Kaj, per flugiloj eksvinginte,
Anĝelo dronis en aero....
. . . . . .

X. TAMARO. Ho, kiu estas vi? Danĝera
Parolo via! Vi ĉiela
Sendito estas, aŭ infera?
Vi kion volas?
DEMONO. Vi plej bela!
TAMARO. Sed diru — do, vi estas kiu?...
Respondu tuj....
DEMONO. Mi estas tiu,
Je kies voĉo vi atentis
En nokto nigra kaj trankvila,
Malĝojon kies vi eksentis,
Kaj kies penso plej facila
Al via saĝo iam venis. —
En sonĝo kiun vi divenis;
Mi — tiu kies eĉ rigardo
Pli mortigema, ol ponardo,
Esperon tutan pereigas,
Apenaŭ hom' kun ĝi sin ligas;
Neniu min kun am' alprenas
Kaj ĉio viva min malbenas.
Eterno, spac' — por mi nenio;
Mi estas vip' de sklavoj miaj,
Mi — reĝo de libera scio,
Mi — malamiko de mem Dio,
Kaj vidu : ĉe piedoj viaj
Mi klinas min, mi, mi — teruro,
Malbono, puno de naturo!
Al vi mi nun en kortuŝeco

Digitized by Google

Alportis preĝon diligentan
De amo kaj de amikeco,
Pasion mian teran varman,
Malĝojon teran plej turmentan,
Unuan mian veran senton,
Unuan ankaŭ mian larmon.
Kompatu — do pri mia sorto!
Vi min returnus al ĉielo,
Al bono nur per unu vorto;
Per am' vestita, mi anĝelo
Fariĝus ree, kaj ankoraŭ
Pli bela estus, pli brilanta.
Aŭskultu nur, mi petas kore, —
Mi — via sklavo suferanta,
Senfine forte vin amanta!
Apenaŭ nur mi vin ekvidis,
Subite en anim' jeridis,
Malamis forton mi inferan,
Kaj senmortecon, kaj potencon,
En kiuj mi ne vidis sencon, —
Kaj mi enviis ĝojon teran :
Ne vivi, kiel vi, — ne povas,
Mi tute, kaj mi eĉ ne provas
De vi aparte vivi. Mia
Sensanga, forta kor' malpia
Eksentis jam sur sia fundo
Radion de agrabla sento,
Kaj ree en malnova vundo
Sin movas de malĝoj' serpento....
Sen vi — pro kio miaj fortoj?
Potenco mia? Senmorteco?
Ĝi estas nur bonsonaj vortoj,
Preĝejo granda sen dieco!

TAMARO. Forlasu min, spirit' envia!
Silentu, mi al vi ne kredas!....
Ho ve!... Kreint' potenca mia!

Digitized by Google

Mi sentas : mi al li jam cedas;
Ne povas preĝi mi; je morta
Veneno estas plenigita
Jam mia saĝo plej malforta!
Kompatu, vi min pereigas;
Per morto estas ĉirkaŭita
Parolo via... Kio igas,
Ke vi min amu? Ho, pro Dio,
Al mi respondu, diru!...

DEMONO. Kio?
Ho ve! mi mem ne scias kio;
Je vivo nova tute plena,
Tuj mem de mia kap' malbena
Kroneton pikan mi formetis,
Pasintan tutan mi forjetis;
Kaj paradizon, kaj inferon
Mi en okuloj viaj trovas!
Al vi mi sentas amon veran,
Ekami tiel vi ne povas :
Per tuta forto, per potenco
De revo kaj de pens' senmorta
Mi amas. En de mond' komenco
Jam en animo mia forta
Figuro via ĉiam bela
Fortike estis impresita,
Kaj longe antaŭ mi, ĉarmita,
Ĝi flugis en eter' ĉiela.
Jam longe, maltrankviliĝante,
Agrablan nomon mi atentis;
En paradizo eĉ estante,
Mi ĉiam unu mankon sentis,
Kun mi vin belan ne havante.
Ho, se vi povus kompreniĝi,
Sopiro kia kaj malbeno —
En tuta viv' sen partopreno
Suferi, ĝemi, turmentiĝi,

Digitized by Google

Kaj plezuriĝi, — sed por bono
Jam ne atendi ian laŭdon,
Kaj rekompencon — por malbono;
Elporti ĉiam bataladon,
Sed nek triumfi, nek paciĝi!
Domaĝi ĉiam, ne volante,
Kaj ĉion vidi, kaj sciiĝi,
Kaj senti, kaj nenion timi,
En tuta ter' nenion ami,
Kaj peni ĉion nur malami,
Kaj tutan mondon malestimi!...
Apenaŭ nur de Di' malbeno
Al mi subite proksimiĝis, —
Natura varma ĉirkaŭpreno
Por mi eterne malvarmiĝis....
Jen vidis mi ĉielarkaĵon,
Brilantan klaran ornamaĵon
De bonkonataj lumaj steloj,
Vestitaj en kronetoj belaj;
Sed ili tute ne rekonis
Min en vestaĵo de infero!
Kaj tute jam en malespero
Al mi alveni mi admonis
Kunfratojn, je mi mem similajn,
Sed — ve! mi ankaŭ mem rekonis
Nek vortojn de malbon' iliajn,
Nek vizaĝegojn kun rigardoj
Pli mortigemaj, ol ponardoj....
Kaj, eksvinginte per flugiloj,
Forflugis mi... sed kien? kial?
Ne scias. — Min amikoj miaj
Forjetis ĉiuj; mondo tuta
Por mi fariĝis surda, muta,
Kiel ĉiel' kun bonoj Diaj.
Ŝipeto tiel difektita,
Sen direktilo kaj sen velo,

Digitized by Google

Per ond' libera ekkaptita,
Rapide naĝas, — sed cen celo;
Tiele en mateno frua
Fragment' de nubo tondra brua,
En ark' ĉiela nigriĝante,
Nenie halti kuraĝante,
Vidante celon eĉ nenie,
Traflugas — kien kaj de kie
Ĝi mem ne scias : — sola Dio
Potenca scias nur pri tio!...
Sed mondon mi ne longe regis,
Al pek' ne longe ĝin instruis,
Kaj ĉion belan mallaŭdegis,
Kaj ĉion noblan fordetruis;
Mi kredon el homara koro
Forigis tute sen laboro....
En mondo sole malsaĝuloj
Enuaj kaj hipokrituloj,
Plej abomenaj kaj malpiaj,
Kun kredo en animo restis....
Sed... sed ĉu ili indaj estis
Je zorgoj, je laboroj miaj?
Kaj jen mi kaŝis min en montoj;
Kaj flugis, kiel meteoro,
Mi nokte super bruaj fontoj....
Migranto kun kredema koro
Kaj kun espero en animo,
Trompita per fajret' proksima,
Loĝejon trovi atendante
Kaj kune kun ĉeval' falante,
Pereis en profundegaĵo,
Kaj ĝemis, — kaj post li kurbiĝis
Postsigno sanga sur krutaĵo....
Sed mi ne longe amuziĝis
Per tiel krima malbonego.
Tre ofte, polvon eklevinte,

Digitized by Google

En batalado kun ventego,
Per fulmotondro min vestinte,
Sur nuboj flugis mi facilaj,
Volante inter elementoj
Bruegaj, fortaj, malhumilaj,
Animon savi de turmentoj
Kaj de pensad' neevitebla, —
Forgesi pri neforgesebla!
Ĉu estas senco en mizeraj
Laboroj homaj, en turmentoj,
Malĝojoj, malfeliĉoj teraj
De nunaj, de estontaj gentoj,
Eĉ komparitaj kun minuto
De mia suferado muta?
Kaj homoj? Viv', labor' ilia?
Ĉu estas senc' en ili ia?
Ja ili pasis, ili pasos,
Pri ili homoj pensi lasos!
Espero estas : juĝ' severa;
Ĝi ĉiam pardonema restos!
Sed mia malĝojad' netera
En mi, kun mi eterne estos,
Ĝi finon, kiel mi, ne havos,
De ĝi en tomb' mi min ne savos!
Jen al serpento ĝi similas,
Jen kvazaŭ flamo hela brilas,
Bruligas per bonega tento,
Jen penson premas kvazaŭ ŝtono —
Nedetruebla monumento
De pereintaj jam esperoj,
De revo pri pasinta bono,
De sentoj, de pasioj teraj!

TAMARO. — Vi kiu estas diveninta
Ne estas mi, sed seniĝinta
Por ĉiam je trankvilo mia,
Nevole al parolo via

Digitized by Google

Atentas mi kun ĝoj' sekreta,
Amiko mia suferanta.
Sed se vi ruzi estas preta,
Se trompon en anim' kaŝante...
Ho, min kompatu!... Kia gloro!...
Por kio estas mia koro
Al vi? Ĉu estas por ĉieloj
Pli kara mi, ol ĉiuj belaj,
Ne vidis kiujn vi? Ribelaj
Ja manoj de mortemaj homoj
Ilian liton virgan puran
Ne ĉifis en iliaj domoj!
Ne! donu vi fatalan ĵuron....
Eldiru, — vidu : mi sopiras,
Vi vidas revojn miajn! Timon
Agrablan, dolĉan vi enspiras
Al mi nevole en animon...
Sed ĉion vi komprenis tute
Kaj min kompatos sendispute!
Ho, ĵuru, — ke jam malkonfesas
Malbonon vi, kaj ke promesas...
Ĉu jam en mond' ne estas eblaj
Promesoj, ĵuroj nerompeblaj?...

DEMONO. — Mi ĵuras je unua horo
De mond', je ĝia horo lasta,
Je krimo ĵuras malhonora
Kaj je triumf' de vero ĉasta;
Mi ĵuras je turment' de falo,
De venko je revado pala;
Mi ĵuras je kun vi sinvido
Kaj je disiĝo atendata;
De spiritaro je kunsido,
Je ĝia sorto malamata,
Je fratoj subpotencaj miaj,
Je glavoj de anĝeloj sanktaj,
Belegaj, fortaj, senpasiaj,

Digitized by Google

Senfine min malestimantaj,
Kaj je ĉielo, je infero,
Je vi kaj je sankteco tera;
Je lasta ĵuras horo mia
Kaj je unua larmo via;
Je spir' de via buŝo bela,
De silka bukl' je ondo hela;
Je amo ĵuras mia tera
Kaj je feliĉo, je sufero, —
Malnovan venĝon malkonfesas —
Mi tute, malkonfesas ankaŭ
Fierajn pensojn, kaj promesas,
Ke nun jam de nenia flanko
Mi per venen' de flato bela
Al iu ektumultos koron.
Mi tute ŝanĝos mian moron,
Paciĝos mi kun Di' ĉiela,
Ĉar volas mi al li jam cedi;
Mi volas preĝi, senti amon,
Mi volas ankaŭ bonon kredi,
Mi verŝos mian pentan larmon,
Kaj ĝi tuj mem de frunto mia
Je vi jam inda, mia bela,
Forviŝos signojn de ĉiela
Sanktega fajro, — mond' malpia
Jam floros en nescio sia
Sen mi, trankvile kaj sen bruo!
Ho, kredu: mi ĝis nun unua
Komprenis vin, kaj vin elektis
Por mi sanktejon, kaj potencon
Mi ĉe piedoj viaj metis;
Min amo via kiel dono
Altiras, — kaj mi eternecon
Al vi proponas por momento, —
En amo, kiel en malbono,
Tre granda estas mia sento

Digitized by Google

Kaj ne ŝanĝema, — ho, Tamaro!
Al mi vi kredu, mia kara.
Mi, fil' libera de etero,
Vin, Dian kreitaĵon belan,
Forprenos de malbona tero
Kun mi en landon superstelan,
Kaj estos vi de mond' reĝino,
Unua mia amikino;
Sen partopreno, sen bedaŭro
Rigardos vivon vi sur tero,
Forestas kie longedaŭra
Beleco kaj feliĉo vera,
Alestas kie sole krimoj
Kaj ekzekutoj, en animoj
De ĉiuj kie — nur pasioj
Tre sensignifaj, tre malpiaj;
Ne povas kie oni ami
Sen granda abomena timo,
Aŭ malestimi kaj malami
Per tutaj fortoj de animo.
Ĉu vi ne scias, mia bela,
Signifas kion am' minuta
De homoj? Ondo nur ribela
De sango de naturo bruta!
Sed tagoj kuras, — ĉio pasas
Kaj homoj baldaŭ ĝin forlasas.
Ĉu homo povas ĉe disiĝo
Fortika resti? Ĉu li ŝparos
Sin de enuo, de laciĝo?
Ĉu longe ankaŭ kontraŭstaros
Li al forlogo de beleco,
Aŭ al revad' de arbitreco?
Ne, mia kara amikino,
Eksciu, ke ne estas sorto
Al vi, simile al sklavino
De malĝentila tera forto,

Digitized by Google

Silente velki inter teraj
Malvarmaj kaj malgrandanimaj
Amikoj ŝajnaj kaj malveraj,
Kaj en senfinaj, grandaj timoj,
En senfrukteco de esperoj
Kaj en laboroj ŝarĝaj viaj!
Post mur' de sankta monaĥejo
Ne estingiĝos sen pasioj
Vi inter preĝoj en preĝejo.
De tuta mondo sin kaŝante,
Neniam homojn eĉ vidante,
En malproksim' de viva ĉio,
De homoj kaj de sankta Dio.
Ho, ne! plej bela kreitaĵo,
Por vi alia estas sorto :
Alia granda profundaĵo,
De ravoj, kaj turmento forta
Atendas vin! Forlasu mondon
Mizeran vi al ĝia sorto :
Anstataŭ ĝi grandegan rondon
Da multaj kaj fieraj scioj
Al vi, plej kara, mi proponos.
Amason da spiritoj miaj
Al vi, pro servo, tuj mi donos;
Sklavinojn sorĉaju kaj facilajn,
Plej obeemajn kaj humilajn
Al vi mi donos, mia bela;
Forŝiros mi kroneton oran
Por vi de orienta stelo,
Mi prenos noktan roson floran,
Kaj ĝin' per tiu roso pura
Mi superŝutos; per purpura
Radoi bela de subiro
Envolvos mi talion vian
Belegan, luksan kaj gracian;
Per bonodora, pura spiro

Digitized by Google

Aeron tutan mi plenigos!
Eterne per ludado mira
Mi aŭdon vian amuzigos;
El or', turkiso kaj safiro
Konstruos mi palacon karan;
Mi min mallevos fundon maran
Post nubon flugos mi humile,
Al vi mi donos ĉion teran, —
Nur amu min!...

XI. Kaj jen facile
Kaj dolĉe kisis li mizeran
Oferon sian; per parolo,
Da logo sorĉa plenigita,
Batalis li kun ŝia volo,
Kun ŝia saĝo ŝancelita,
Potenca de Demon' rigardo
Bruligis ŝin; en nokt' sensona,
Malluma, ĝi brilegis forta,
Neforbatebla, kiel ponardo.
Triumfis, ve, spirit' malbona!
De lia kis' veneno morta
Aperis tuj en koro ŝia...
Turmenta kaj terura krio
Silenton noktan ekondigis.
En si ĝi ĉion tuj kunigis:
Kaj amon flaman, kaj suferon,
Riproĉon kun petego lasta,
Kaj adiaŭon senesperan
Kun vivo juna, vivo ĉasta....
. . . . . .

XII. En tiu nokta temp' gardanto,
Ĉirkaŭirante muron altan,
Tabulon feran ekbatante, —
Malrapidigis tuj senhaltan
Ĉirkaŭ iradon: li atingis

Digitized by Google

Ĉambreton ŝian .. Kun esprimo
De konfuziĝo en animo
Subite manon li haltigis
Kaj en tabulon ne frapadis.
Jen tra ĉirkaŭa li silento
Subite ŝajne klare aŭdis,
Ke sonis kiso tre konsenta,
Malforta ĝem', minuta krio.
Kaj dubo peka kaj malpia
Al li aperis en animo...
Sed poste silentiĝis ĉio,
Kaj jen ankoraŭ post momento
Alflugis nur el malproksimo
Per blovo de facila vento
Murmuro dolĉa de folioj,
Kaj en mallumaj bordoj siaj
Rivero bruis en silento.
Kanonon sanktan de piulo
En timo legas maljunulo,
Por de diabla forta tento
Forigi pekan penson sian;
Por fingroj benas li tremantaj
Ekscitiĝantan bruston pian,
Kaj jen per paŝoj rapidantaj
Daŭrigas plu iradon sian....
. . . . . .

XIII. En ĉerko kuŝis ŝi simila
Je mem anĝelo de ĉielo;
Pli blanka, pura, ol kovrilo,
Konservis sin koloro hela
De ŝia frunto juna, bela,
Fermitaj okulharoj estas...
Sed, Dio! ĉu ne dirus ĉiu,
Ke juna belulino tiu
En ŝia ĉerko nur dormetas,

Digitized by Google

Kaj kison varman nur atendas,
Aŭ tagon? Sed radio suna
Senfrukte tute sin etendas
Sur frunto de knabino juna;
Kaj vane en malĝoj' sensenca
Nun kisis buŝo ŝin parenca. —
Ne, ne, — neniu estas forta
Batali kun kruela morto!

XIV. Neniam eĉ en grava festo
Ankoraŭ estis tiel karā
Kaj tiel bela, riĉa vesto
De formortinta nun Tamaro.
Floretoj, laŭ antikva moro,
Ornamas ŝin, — agrabla, forta
De ili fluas bonodoro,
Sed igas ilin mano morta
Adiaŭ diri jam al mondo.
Nenio en vizaĝo ŝia
Parolis, ke en brua ondo
De ravo flama kaj pasia
Ŝi mortis. Estis plenigita
Vizaĝo ŝia je marmora
Beleco, tute senigita
Je saĝo, je esprimo kora,
Sekreta, kiel muta morto,
Aŭ kiel mem severa sorto.
Rideto stranga malvarmiĝis
Sur ŝia bela buŝ' silenta;
Pri malĝojad' de ĝi sciiĝis
Okulo sperta kaj atenta.
En ĝi vidiĝis malestimo
De horo forflorinta, bona,
De lasta senca pens' esprimo,
Al tero — adiaŭ' sensona.
Rebrilo vana de pasinta,

Digitized by Google

Ankoraŭ estis ŝi pli morta,
Pli senespera, pli malforta,
Ol mem rigard' estingiĝinta.
Tiele en vespera horo,
Fluidiĝinte kiam tute,
Jam kaŝas sin en maro ora
Kaleŝo taga, — tuj minute
Kaŭkazaj neĝoj, konservante
Radion ruĝan kaj brilante,
Lumiĝas nur sur horizonto
Sed jam al tiu lum' malĝoja
Ne iros en dezert' renkonte
Rebrilo, kaj nenies vojo
Neniam estos lumigita
De ĝia supro glaciita!...

XV. Parencoj ĉiuj kaj najbaroj
Kunvenis por malgaja vojo.
Ŝirante siajn grizajn harojn,
Batante bruston en malĝojo,
Gudalo princ' en lasta fojo
Jam sidas sur ĉevalo brava, —
Kaj ĉiuj rajdas. Longa vojo
Por ili estas Inter ava
Ostaro estas elfosita
Por ŝi rifuĝo plej trankvila.
Prapatr' Gudala, priglorita
Rabisto brava malhumila,
Malsano kiam lin kunligis
Kaj kiam venis penta horo,
En profundaĵ' de sia koro
Preĝejon fari sin ŝuldigis
Sur supro de montar' granita,
Sur kiu estis nur aŭdita
Kantado de neĝvent' terura
Kaj kie flugas nur vulturo. —

Digitized by Google

Kaj baldaŭ en neĝar' Kazbeka
Preĝejon vento ĉirkaŭblovis,
Kaj ostoj de rabisto peka
Por si trankvilon tie trovis;
Kaj alta mont' aliformiĝis,
Sur ĝi aperis nun tombejo :
Postmorta kvazaŭ nun loĝejo
Al mem ĉielo proksimiĝis;
Ĝin malproksime de okuloj
Ne tuŝos kvazaŭ vivo tera...
Sed vane ! Sonĝas malvivuloj
Nek ĝojon de feliĉo vera,
Nek malgajecon de pasinta,
Jam por eterne formortinta

XVI. En spaco de etero bluą
Traflugis unu el anĝeloj
Sanktegaj sur flugiloj helaj;
Animon li de mondo brua
En brakoj portis al ĉieloj;
Per dolĉa vorto de espero
Li ĝin de dubo ŝarĝa savas,
Kaj signon kriman de sufero
Per larmoj li de ĝi forlavas.
Al ili estis jam aŭdita
El paradizo sankta kanto —
Subite, vojon trahakanta,
Sin levis el infer' spirito.
Potenca kiel vent', severe
Li brilis, kvazaŭ fulm' radia,
Kaj arogante, kaj fiere
Ekkriis li : « ŝi estas mia ! »
Kun tim', per preĝo defendata,
Alpremis sin al brusto ŝpara
Animo peka de Tamaro.
Nun sorto estis decidata

Digitized by Google

De estonteco : li denove
Nun staris antaŭ ŝi senmove,
Sed, ho potenca sankta Dio!
Kun li fariĝis stranga io :
Rigardo lia estis plena
Da malboneco, da esprimo
De malfavor', de malestimo,
Kaj de malpaco al veneno;
Kaj de vizaĝo senmovema
Malvarmo blovis mortigema
« For, malaperu, ho malpia
Spirito de malluma dubo! »
Respondis lin sendito Dia,
Vestinte sin per blanka nubo :
« Sufiĉe vi jam triumfadis
Kaj ŝin sufiĉe posedadis;
Sed hor' de juĝo nun alvenis,
Ekprovon ŝarĝan ŝi eltenis,
Kaj bona estas volo Dia!
Forpasis tagoj de sufero,
Jam de animo bela ŝia
Nun kun kaduka vest' de tero
Forfalis ĉenoj de malbono,
Ni ŝin, — eksciu, ho Demono, —
Atendis longe en ĉielo!
Ja vivo de animo ŝia
Sur peka tero estis tia,
Ke ĝi prezentis nur momenton
De suferad' neelportebla,
De granda ĝoj' neatingebla
Kaj de turmenta kora sento;
El plej bonega ĝi etero
De Dio estis elteksita,
Ĝi estis tute ne por tero,
Kaj tero ne por ĝi kreita!
Ŝi dubojn siajn elaĉetis

Digitized by Google

Per kosto granda kaj kruela...
Ŝi amis kore, sin turmentis, —
Kaj nun atendas ŝin ĉielo! »
Kaj ekrigardis lin anĝelo
Severe per okuloj brilaj,
Kaj, eksvinginte per flugiloj,
Fordronis en bluaĵ' ĉiela.
Demono forvenkita estis....
Revaĵojn siajn li, fiera,
Malbenis, kaj denove restis
Li sola sur enua tero
Sen am', sen kredo, sen espero!...
Ĝis nun ankoraŭ en montaro
Kaŭkaza, sur dekliva klino,
En valo bela de Kajŝaro
Restaĵoj estas de ruino.
Pri ĝiaj detruitaj turoj
Ekzistas inter kaŭkazanoj
Rakontoj multaj kaj teruraj,
Amataj forte de infanoj....
Jen inter arboj monumento,
Fantomo kvazaŭ, en silento
Nigriĝas ĉiam en nebuloj.
Pri tagoj ĝi rakontas sorĉaj;
Malsupre montras sin auloj[1],
Kaj tero floras kaj verdiĝas,
De ĉie flugas sonoj voĉaj, —
Rivero brilas kaj ruliĝas,
De alta monto ekfalante;
El malproksimo, sonorante,
Trairas granda karavano.
Naturo — belulin', ŝercante,
Sen zorg', simile je infano,
Amuzas sin per vivo juna,

1. Aulo — estas malgranda monta vilaĝo. *Trad.*

Digitized by Google

Kaj per printempo, kaj per suno.
  Sed nun kastelo, jam fininta
Antikvan longan servon sian,
Kiel aĝulo, transvivinta
Amikojn, karan familion,
Malgaje staras, sen espero.
En ĝi loĝantoj nevideblaj
Atendas nokton nur : libero
Kaj fest' por ili estas eblaj
Nur tiam, kiam lun' subiras!
Kaj ili zumas, kaj disiras,
Disflugas kun diversa krio.
Jen araneo en sekreto
Alpaŝis al ŝpinad' de reto;
Jen de lacertoj familio
Petolas gaje sur tegmento,
Kaj singardema jen serpento
Elrampas el malluma truo
Sur platon de peron', kaj volvas
Sin ringe sen nenia bruo,
Jen ree lerte sin disvolvas,
Jen al bastono ĝi similas
Kaj kuŝas, kaj tre hele brilas,
Simila kvazaŭ glavo ŝtala,
Forlasis kiun mortigita
Heroo ia en batalo
En tempo longe forgesita....
— Sovaĝa estas ĉio, ĉie.
Postsignoj iaj de pasinta
Vídataj estas nun nenie, —
Ĉar ilin estis balainta
Man' de eterno senpartia,
Kaj memorigos jam nenio
Pri glora nomo de Gudalo
Kaj pri filino kara lia!
Sed sur plej alta monta valo,

Digitized by Google

Sur kiu estis enfosita
Ostar' ilia, konservita
Preĝejo inter nuboj staras :
Ĝis nun ĝin sankta Dio ŝparas;
En gardo ĉe pordegoj ĝiaj
Vidiĝas vico da granitoj,
Per neĝ' eterna priŝutitaj:
Sur brust' ilia el glacioj
Tavol' eterna hele brilas
Kaj tute al kiras' similas,
Grandegoj dormaj da neĝaroj
Sur suproj montaj sin etendas,
Kaj, sulkiĝinte, ĉie pendas
Frostitaj kvazaŭ falakvaroj.
Iradas tie vent' patrole,
Forblovas polvon ĝi memvole
De grizaj antikvegaj muroj
Kaj de ruinaj altaj turoj —
Jen kantas ĝi senfinajn kantojn,
Jen laŭte vokas gardstarantojn.
Aŭdinte pri preĝejo mira
En tiu ĉi sovaĝa lando,
Al ĝi nur nuboj de suriro
Rapidas en amaso granda;
Kaj al plataro tomba tiu
Neniu jam de homoj iras
Por plori tie, kaj neniu
Nun tie ĝemas kaj sopiras!
Ŝtoneg' malluma de Kazbeko
Gardadas nur akiron sian,
Kaj plendo de homaro peka
Ne tuŝos sonĝon jam ilian.

LYON

1265-05. — Coulommiers, Imp. Paul BRODARD. — 2-06.

Digitized by Google

(*Sekvo.*)

ANGLUJO. — REVIEW of REVIEWS, *Norfolk street, LONDON, W. C.*

First lessons in Esperanto, by Th. Cart and J. Rhodes . . . 6 pence.
Esperanto : The Student's complete Text-Book, with two vocabularies by J. C. O'Connor Ph. Dr. M. A. 1s 6d
Esperanto-English dictionary, by A. Motteau. 2s 6d
English-Esperanto dictionary, by J. C. O'Connor Ph. Dr. M. A.. 2s 6d
English-Esperanto dictionary, by J. Rhodes and J. Ellis (*in preparation*).
Grammar and exercises of the International Language Esperanto, by Richard H. Geoghegan. 1s 6d
Dickens, Kristnaska sonorado (A Christmas Carol), tradukita de M. Vestcott. . . . . 1s »

BELGUJO — HOLANDUJO. — A.-J. WITTERYCK-DELPLACE
4, Nouvelle Promenade, BRUGES

Het Esperanto in tien lessen, door A.-J. Witteryck naar Cart et Pagnier. . . . . » 50
Paĝoj el la Flandra Literaturo, tradukitaj de Dro Seynaeve et Dro van Melckebeke 1 50

BULGARUJO. — KLUBO « STELO », *PLOVDIV*

Esperanto en 10 lecionoj, de Cart et Pagnier. . . . . 1 »
Unuaj lecionoj, de Cart et Atanasov. . . . . » 40
Propaganda folio. . . . . » 10

DANUJO. — ANDR.-FRED. HÖST & SÖN
Bredgade, 35, KJÖBENHAVN

Esperanto-Dansk-Norsk Ordbog, af F. Skeel-Giörling. . . . . Kr. 3 50
Grammatik. . . . . » »
Dansk-Esperanto Ordbog. . . . . » »

GERMANUJO. — MÖLLER & BOREL, *Prinzenstrasse, 95, BERLIN*

Anfangsgründe der Esperanto-Sprache, von Th. Cart und Hermann Jürgensen.. . . . . M 0 30
Vollständiges Lehrbuch der Esperanto-Sprache, von J. Borel. . M 1 20
Wörterbuch Deutsch-Esperanto, von Dr. Zamenhof. . . . . M 2 »
Wörterbuch Esperanto-Deutsch, von H. Jurgensen. . . . . M 1 80
Schlüssel zum Lehrbuch der Esperanto-Sprache, von J. Borel. M 0 50
Pri unu speco de Kurbaj linioj, von Profesor A. Dombrovski. . M 0 50
Lernolibro de Esperanta Stenografio, (laŭ sistemo Stolze-Schrey) de F. Schneeberger. . . . . M 0 80

(*Turnu.*)

Digitized by Google

(*Sekvo.*)

HISPANUJO. — J. ESPASA, *579, Calle de las Cortes, BARCELONA*

Primeras lecciones de Esperanto de Th. Cart y L. Villanueva. . P 0 40
Manual y Ejercicios de la lengua internacional Esperanto, por V. Inglada Ors y A. L. Villanueva. . . . . P 3 »
Vocabulario Esperanto-Español y Español-Esperanto, por Inglada Ors y Villanueva. . . . . P 5 »

ITALUJO. — RAFFAELLO GIUSTI
53, Via Vittorio Emanuele, LIVORNO

Prime lezioni d'Esperanto de Th. Cart e Alb. Gallois. 0 40
Grammatica della lingua internazionale Esperanto di L. de Beaufront, tradotta da G. Pucinelli. 1 50
L'Esperanto in dieci lezioni, di Cart e Gallois. . . . . » 75
Dizionario Esperanto-Italiano, de J. Pucinelli. 1 50
Dizionario Italiano-Esperanto, de J. Menzzini (*in preparazione*).

POLUJO. — M. ARCT, *53, Nowy Swiat, WARSZAWA*

Esperanto : Czecs I. Gramatyka i cwiczenia, Dr L. Zamenhof. . R. 0 25
— Czecs II. **Slownik**. . . . . — . . R 0 15

PORTUGALUJO. — BRAZILUJO

Primeiras lições de Esperanto, do professor Th. Cart, trad. portugueza de A.-C. Coutinho, Paris, Hachette. . . . . » 40

SVEDUJO. — *Esperantoförening, STOCKHOLM*

Esperanto-Svensk ordbok, de P. Ahlberg. . . . . Kr : 1 75

OUVRAGES DIVERS

Tutmonda jarlibro esperantista por 1905 . . . . . 2 50
Couturat (L.) et Leau (L.). — **Histoire de la langue universelle**. . 10 »
— **Extraits de l'Histoire de la langue universelle**. . . . . 1 »
Lafarge (G.). — **Nécessité de l'adoption d'une langue internationale auxiliaire** . . . . . 1 »
Sacré (E.). — **L'Esperanto** . . . . . 1 »
Thiaucourt (C.). — **Dernière conférence sur la Langue Internationale Esperanto** . . . . . 1 »
Premier manuel de la langue auxiliaire Esperanto. . . . . » 10

1265-04. — Coulommiers, Imp. PAUL BRODARD. — 2-05.